KVIN FILOZOFIAJ VERKOJ

DE

PREZIDANTO MAŬ

PROLETOJ DE ĈIUJ LANDOJ, UNUIĜU!

KVIN FILOZOFIAJ VERKOJ

DE

PREZIDANTO MAŬ

★

FREMDLINGVA ELDONEJO
PEKINO 1972

RIMARKO DE LA ELDONINTO

La artikoloj en la nuna eldono de *Kvin Filozofiaj Verkoj de Prezidanto Maŭ* estas tradukitaj laŭ la ĉina originalo en la *Elektitaj Legaĵoj el la Verkoj de Maŭ Zedong* (*Eldono A*), publikigita de la Popola Eldonejo, Pekino, en aprilo 1965.

Presita en Ĉina Popola Respubliko

E N H A V O

PRI PRAKTIKO (Julio 1937) 1

PRI KONTRAŬDIRO (Aŭgusto 1937) 42

I. La Du Mondkonceptoj 44
II. La Universaleco de Kontraŭdiro 54
III. La Partikulareco de Kontraŭdiro 64
IV. La Ĉefa Kontraŭdiro kaj la Ĉefa Flanko de Kontraŭdiro 94
V. La Identeco kaj Bataleco de la Flankoj de Kontraŭdiro 110
VI. La Loko de Antagonismo en Kontraŭdiro 126
VII. Konkludo 131

PRI LA ĜUSTA TRAKTADO DE KONTRAŬDIROJ INTERNE DE LA POPOLO (27 februaro 1957) 144

I. Du Malsamaj Specoj de Kontraŭdiroj 145
II. La Problemo de Elimino de Kontraŭrevoluciuloj 176

III. La Problemo de Agrikultura Kooperigo 184
IV. La Problemo de Industriistoj kaj Komercistoj 193
V. La Problemo de Intelektuloj 197
VI. La Problemo de Nacimalplimultoj 203
VII. Unueca Ĉiuflanka Planado kaj Konvena Aranĝado 205
VIII. Pri "Disvolviĝu Cent Floroj kaj Konkuru Cent Skoloj" kaj "Longdaŭra Kunekzistado kaj Reciproka Kontrolado" 208
IX. Pri la Problemo de Tumultoj Kreitaj de Malmultnombraj Personoj 224
X. Ĉu Malbonaj Aferoj Povas Fariĝi Bonaj Aferoj? 228
XI. Pri Ŝparo 233
XII. La Vojo de Industriigo de Ĉinio 236

PAROLADO EN LA TUTLANDA KONFERENCO DE LA KOMUNISTA PARTIO DE ĈINIO PRI PROPAGANDA LABORO (12 marto 1957) 246

DE KIE VENAS LA KOREKTAJ IDEOJ DE LA HOMO? (Majo 1963) 284

PRI PRAKTIKO

Pri la Rilato inter Konado kaj Praktiko — Rilato inter Scio kaj Ago

(Julio 1937)

Materiismo antaŭ Marks observis la problemon de konado aparte de la socia karaktero de la homo kaj aparte de lia historia disvolviĝo, tial ĝi ne povis kompreni la dependecon de konado al socia praktiko, t.e. la dependecon de konado al produktado kaj klasbatalo.

En nia Partio iam estis nombro da dogmismaj kamaradoj, kiuj dum longa tempo rifuzis la sperton de la ĉina revolucio, neis la veron, ke "Marksismo ne estas dogmo sed gvidilo al agado", kaj nur timigis aliajn per apartaj vortoj kaj frazoj arbitre elŝiritaj el marksismaj verkoj. Troviĝis ankaŭ nombro da empiriismaj kamaradoj, kiuj, alkroĉiĝante longtempe al siaj fragmentaj spertoj,

Antaŭ ĉio, marksistoj opinias, ke la produkta agado de la homaro estas la plej fundamenta praktika agado, la determinanto de ĉiuj aliaj agadoj. En sia konado, la homo, dependante ĉefe de sia agado en materia produktado, iom post iom komprenas la fenomenojn de la naturo, la karakteron de la naturo, la leĝojn de la naturo kaj la rilatojn inter la homo kaj la naturo; kaj tra produkta agado, li ankaŭ konas iom post iom en diversaj gradoj certajn interrilatojn inter homoj. Ĉiuj ĉi tiuj scioj ne povas esti akiritaj aparte de produkta agado. En senklasa socio ĉiu persono, kiel membro de la socio, kunlaborante kun aliaj

nek komprenis la gravecon de teorio por revolucia praktiko nek vidis la tutan situacion de revolucio, kaj laboradis kvankam penege — sed blinde. La eraraj ideoj de tiuj du specoj de kamaradoj, precipe la dogmismaj ideoj, kaŭzis grandegan perdon al la ĉina revolucio en 1931—1934, dum la dogmistoj, sin vestinte en la palto de Marksismo, trompis tre multajn kamaradojn. "Pri Praktiko" de kamarado Maŭ Zedong estis verkita por

membroj de la socio kaj formante certajn produktajn rilatojn kun ili, entreprenas produktan agadon por solvi problemojn de la materia vivo de la homaro. En diversaj klasaj socioj, la sociaj membroj de ĉiuj klasoj siavice ankaŭ formas, en diversaj manieroj, certajn produktajn rilatojn kaj entreprenas produktan agadon por solvi problemojn de la materia vivo de la homaro. Tio ĉi estas la fundamenta fonto de la disvolviĝo de homa konado.

Socia praktiko de la homo ne limiĝas je unu nura formo de produkta agado, sed havas ankoraŭ multajn aliajn formojn, kiel klasbatalo, politika vivo, sciencaj kaj

malkovri laŭ la vidpunkto de marksisma teorio de konado la subjektivismajn erarojn de dogmismo kaj empiriismo en la Partio, precipe de dogmismo. Ĉar la ĉefa punkto estas malkovri la dogmisman specon de subjektivismo kiu ignoras praktikon, tial la verko estas titolita "Pri Praktiko". Laŭ la vidpunkto de tiu ĉi traktato kamarado Maŭ Zedong faris prelegon en la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Kolegio en Jan'an.

artaj agadoj; unuvorte, la socia homo partoprenas en ĉiuj sferoj de la praktika socia vivo. Tial la homo, en sia konado, komprenas en diversaj gradoj diversajn rilatojn inter homoj, krom el la materia vivo, ankaŭ el la politika kaj kultura vivo (intime kunligata kun la materia vivo). El ili, precipe la klasbatalo en diversaj formoj donas profundan influon al la disvolviĝo de homa konado. En klasa socio ĉiu vivas en certa klasa pozicio, kaj ĉia penso estas senescepte stampita per la brulmarko de klaso.

Marksistoj opinias, ke produkta agado de la homa socio disvolviĝas paŝon post paŝo de malalta al alta nivelo, sekve ankaŭ la konado de homoj, ĉu pri la naturo ĉu pri la socio, disvolviĝas paŝon post paŝo de malalta al alta nivelo, t.e. de malprofunda al profunda, de aparta flanko al pli multaj flankoj. Dum tre longa historia periodo oni povis havi nur apartflankan komprenon pri la historio de socio pro tio, ke unuflanke

la partieca juĝo de la ekspluatantaj klasoj konstante distordis la historion de socio, kaj aliflanke la mallarĝeco de produkta skalo limigis la homan vidkampon. Nur tiam, kiam kune kun la grandegaj produktaj fortoj — la granda industrio — aperis la moderna proletaro, oni povis havi ĉiuflankan historian komprenon pri la disvolviĝo de socia historio kaj turni la konon pri la socio en sciencon, t.e., la sciencon de Marksismo.

Marksistoj opinias, ke nur la socia praktiko de homoj estas kriterio de la vereco de ilia konado pri la ekstera mondo. Fakte, la konado de homoj estas konfirmita, nur kiam ili atingis la antaŭkonceptitajn rezultojn tra la procezo de socia praktiko (la procezoj de materia produktado, de klasbatalo kaj de sciencaj eksperimentoj). Se oni volas sukcesi en sia laboro, t.e. atingi la antaŭkonceptitajn rezultojn, oni nepre devas konformigi siajn pensojn al la leĝoj de la objektiva ekstera

mondo; alie oni malsukcesos en praktiko. Spertinte malsukceson, oni ĉerpas el ĝi lecionon kaj korektas siajn pensojn por ilin konformigi al la leĝoj de la ekstera mondo, kaj tiel oni povas turni malsukceson en sukceson; ĝuste tiun veron montras la proverboj: "Malsukceso estas la patrino de sukceso" kaj "Falo en fosaĵon, gajno en saĝo". La teorio de konado de dialektika materiismo levas praktikon ĝis la unua loko, ĝi opinias, ke homa konado absolute ne povas apartiĝi de praktiko, kaj forpuŝas ĉiajn erarajn teoriojn kiuj neas la gravecon de praktiko kaj apartigas konadon de praktiko. Lenin diris jene: **"Praktiko estas pli alta ol (teoria) konado,** ĉar ĝi havas la kvaliton ne nur de universaleco, sed ankaŭ de senpera realeco."[1] La marksisma filozofio — dialektika materiismo — havas du plej elstarajn karakterizojn: unu estas ĝia klasa karaktero, ĝia malkaŝa deklaro ke dialektika materiismo servas al la proletaro; la alia estas

ĝia praktika karaktero, emfazo pri la dependeco de teorio al praktiko, emfazo pri tio ke la fundamento de teorio estas praktiko kaj teorio siavice servas al praktiko. Ĉu konado aŭ teorio estas vero aŭ ne, tio ne estas juĝata laŭ tio, kiel oni sentas subjektive, sed laŭ tio, kia estas la rezulto en socia praktiko objektive. La kriterio de vero povas esti nur la socia praktiko. La vidpunkto de praktiko estas la unua kaj fundamenta vidpunkto de la teorio de konado de dialektika materiismo.[2]

Tamen, kiel ja homa konado naskiĝas el praktiko kaj siavice servas al praktiko? Tion ĉi oni tuj komprenas, se nur oni esploras la procezon de disvolviĝo de konado.

La afero estas tia, ke en la procezo de praktiko homo komence vidas nur la fenomenan flankon de diversaj aferoj en la procezo, la apartan flankon de diversaj aferoj kaj la eksterajn rilatojn inter diversaj aferoj. Ekzemple, iuj de ekstere venas al Jan'an por esploro, en la unuaj unu aŭ

du tagoj, ili vidas la terenon, la stratojn kaj domojn de Jan'an; ili kontaktas kun multaj personoj, partoprenas bankedojn, vesperkunvenojn kaj mitingojn; ili aŭdas diversajn parolojn, legas diversajn dokumentojn — ĉio ĉi tio estas la fenomenoj de aferoj, la apartaj flankoj de aferoj kaj la eksteraj rilatoj inter tiuj aferoj. Tio ĉi estas nomata la percepta stadio de konado, nome la stadio de percepto kaj impreso. Tio estas, tiuj ĉi apartaj aferoj en Jan'an efikas sur la sensajn organojn de la sinjoroj de la esplora grupo, estigas iliajn perceptojn, kaj en ilia cerbo naskiĝas multaj impresoj kune kun proksimumaj eksteraj rilatoj inter tiuj ĉi impresoj: tio ĉi estas la unua stadio de konado. En tiu ĉi stadio, oni ankoraŭ ne povas formi profundajn konceptojn kaj fari logikajn konkludojn.

La daŭrigo de socia praktiko multfoje ripetas la aferojn kiuj estigas en praktiko perceptojn kaj impresojn al la homo, sekve estiĝas en la homa cerbo subita ŝanĝiĝo

(t.e. salto) en la procezo de konado kaj formiĝas konceptoj. Konceptoj jam ne plu estas la fenomenoj de aferoj, nek la apartaj flankoj de aferoj, nek iliaj eksteraj rilatoj; ili kaptas la esencon de aferoj, la aferojn en tuto kaj la internajn rilatojn de aferoj. Koncepto kaj percepto diferencas ne nur kvante, sed ankaŭ kvalite. Se oni plue procedas laŭ tiu ĉi direkto, aplikante la metodojn de juĝado kaj rezonado, do estiĝas logika konkludo. Tio, kion oni priskribas en la romano *La Tri Regnoj* per "je kuntiro de la brovoj, taktiko venas en la kapon", aŭ tio, kion ni esprimas en la ĉiutaga parolo per "tion mi iom pripensu", ĝuste aludas al la aplikado de konceptoj en la homa cerbo por juĝi kaj rezoni. Tio ĉi estas la dua stadio de konado. Kolektinte diversspecajn materialojn kaj krome post sia "ioma pripenso", la sinjoroj de la esplora grupo de ekstere veninta povas fari la jenan juĝon: "La politiko de la Kontraŭjapana Nacia Unuecfronto

de la Komunista Partio estas ĝisfunda, sincera kaj vera." Farinte tiun ĉi juĝon, se ankaŭ ili estas sinceraj pri unuiĝo por savi la nacion, ili do povas pluapaŝe fari tian konkludon: "La Kontraŭjapana Nacia Unuecfronto povas sukcesi." En la kompleta procezo de konado de homoj pri iu afero, tiu stadio de konceptado, juĝado kaj rezonado estas pli grava stadio, la stadio de racia kono. La vera tasko de konado estas tra perceptado atingi pensadon, atingi iompostioman komprenon pri la internaj kontraŭdiroj de objektivaj aferoj, pri iliaj leĝoj, pri la internaj rilatoj inter ĉi tiu procezo kaj tiu procezo, t.e. atingi logikan konon. Ripete dirate, logika kono diferencas de percepta kono per tio ke percepta kono koncernas la apartajn flankojn, la fenomenojn kaj la eksterajn rilatojn de aferoj, dum logika kono faras grandan paŝon antaŭen kaj atingas la tutecon, la esencon kaj la internajn rilatojn de aferoj, atingas malkaŝon

de la internaj kontraŭdiroj de la ĉirkaŭa mondo kaj sekve povas kompreni la disvolviĝon de la ĉirkaŭa mondo en ĝia tuteco, en ĝiaj ĉiuflankaj internaj rilatoj.

Tiun teorion de dialektika materiismo pri la procezo de disvolviĝo de konado, bazitan sur praktiko kaj procedantan de la malprofunda al la profunda, neniu iam tiel elmetis antaŭ Marksismo. Marksisma materiismo unuafoje ĝuste solvis tiun ĉi problemon, materiisme kaj dialektike elmontris la profundiĝantan movadon de konado, elmontris la progresantan movadon de percepta kono al logika kono de la sociaj homoj en iliaj kompleksaj kaj konstante ripetiĝantaj praktikoj de produktado kaj klasbatalo. Lenin diris: "La abstrakto de *materio*, de *leĝo* de la naturo, la abstrakto de *valoro* ktp., unuvorte *ĉiuj* sciencaj (ĝustaj, seriozaj, ne absurdaj) abstraktoj reflektas la naturon pli profunde, pli vere kaj *pli plene*."[3] Marksismo-Leninismo opinias, ke la karakterizoj de la du stadioj

en la procezo de konado estas tio, ke en la pli malalta stadio kono sin prezentas kiel percepta, dum en la pli alta stadio ĝi sin prezentas kiel logika, tamen ambaŭ estas stadioj de unueca procezo de konado. Percepto kaj racio estas malsamaj en naturo, tamen ili ne estas apartigitaj unu de la alia, sed unuigitaj sur la bazo de praktiko. Nia praktiko pruvas ke ion perceptitan ni ne povas tuj kompreni kaj nur ion komprenitan ni povas pli profunde percepti. Percepto solvas nur problemojn fenomenajn, nur teorio solvas problemojn esencajn. La solvo de ĉi tiuj problemoj neniel povas esti apartigita de praktiko. Kiu ajn volas ion koni, ne povas fari alimaniere ol kontakti kun tio, t.e. vivi (praktiki) en ties cirkonstancoj. Oni ne povis en feŭda socio antaŭkoni la leĝojn de kapitalisma socio, ĉar ankoraŭ ne aperis kapitalismo kaj ne estis tia praktiko. Marksismo povas esti produktaĵo nur de kapitalisma socio. Marks ne povis en la epoko de

antaŭmonopola kapitalismo antaŭkoni konkrete iujn specialajn leĝojn de imperiisma epoko, ĉar ankoraŭ ne venis imperiismo, la lasta stadio de kapitalismo, kaj ankoraŭ ne estis tia praktiko; nur Lenin kaj Stalin povis preni sur sin tiun taskon. Marks, Engels, Lenin kaj Stalin povis krei siajn teoriojn ne nur dank' al sia genio, sed ĉefe pro tio, ke ili persone partoprenis en tiama praktiko de klasbatalo kaj scienca eksperimento; sen ĉi tiu lasta kondiĉo neniu geniulo povus sukcesi. "Instruitulo scias ĉion sub la ĉielo ne elirante el sia pordo" estis nur senenhava frazo en antikva tempo kiam tekniko ne estis disvolvita, dume en la nuna epoko kun disvolvita tekniko kvankam tiu ĉi frazo povas esti realigata, tamen ion vere senpere scias nur la praktikantoj en la mondo; ili en sia praktiko akiras "scion", kaj tio atingas la manojn de "instruitulo" pere de lingva kaj teknika rimedoj, kaj nur tiam li povas scii nerekte "ĉion sub la ĉielo". Se oni volas rekte koni

iun aŭ iujn aferojn, oni do devas persone partopreni la praktikan batalon por ŝanĝi la realon, ŝanĝi tiun aŭ tiujn aferojn, kaj nur tiel oni povas kontakti kun la fenomenoj de tiu aŭ tiuj aferoj; kaj nur kiam oni persone partoprenas la praktikan batalon por ŝanĝi la realon, oni povas malkaŝi la esencon de tiu aŭ tiuj aferoj kaj kompreni ilin. Tio ĉi estas la vojo de konado laŭ kiu ĉiu ajn fakte iras, kvankam iuj intence distorde tion kontraŭdiras. La plej ridindaj en la mondo estas tiuj "ĉionsciuloj", kiuj kaptis ie fragmenton da scio kaj jam proklamas sin "la unua sub la ĉielo"; tio ĉi montras nur tion ke mankas al ili memkono. La problemo de scio estas problemo de scienco kaj toleras neniom da malsincereco aŭ malmodesteco; male, nepre necesa estas ĝuste la kontraŭo — sinteno de sincereco kaj modesteco. Se vi volas akiri scion, vi devas partopreni la praktikon ŝanĝi la realon. Se vi volas scii la guston de piro, vi devas ŝanĝi la

piron — proprabuŝe manĝi ĝin. Se vi volas scii la strukturon kaj ecojn de atomoj, vi devas fari fizikajn kaj kemiajn eksperimentojn por ŝanĝi ilian staton. Se vi volas scii teoriojn kaj metodojn de revolucio, vi devas partopreni revolucion. Ĉia vera scio originas el rekta sperto. Sed oni ne povas ĉion sperti rekte; kaj fakte plejparto de niaj scioj devenas de nerekta sperto, tio estas ĉiuj scioj el la antikva tempo kaj fremdaj landoj. Tiuj ĉi scioj por la antikvuloj kaj fremduloj estis el ilia rekta sperto; se dum la rekta spertado de antikvuloj kaj fremduloj tiuj ĉi scioj konformas al la kondiĉo de "scienca abstrakto" menciita de Lenin kaj science reflektas objektivajn aferojn, do la scioj estas fidindaj, alie ne fidindaj. Tial la scioj de homo konsistas nur el du partoj: scioj el rekta sperto kaj scioj el nerekta sperto. Kaj kio estas nerekta sperto por mi, tamen estas rekta sperto por aliaj. Sekve konsidere scion en ĝia tuteco, nenia

scio estas apartigebla de rekta sperto. Ĉia ajn scio originas de homa percepto pri la objektiva ekstera mondo per liaj sensaj organoj; kiu ajn neas tiun percepton, neas rektan sperton, neas personan partoprenon en la praktiko ŝanĝanta la realon, tiu ne estas materiisto. Ĝuste ĉi tie kuŝas la kialo, pro kio estas ridindaj la "ĉiomsciuloj". Ĉe ĉinoj estas malnova diro: "Kiel oni povus akiri tigridojn ne enirinte la tigro-kuŝejon?" Tiu ĉi diro estas vero kiel por homa praktiko, tiel ankaŭ por la teorio de konado. Ne povas esti kono aparta de praktiko.

Por klarigi la dialektik-materiisman movadon de kono estiĝantan surbaze de praktiko ŝanĝanta la realon — la iom post iom profundiĝantan movadon de kono, ni prenu jene ankoraŭ kelkajn konkretajn ekzemplojn.

En la unua periodo de sia praktiko, la periodo de maŝindetruado kaj spontana luktado, la proletaro en sia kono pri kapi-

talisma socio estis nur en la stadio de percepta kono kaj konis nur apartajn flankojn de la diversaj fenomenoj de kapitalismo kaj iliajn eksterajn rilatojn. Tiutempe la proletaro ankoraŭ estis tiel nomata "klaso en si mem". Sed kiam ĝi atingis la duan periodon de sia praktiko — la periodon de konsciaj kaj organizitaj ekonomia batalo kaj politika batalo, kiam dank' al la praktikado, dank' al la spertoj de longtempa batalo, kiuj diversaj spertoj estis resumitaj de Marks kaj Engels per scienca metodo, naskiĝis teorio de Marksismo, uzata por eduki la proletaron, kaj tio igis la proletaron ekkompreni la esencon de kapitalisma socio, la rilaton de ekspluatado inter la sociaj klasoj kaj la historian taskon de la proletaro, — tiam ĝi fariĝis "klaso por si mem".

Tiel same la ĉina popolo ekkonis imperiismon. La unua stadio estis tiu de supraĵa percepta kono, montriĝinta en la sendistinga kontraŭfremdula batalo de la Movado

de la Tajping-a Ĉiela Regno,[4] Jihetuan-movado[5] ktp. Nur en la dua stadio, la ĉina popolo atingis la stadion de racia kono, ĝi ekvidis la diversajn internajn kaj eksterajn kontraŭdirojn de imperiismo, kaj ankaŭ la esencon de la subpremado kaj ekspluatado al la vastaj amasoj de la ĉina popolo fare de imperiismo en ligiĝo kun la kompradora kaj feŭda klasoj de Ĉinio. Tiu ĉi kono komenciĝis ĉirkaŭ la tempo de la Movado de 4-a de Majo en 1919.[6]

Ni rigardu nun militon. La gvidantoj de milito, se ili ne havas militan sperton, en la komenca stadio ne komprenas la profundajn leĝojn de direktado de konkreta milito (ekzemple, nia Milito de Agrara Revolucio de la pasintaj dek jaroj). En la komenca stadio ili nur persone spertas multajn batalojn kaj krome suferas tre multajn malvenkojn. Tamen tiuj spertoj (de venkoj kaj precipe de malvenkoj) ebligas al ili kompreni la internajn rila-

tojn tra la tuta milito, t.e. la leĝojn de tiu konkreta milito, kompreni strategion kaj taktikojn, kaj sekve ili povas direkti la militon kun memfido. Se tiam iu senspertulo estas komisiita por la direktado, same li povas kompreni la ĝustajn leĝojn de milito nur post kiam li suferis kelkajn malvenkojn (akiris spertojn).

Ni ofte aŭdas de iuj kamaradoj ne povantaj kuraĝe akcepti asignitan taskon jenan frazon: "Mi ne havas memfidon." Kial li ne havas memfidon? Ĉar mankas al li sistema kompreno pri la enhavo kaj cirkonstancoj de tiu ĉi laboro, aŭ li neniam kontaktis kun tia laboro, aŭ kontaktis nur malmulte, tial ne eblas paroli pri la leĝoj de tia laboro. Tamen post detala analizo pri la stato kaj cirkonstancoj de la laboro, li eksentas sin pli memfida kaj volas preni sur sin tiun laboron. Se li pasigas kelkan tempon en tiu ĉi laboro kaj akiras spertojn en ĝi, kaj cetere li estas homo volanta senantaŭjuĝe observi staton

de la aferoj kaj ne konsideranta problemojn subjektive, apartflanke kaj supraĵe, li do povas mem fari konkludojn kiel fari la laboron, kaj tiam ankaŭ lia kuraĝo por la laboro povas ege altiĝi. Nepre stumble falos nur tiuj, kiuj konsideras problemojn subjektive, apartflanke kaj supraĵe kaj, kien ajn alveninte, ordonas aŭ instrukcias memfideme, ne konsiderante la cirkonstancojn, ne pririgardante la tuton de la afero (la historion kaj la tutan nunan staton de la afero) kaj ne tuŝante la esencon de la afero (la naturon de la afero kaj la internajn rilatojn inter tiu ĉi kaj aliaj aferoj).

El tio estas videble, ke la unua paŝo en la procezo de konado estas ekkontakto kun la aferoj de la ekstera mondo; tiu ĉi apartenas al la stadio de perceptado. La dua paŝo estas sintezado de la perceptaĵoj kaj iliaj rearanĝo kaj rekonstruo; tiu ĉi apartenas al la stadio de konceptado, juĝado kaj rezonado. Nur tiam, kiam la

perceptaĵoj estas tre abundaj (ne fragmentaj aŭ nekompletaj) kaj konformas al la realo (ne estas iluziaĵoj), oni povas formi surbaze de tiuj materialoj ĝustajn koncepton kaj logikon.

Tie ĉi du gravaj punktoj devas esti emfazataj. La unua, kiu estas jam menciita supre sed nun devas esti ripetata ankoraŭfoje, estas la dependeco de racia kono al percepta kono. Kiu ajn opinias, ke racian konon oni povas akiri ne el percepta kono, tiu estas ideisto. En la historio de filozofio estis la t.n. "racionalista" skolo, kiu agnoskis nur la realecon de racio kaj ne la realecon de sperto, rigardante fidinda nur racion kaj ne fidinda perceptan sperton; la eraro de tiu skolo kuŝas en tio, ke ĝi inversigas la fakton. Racio estas fidinda ĝuste pro tio, ke ĝi devenas de percepto, alie ĝi estus kvazaŭ rivero sen fonto aŭ arbo sen radikoj, estus nur ia subjektiva spontanaĵo nefidinda. Koncerne al la sinsekvo en la procezo de konado,

percepta sperto estas la unua; ni emfazas la signifon de socia praktiko en la procezo de konado ĝuste pro tio, ke nur dank' al socia praktiko la homo povas komenci konadon kaj komenci ricevi perceptan sperton de la objektiva ekstera mondo. Por homo, kiu fermas siajn okulojn, ŝtopas siajn orelojn kaj tute sin izolas de la objektiva ekstera mondo, nenia konado estas menciebla. Kono komenciĝas de sperto — tio ĉi estas la materiismo de la teorio de konado.

La dua punkto estas tio, ke kono ankoraŭ devas esti profundigita, la percepta stadio de kono ankoraŭ devas esti disvolvita al la racia stadio — tio ĉi estas la dialektiko de la teorio de konado.[7] Se oni opinias, ke konado povas halti je la malalta percepta stadio, kaj ke nur percepta kono estas fidinda, dum racia kono ne fidinda, do li ripetas la historian eraron de "empiriismo". Tiu teorio eraras en nekompreno de tio, ke kvankam la perceptaĵoj estas reflekto de ia realeco de la objektiva ekstera mondo (mi ne parolas ĉi tie pri la ideisma empiriismo kiu limigas spertojn je la t.n. introspekto), tamen ĉi tiuj perceptaĵoj estas nur apartflankaj kaj supraĵaj, kaj tia reflekto estas nekompleta, ĝi ne reflektas la esencon de la afero. Por komplete reflekti la tutan aferon, reflekti la esencon de la afero kaj reflekti la internajn leĝojn de la afero, estas necese pere de pensado reformi kaj prilabori la abundajn perceptaĵojn, forigante la senvalorajn kaj prenante la esencajn, forigante la falsajn kaj konservante la verajn, procedante de ĉi tiu al tiu kaj de la supraĵo al la interno, por formi sistemon de konceptoj kaj teorioj — estas necese salti de percepta kono al racia kono. Tia reformita kono ne estas kono pli malplena aŭ pli malfidinda; male, kio ajn reformita science sur la bazo de praktiko en la procezo de konado reflektas, kiel Lenin diris, pli profunde, pli prave kaj pli komplete la

objektivajn aferojn. Tion ne komprenas la banalaj aferistoj, ili respektas sperton kaj malestimas teorion, tial ne povas fari ampleksan pririgardon pri la tuto de la objektiva procezo, ne havas klaran orientilon kaj vastan perspektivon, kaj mem kontentiĝas pro hazardaj sukcesoj kaj mallarĝaj komprenoj. Se tiaj homoj gvidus revolucion, ili ĝin kondukus en staton kontraŭmuran.

Racia kono dependas de percepta kono kaj percepta kono devas esti disvolvita en racian konon — tio ĉi estas la teorio de konado de dialektika materiismo. Nek "racionalismo" nek "empiriismo" en filozofio komprenas la historian aŭ dialektikan naturon de konado, kaj kvankam ĉiu el ili entenas unuflankan veron (tie ĉi mi parolas pri la materiismaj, kaj ne pri la ideismaj racionalismo kaj empiriismo), tamen ambaŭ estas eraraj koncerne al la teorio de konado kiel tuto. La de percepto al racio movado de konado de

dialektika materiismo validas kiel por malgranda procezo de kono (ekzemple, kono pri unu afero aŭ unu laboro), tiel ankaŭ por granda procezo de kono (ekzemple, kono pri unu socio aŭ unu revolucio).

Tamen la movado de kono ankoraŭ ne finiĝas tie ĉi. Se la dialektik-materiisma movado de kono haltus nur je racia kono, do ĝi tuŝus nur duonon de la problemo. Kaj laŭ marksisma filozofio, ĝi tuŝus nur la ne tre gravan duonon. Marksisma filozofio opinias, ke la tre grava problemo ne estas kompreni la leĝojn de la objektiva mondo kaj sekve povi ĝin klarigi, sed estas dinamike reformi la mondon per la kono de la objektivaj leĝoj. Laŭ la vidpunkto de Marksismo, teorio estas grava, kaj ĝia graveco estas plene montrita en la aserto de Lenin: "Sen revolucia teorio ne povas esti ankaŭ revolucia movado."[8] Tamen Marksismo emfazas la gravecon de teorio ĝuste kaj nur pro tio, ke ĝi povas gvidi agadon.

Se oni havas ĝustan teorion, sed nur babilaĉas pri ĝi, ĝin flanken metas kaj ne praktikas, do tia teorio, kvankam bona, estas tute sensignifa. Konado komenciĝas de praktiko, kaj tra praktiko estas atingita teoria kono, kiu devas denove reiri al praktiko. La dinamika funkcio de konado manifestiĝas ne nur en la dinamika salto de percepta kono al racia kono, sed ankaŭ, kaj pli grave, en la salto de racia kono al revolucia praktiko. La kono, kaptinta la leĝojn de la mondo, nepre devas denove reiri al la praktiko reformanta la mondon, denove aplikiĝi en la praktiko de produktado, en la praktiko de revoluciaj klasbatalo kaj nacia batalo kaj en la praktiko de scienca eksperimento. Tio ĉi estas la procezo kontroli teorion kaj disvolvi teorion, estas la daŭrigo de la tuta procezo de konado. La problemo, ĉu teorio konformas al objektiva vero, ne estas nek povas esti tute solvita en la supre menciita movado de

kono de la percepta al la racia. La sola rimedo por komplete solvi tiun ĉi problemon estas returni racian konon al socia praktiko, apliki teorion al praktiko por vidi ĉu ĝi povas atingi antaŭkonceptitan celon. Multaj teorioj de naturscienco estas rigardataj kiel veroj ne nur pro tio, ke ili estis tiel konsideritaj kiam naturesciencistoj kreis ilin, sed ankaŭ pro tio, ke ili estas poste pruvitaj en scienca praktikado. Simile, Marksismo-Leninismo estas rigardata kiel vero ne nur pro tio, ke ĝi estis tiel konsiderata kiam Marks, Engels, Lenin kaj Stalin science ĝin formis, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi estas poste pruvita en la praktiko de revoluciaj klasbatalo kaj nacia batalo. Dialektika materiismo estas universala vero, ĉar neniu ajn povas eskapi el ĝia sfero en sia praktiko. La historio de homa konado diras al ni, ke la vereco de multaj teorioj estas nekompleta, kaj la nekompleteco estas korektita tra la kontrolo de praktikado. Multaj

teorioj estas eraraj kaj iliaj eraroj estas korektitaj tra la kontrolo de praktikado. Jen kial praktiko estas la kriterio de vero kaj kial "la vidpunkto de vivo, de praktiko devas esti la unua kaj fundamenta vidpunkto de la teorio de konado".[9] Stalin diris bone: ". . . teorio fariĝas senobjekta, se ĝi ne ligiĝas kun revolucia praktiko, ĝuste tiel, kiel praktiko fariĝas blinda, se ĝi ne lumigas al si la vojon per revolucia teorio."[10]

Kiam ni alvenas al ĉi tiu punkto, ĉu la movado de kono kompletiĝis? Nia respondo estas: kompletiĝis kaj ne kompletiĝis. Kiam sociaj homoj partoprenas en la praktiko ŝanĝi iun objektivan procezon en iu stadio de disvolviĝo (ĉu praktiko ŝanĝi iun naturan procezon, ĉu praktiko ŝanĝi iun socian procezon), dank' al la reflekto de la objektiva procezo kaj la subjektiva dinamika funkcio, la kono de homoj moviĝas de la percepta al la racia kaj formas ideojn, teoriojn, planojn aŭ projek-

tojn, kiuj ĝenerale konformas al la leĝoj de tiu objektiva procezo. Poste oni aplikas ĉi tiujn ideojn, teoriojn, planojn aŭ projektojn al la praktiko de tiu sama objektiva procezo. Se oni povas efektivigi la celon antaŭkonceptitan, t.e. transformi en la praktiko de tiu sama procezo la antaŭe formulitajn ideojn, teoriojn, planojn aŭ projektojn en faktojn, aŭ ĝenerale en faktojn, do la movado de kono de tiu konkreta procezo povas esti rigardata kiel kompletigita. Ekzemple, en la procezo ŝanĝi la naturon, la realigo de iu plano de konstruado, la pruviĝo de iu scienca hipotezo, la fabrikiĝo de iu ilo aŭ objekto, la rikolto de iu agrikulturaĵo, aŭ en la procezo ŝanĝi la socion, la venko de iu striko, la venko de iu milito, la efektivigo de iu eduka plano — ĉio ĉi povas esti rigardata kiel realigo de antaŭkonceptita celo. Tamen ĝeneraldire, en la praktiko ĉu ŝanĝi la naturon ĉu ŝanĝi la socion, la originalaj ideoj, teorioj, planoj aŭ projek-

toj de homoj estas tre malofte efektivigitaj sen ia ajn ŝanĝo. Tio okazas pro tio, ke la entreprenantoj por ŝanĝi la realon ofte estas multe limigitaj: ili ofte estas limigitaj ne nur de sciencaj kaj teknikaj kondiĉoj, sed ankaŭ de la disvolviĝo de la objektiva procezo kaj grado de ĝia manifestiĝo (la aspektoj kaj esenco de la objektiva procezo ankoraŭ ne estas plene malkaŝitaj). En tia situacio, pro neantaŭviditaj cirkonstancoj malkaŝitaj en praktiko, ofte okazas ke niaj ideoj, teorioj, planoj aŭ projektoj estas ŝanĝitaj parte, kaj kelkfoje okazas ankaŭ ke ili estas tute ŝanĝitaj. Tio signifas, ke estas tiaj okazoj, ke la originalaj ideoj, teorioj, planoj aŭ projektoj parte aŭ tute ne konformas al la realo kaj estas parte aŭ tute eraraj. Ofte malsukcesoj devas ripetiĝi multfoje, antaŭ ol eraraj konoj povas esti korektitaj kaj konformiĝo al la leĝoj de la objektiva procezo povas esti atingita, tiel la subjektivaĵoj povas fariĝi objektivaĵoj, t.e., an-

taŭkonceptitaj rezultoj povas esti atingitaj en praktiko. Kiam tio okazas, la movado de homa kono pri iu objektiva procezo en iu stadio de disvolviĝo ĉiel ajn povas esti rigardata kiel kompletigita.

Tamen koncerne al la moviĝo de la procezo, la movado de homa kono ne estas kompletigita. Ĉiu ajn procezo, ĉu en la sfero de la naturo ĉu en la sfero de la socio, antaŭen moviĝas kaj antaŭen disvolviĝas konsekvence de siaj internaj kontraŭdiroj kaj bataloj, kaj ankaŭ la movado de homa kono devas moviĝi kaj disvolviĝi konforme. Koncerne al socia movado, vera revolucia gvidanto nepre devas esti kapabla ne nur korekti siajn ideojn, teoriojn, planojn aŭ projektojn, kiam en ili troviĝas eraroj, kiel supre dirite, sed ankaŭ igi sin mem kaj ĉiujn partoprenantojn de la revolucio fari konformajn moviĝon kaj ŝanĝiĝon en la subjektiva kono, kiam iu objektiva procezo jam moviĝas kaj ŝanĝiĝas de unu stadio

de disvolviĝo al alia, t.e., li devas adapti la elmetatajn novajn revoluciajn taskojn kaj novajn laborprojektojn al la novaj ŝanĝoj de situacio. La ŝanĝiĝo de situacio en revolucia periodo estas tre rapida; se la kono de la revoluciuloj ne povas ŝanĝiĝi rapide konforme, do ili ne povas gvidi la revolucion al venko.

Tamen, ofte okazas, ke la penso post-restas post la realo, ĉar homa kono estas limigita de multaj sociaj kondiĉoj. Ni kontraŭas al la obstinuloj en la revoluciaj vicoj, kies penso ne povas antaŭeniri kun la ŝanĝiĝinta objektiva situacio kaj montriĝis kiel dekstra oportunismo en historio. Tiuj ĉi homoj ne vidas ke la batalo de kontraŭdiroj jam antaŭen puŝas la objektivan procezon, dum ilia kono ankoraŭ restas ĉe la malnova stadio. Tio ĉi estas karakterizo de la penso de ĉiuj obstinuloj. Ilia penso apartiĝis de socia praktiko, ili ne povas roli kiel kondukanto antaŭ la ĉaro de socio, ili scias nur post-

sekvi ĝin, grumblante ke ĝi kuras tro rapide, kaj klopodas ĝin treni posten aŭ ĝin returni.

Ni kontraŭas ankaŭ al la "maldekstra" frazismo. La penso de la "maldekstraj" frazistoj transpaŝas difinitan stadion de disvolviĝo de la objektiva procezo, iuj el ili rigardas siajn fantaziojn kiel veron, kaj aliaj strecas sin por realigi en la nuna tempo idealon kiu povas esti efektivigita nur en la estonteco; ili sin apartigas de la nuna praktiko de la plejmulto de homoj kaj de la hodiaŭa realeco kaj montriĝas aventurismaj en la agado.

Ideismo kaj mekanika materiismo, oportunismo kaj aventurismo, ĉiuj estas karakterizataj per la disigo de la subjektivo for de la objektivo, per la disigo de konado for de praktiko. La marksism-leninisma teorio de konado karakterizata per scienca socia praktiko ne povas ne decideme kontraŭbatali ĉi tiujn erarajn ideologiojn. Marksistoj rekonas ke en la absoluta totala

procezo de la disvolviĝo de la universo, la disvolviĝo de ĉiu konkreta procezo estas relativa, tial en la senfina fluo de absoluta vero, homa kono pri konkreta procezo en ĉiu donita stadio de disvolviĝo havas nur relativan verecon. La sumo de sennombraj relativaj veroj konsistigas la absolutan veron.[11] La disvolviĝo de la objektiva procezo estas disvolviĝo plena de kontraŭdiroj kaj bataloj, kaj ankaŭ la disvolviĝo de la movado de homa kono estas disvolviĝo plena de kontraŭdiroj kaj bataloj. Ĉiuj dialektikaj movadoj de la objektiva mondo povas frue aŭ malfrue reflektiĝi en la homa kono. La procezo de estiĝo, disvolviĝo kaj malapero en socia praktiko estas senfina, kaj ankaŭ la procezo de estiĝo, disvolviĝo kaj malapero de la homa kono estas senfina. Dum la praktikado por ŝanĝi objektivan realon sur bazo de certaj ideoj, teorioj, planoj aŭ projektoj antaŭeniĝas foje kaj refoje, ankaŭ la homa kono pri la objektiva realo profundiĝas foje kaj refoje. La movado de ŝanĝiĝo de la objektiva reala mondo neniam finiĝos, tial ankaŭ la homa konado pri vero en la praktiko neniam finiĝos. Marksismo-Leninismo neniel finis la veron, sed senhalte malfermas vojon al la konado de vero en la praktiko. Nia konkludo estas la konkreta historia unueco de la subjektivo kaj la objektivo, de teorio kaj praktiko, de scio kaj ago, kaj opono kontraŭ ĉiuj eraraj ideologioj ĉu "maldekstraj" ĉu dekstraj, kiuj disiĝas de konkreta historio.

En la hodiaŭa epoko de socia disvolviĝo, la respondeco de ĝusta kompreno de la mondo kaj reformo de la mondo jam historie falis sur la ŝultrojn de la proletaro kaj ĝia partio. Tiu ĉi procezo de praktiko por reformi la mondon difinita surbaze de scienca kono jam atingis en la mondo kaj en Ĉinio historian momenton, gravan momenton neniam estintan en la historio, por tute renversi la malluman

flankon de la mondo kaj Ĉinio kaj ŝanĝi la mondon en luman mondon senprecedencan. La batalo de la proletaro kaj la revolucia popolo por reformi la mondon ampleksas la plenumon de la jenaj taskoj: reformi la objektivan mondon, kaj ankaŭ reformi sian subjektivan mondon — reformi sian kapablon de konado kaj reformi la rilatojn inter la subjektiva mondo kaj la objektiva mondo. Tia reformo jam efektiviĝis sur parto de la terglobo, nome en Sovetunio. Tie la popolo ankoraŭ antaŭenpuŝas tiun reforman procezon. Ankaŭ la ĉina popolo kaj la popoloj de la tuta mondo estas trapasantaj aŭ trapasontaj tian reforman procezon. La reformata objektiva mondo tie ĉi menciita inkluzivas ĉiujn kontraŭulojn de la reformo, kies reformo devas trairi stadion devigan kaj nur poste povas eniri la stadion konscian. Kiam la tuta homaro konscie reformos sin kaj reformos la mondon, tiam ekestos la komunisma epoko de la mondo.

Eltrovi veron tra praktiko, kaj denove tra praktiko pruvi kaj disvolvi veron. Ekde percepta kono dinamike disvolvi ĝin en racian konon, kaj denove ekde racia kono dinamike direkti revolucian praktikon por reformi la subjektivan mondon kaj la objektivan mondon. Praktiko, konado, denove praktiko, kaj denove konado — tia formo cirkulade ripetiĝas senfine, kaj la enhavo de ĉiu cirkulo de praktiko kaj konado atingas pli altan nivelon. Tio estas la tuta teorio de konado de dialektika materiismo, kaj tio estas la teorio de la unueco de scio kaj ago de dialektika materiismo.

KLARIGOJ

1. V. I. Lenin, "Rimarkoj pri Libro de Hegel *Scienco de Logiko*", parto III, ĉapitro III, "La Ideo". Vd. V. I. Lenin, "Resumo de Libro de Hegel *Scienco de Logiko*" (septembro — decembro de 1914).

2. K. Marks, "Tezoj pri Feuerbach" (printempo de 1845) kaj V. I. Lenin, *Materiismo kaj Empiriokritikismo*, ĉapitro II, sekcio 6 (lasta duonjaro de 1908).

3. V. I. Lenin, "Rimarkoj pri Libro de Hegel *Scienco de Logiko*", parto III, "Subjektiva Logiko kaj pri Koncepto". Vd. V. I. Lenin, "Resumo de Libro de Hegel *Scienco de Logiko*".

4. La Movado de la Tajping-a Ĉiela Regno estis kamparana revolucia movado okazinta en la mezo de la deknaŭa jarcento kontraŭ la feŭda regado kaj nacia subpremado de King-dinastio. En januaro 1851, la gvidantoj de tiu ĉi revolucio Hong Hiukjuan, Jang Hiuking k.a. ekribelis en Gintian-vilaĝo de Gujping-gubernio, Guanghi-provinco kaj deklaris la fondiĝon de la Tajping-a Ĉiela Regno. En 1852 ilia kamparana armeo marŝis norden el Guanghi kaj militprenis la provincojn Hunan kaj Hubej. En 1853 ĝi marŝis tra la provincoj Gianghi kaj Anhuj kaj militprenis Nankinon. Poste parto de la militfortoj estis sendita norden de Nankino kaj atingis la najbaraĵon de Tiangin. Tamen, Tajping-armeo ne starigis firmajn bazojn en la lokoj de ĝi okupitaj; plue, post la establo de la ĉefurbo en Nankino, ĝia gvidanta grupo faris multajn politikajn kaj militajn erarojn. Tial ĝi ne povis kontraŭstari

la kunan atakon de la kontraŭrevoluciaj trupoj de King-dinastio kaj la agresantoj de Britio, Usono kaj Francio, kaj malsukcesis en 1864.

5. Jihetuan-movado estis movado de armita batalo kontraŭ imperiismo, kiu okazis en norda Ĉinio en 1900. Ĝin partoprenis la vastaj amasoj kamparanaj, metiistaj kaj aliaj. Ili interkomunikiĝis unu kun alia per religio kaj superstiĉo, organiziĝis surbaze de sekretaj societoj kaj faris heroan batalon kontraŭ la alianca agresa armeo de ok imperiismaj landoj Usono, Britio, Japanio, Germanio, Rusio, Francio, Italio kaj Aŭstrio. Okupinte Tiangin kaj Pekinon, la alianca agresa armeo de ok landoj kruelege subpremis tiun ĉi movadon.

6. Tio estas la revolucia movado kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, kiu eksplodis en la 4-a de majo 1919. En la unua duonjaro de 1919, la venkintaj landoj en la Unua Mondmilito Britio, Francio, Usono, Japanio kaj Italio okazigis en Parizo rabaĵdividan kunvenon. Ili decidis, ke Japanio transprenu ĉiujn privilegiojn de Germanio en Ŝandong-provinco de Ĉinio. En la 4-a de majo, pekinaj studentoj unuaj okazigis mitingon kaj manifestacion por esprimi sian firman opozicion. La Norda Militarista Registaro faris subpremegon kaj arestis pli ol tridek homojn. Pekinaj studentoj

ĉesigis lernadon por protesti kaj diverslokaj studentoj eĥis unuj post aliaj. Ekde la 3-a de junio, la Norda Militarista Registaro denove faris areston de pli granda skalo en Pekino, arestante ĉirkaŭ mil studentojn en du tagoj. La evento de la 3-a de junio incitis pli grandan indignon de la tutlanda popolo. De la 5-a de junio, laboristoj de Ŝanhajo kaj multaj aliaj lokoj strikis unuj post aliaj, kaj komercistoj ĉesis komerci. La patriota movado antaŭe partoprenata ĉefe de intelektuloj de tiam rapide disvolviĝis en landskalan patriotan movadon partoprenatan de la proletaro, etburĝaro kaj burĝaro. Kune kun la disvolviĝo de la patriota movado, ankaŭ la nova kultura movado opozicii feŭdismon kaj porpledi sciencon kaj demokration komencita antaŭ la "4-a de Majo" disvolviĝis en revolucian kulturan movadon de grandioza skalo kun la propagando de Marksismo-Leninismo kiel la ĉefa fluo.

7. V. I. Lenin, "Rimarkoj pri Libro de Hegel *Scienco de Logiko*" parto III, ĉapitro III, "La Ideo": "Por kompreni, estas necese empirie komenci komprenon, studon, de empirio leviĝi al la ĝenerala." Vd. V. I. Lenin, "Resumo de Libro de Hegel *Scienco de Logiko*".

8. "Kion Fari?" de V. I. Lenin, ĉapitro I, sekcio 4 (aŭtuno de 1901 — februaro de 1902).

9. V. I. Lenin, *Materiismo kaj Empiriokritikismo*, ĉapitro II, sekcio 6.

10. I. V. Stalin, "Pri la Fundamentoj de Leninismo", parto 3, "Teorio" (aprilo — majo de 1924).

11. V. I. Lenin, *Materiismo kaj Empiriokritikismo*, ĉapitro II, sekcio 5.

PRI KONTRAŬDIRO

(Aŭgusto 1937)

La leĝo de kontraŭdiro en objektoj, t.e. la leĝo de la unueco de kontraŭoj, estas la plej fundamenta leĝo de materiisma dialektiko. Lenin diris: "En la propra senco dialektiko estas la studo de kontraŭdiro *en la propra esenco de objektoj*. . ."[1] Lenin ofte nomis tiun ĉi leĝon la esenco de dialektiko; li ankaŭ nomis

---

Tiu ĉi filozofia traktato estis verkita de kamarado Maŭ Zedong post la traktato "Pri Praktiko" kaj kun la sama celo, t.e. por venki la seriozan dogmisman penson tiam ekzistantan en la Partio. Ĝi estis siatempe donita kiel prelego en la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Kolegio en Jan'an. Okaze de ĝia enmetiĝo en tiun ĉi verkaron, la aŭtoro faris iujn kompletigojn, forstrekojn kaj reviziojn.

ĝin la kerno de dialektiko.[2] Tial, kiam ni studas tiun ĉi leĝon, ni ne povas ne tuŝi vastan sferon da temoj, ne povas ne tuŝi multajn filozofiajn problemojn. Se ni akiros klaran konon pri ĉiuj ĉi problemoj, ni plene komprenos materiisman dialektikon. Tiuj problemoj estas: la du mondkonceptoj, la universaleco de kontraŭdiro, la partikulareco de kontraŭdiro, la ĉefa kontraŭdiro kaj la ĉefa flanko de kontraŭdiro, la identeco kaj bataleco de la flankoj de kontraŭdiro, kaj la loko de antagonismo en kontraŭdiro.

Dum la lastaj jaroj, la sovetuniaj filozofiaj rondoj faris kritikojn pri la ideismo de Deborin-skolo,[3] kaj tio vekis ĉe ni grandegan intereson. La ideismo de Deborin estigis malbonegan influon en la Komunista Partio de Ĉinio, kaj oni ne povas diri, ke la dogmisma penso en nia Partio estas senrilata kun la metodologio de tiu skolo. Tial la ĉefa celo de nia filozofia

studado nun devas esti forigi la dogmisman penson.

I. LA DU MONDKONCEPTOJ

En la historio de homa konado de ĉiam troviĝas du konceptoj pri la leĝoj de disvolviĝo de la mondo: la metafizika kaj la dialektika, kiuj formas du mondkoncептojn kontraŭajn unu al la alia. Lenin diris:

> La du fundamentaj (aŭ du eblaj? aŭ du historie observeblaj?) konceptoj de disvolviĝo (evoluo) estas: disvolviĝo kiel malpliiĝo kaj pliiĝo, kiel ripetiĝo, *kaj* disvolviĝo kiel unueco de kontraŭoj (la dividiĝo de unuecaĵo en du reciproke ekskluzivajn kontraŭojn kaj la reciproka rilato inter ili).[4]

Ĉi tie Lenin parolis ĝuste pri tiuj du malsamaj mondkonceptoj.

En Ĉinio alia nomo de metafiziko estas *ŝjuanŝjue*. Ĉu en Ĉinio, ĉu en Eŭropo,

tiu pensmaniero, dum tre longa historia periodo, estis propra al la ideisma mondkoncepto kaj okupis regantan pozicion en homa penso. En Eŭropo, ankaŭ la materiismo de la burĝaro en ĝia komenca periodo estis metafizika. Ĉar la socia ekonomio en multaj eŭropaj landoj eniris la etapon de alte disvolviĝinta kapitalismo, la produktaj fortoj, la klasbatalo kaj la scienco atingis nivelon senprecedencan en la historio kaj la industria proletaro fariĝis la plej granda movforto de la disvolviĝo de la historio, tial naskiĝis la marksisma materiism-dialektika mondkoncepto. Tiam, ĉe la burĝaro, krom la reakcia ideismo, publika kaj tute ne maskita, ekaperis ankaŭ vulgara evoluismo por kontraŭstari la materiisman dialektikon.

La metafizika mondkoncepto aŭ la mondkoncepto de vulgara evoluismo observas la mondon per izola, statika kaj unuflanka vidpunkto. Tiu ĉi mondkoncepto rigardas ĉiujn objektojn en la mondo, iliajn for-

mojn kaj specojn kiel ĉiam izolitajn unu de alia kaj ĉiam senŝanĝajn. Se ŝanĝo okazas, tio estas nur pliiĝo aŭ malpliiĝo de kvanto aŭ ŝanĝo de loko. Cetere, la kaŭzo de tiu pliiĝo aŭ malpliiĝo aŭ ŝanĝo de loko kuŝas ne interne de la objektoj mem sed ekster ili, t.e. en la puŝado de ekstera forto. Metafizikistoj opinias, ke la diversaj objektoj en la mondo kaj iliaj karakterizoj restas senŝanĝaj ekde la komenco de sia ekzistado, kaj ke la postaj ŝanĝoj estas nur kvanta pligrandiĝo aŭ malpligrandiĝo. Ili opinias, ke unu objekto ĉiam povas nur ripete reprodukti la samspecan objekton kaj ne povas sin ŝanĝi en alian, malsaman objekton. Laŭ la opinio de metafizikistoj, la kapitalisma ekspluato, la kapitalisma konkurenco, la individuisma ideologio en kapitalisma socio ktp., ĉiuj povas esti trovataj en la antikva sklava socio kaj eĉ en la primitiva socio kaj ekzistos por ĉiam senŝanĝe. Parolante pri la kaŭzo de disvolviĝo de la socio, ili kla-

rigas tion per la kondiĉoj de geografio, klimato ktp., ekzistantaj ekster la socio. Ili simple serĉas ekster la objekto la kaŭzon de la disvolviĝo kaj neas la teorion de materiisma dialektiko, kiu porpledas, ke disvolviĝon kaŭzas la kontraŭdiroj interne de la objekto. Tial ili ne povas klarigi la diversecon de kvalitoj de objektoj, nek la ŝanĝiĝon de unu kvalito en alian. En Eŭropo, tiu pensmaniero ekzistis kiel mekanika materiismo dum la 17-a kaj 18-a jarcentoj kaj kiel vulgara evoluismo fine de la 19-a jarcento kaj komence de la 20-a. En Ĉinio, la metafizika pensmaniero, esprimita per la vortoj "La ĉielo neniam ŝanĝiĝas, nek la *daŭ*",[5] estis longtempe subtenata de la putra feŭda reganta klaso. Mekanika materiismo kaj vulgara evoluismo, importitaj el Eŭropo en la lastaj cent jaroj, estas subtenataj de la burĝaro.

Kontraŭe al la metafizika mondkoncepto, la materiism-dialektika mondkoncepto pledas por studi la disvolviĝon de objekto

de ĝia interno kaj de ĝiaj rilatoj kun aliaj objektoj, t.e. konsideri la disvolviĝon de objekto kiel ĝian meman movadon internan kaj nepran kaj konsideri ke ĉiu objekto en sia movado interligiĝas kaj interagas kun aliaj objektoj, kiuj ĝin ĉirkaŭas. La fundamenta kaŭzo de la disvolviĝo de objekto ne kuŝas ekstere, sed interne de ĝi, en ĝia interna kontraŭdireco. Tiu kontraŭdireco ekzistas interne de ĉia ajn objekto kaj tial kaŭzas ĝiajn movadon kaj disvolviĝon. Tiu kontraŭdireco interne de objekto estas la fundamenta kaŭzo de ĝia disvolviĝo, dum la interligiĝo kaj interago inter ĝi kaj aliaj objektoj estas kaŭzo duavica. Tiamaniere, materiisma dialektiko forte rebatas la teorion de eksteraj kaŭzoj aŭ de ekstera puŝado, prezentitan de metafizikaj mekanika materiismo kaj vulgara evoluismo. Estas evidente, ke pure eksteraj kaŭzoj povas estigi nur mekanikan movadon de objekto, nome la ŝanĝojn en amplekso kaj kvanto, sed ne povas klarigi, kial ob-

jektoj estas kvalite senfine diversaj kaj kial unu objekto ŝanĝiĝas en alian. Fakte, eĉ mekanika movado puŝata de ekstera forto ankaŭ okazas pere de la kontraŭdireco interne de objekto. Ankaŭ la simpla kreskado de plantoj kaj animaloj kaj la disvolviĝo de ilia kvanto rezultas ĉefe el iliaj internaj kontraŭdiroj. Tiel same, la disvolviĝo de socio rezultas ĉefe ne el la eksteraj, sed el la internaj kaŭzoj. Multaj landoj, troviĝantaj en preskaŭ samaj geografiaj kaj klimataj kondiĉoj, estas ege malsamaj kaj neegalaj en sia disvolviĝo. Grandegaj sociaj ŝanĝoj okazas eĉ en unu sama lando, kvankam ĝiaj geografio kaj klimato restas senŝanĝaj. La imperiisma Rusio fariĝis la socialisma Sovetunio, kaj la feŭda Japanio kun ŝlositaj pordoj fariĝis la imperiisma Japanio, kvankam la geografio kaj klimato de tiuj landoj neniom ŝanĝiĝis. Ĉinio, longtempe regata de feŭda sistemo, ege ŝanĝiĝis en la lastaj cent jaroj kaj nun ŝanĝiĝas en la

direkto al nova Ĉinio, libera kaj emancipita, kvankam ĝiaj geografio kaj klimato restas senŝanĝaj. Ŝanĝoj ankaŭ okazas en la geografio kaj klimato de la tuta terglobo kaj de ĝiaj diversaj partoj, sed kompare kun la ŝanĝoj de la socio tiuj ŝanĝoj estas tre malgrandaj; geografiaj kaj klimataj ŝanĝoj apenaŭ elmontriĝas en dekmiloj da jaroj, dum sociaj ŝanĝoj jam montriĝas en miloj, centoj aŭ dekoj da jaroj, kaj eĉ en kelkaj jaroj aŭ monatoj (en la periodo de revolucio). Laŭ la vidpunkto de materiisma dialektiko, la ŝanĝoj en naturo rezultas ĉefe el la disvolviĝo de internaj kontraŭdiroj en naturo. La ŝanĝoj en socio rezultas ĉefe el la disvolviĝo de internaj kontraŭdiroj en socio, nome la kontraŭdiro inter la produktaj fortoj kaj la produktaj rilatoj, la kontraŭdiro inter klasoj kaj la kontraŭdiro inter la nova kaj la malnova; la disvolviĝo de tiuj kontraŭdiroj puŝas socion antaŭen kaj antaŭenpuŝas la anstataŭon de la mal-

nova socio fare de la nova. Ĉu materiisma dialektiko ekskluzivas eksterajn kaŭzojn? Neniel. Materiisma dialektiko konsideras, ke eksteraj kaŭzoj estas la kondiĉo de ŝanĝo kaj internaj kaŭzoj estas la bazo de ŝanĝo, kaj ke eksteraj kaŭzoj efikas nur pere de la internaj. Ovo fariĝas kokido en konvena temperaturo, sed nenia temperaturo povas fari ŝtonon kokido, ĉar ĉi tiuj du ne havas la saman bazon. Reciproka influo ĉiam ekzistas inter la diverslandaj popoloj. En la epoko de kapitalismo, precipe en la epoko de imperiismo kaj proletara revolucio, estas ekstreme grandaj la reciproka influo kaj reciproka stimulo de la diversaj landoj en politiko, ekonomio kaj kulturo. La Oktobra Socialisma Revolucio malfermis novan eraon ne nur en la historio de Rusio, sed ankaŭ en la historio de la tuta mondo, ĝi influis la internajn ŝanĝojn en diversaj landoj de la mondo kaj, sammaniere kaj speciale profunde, la internajn ŝanĝojn

en Ĉinio, tamen tiuj ŝanĝoj okazis pere de la propraj leĝoj internaj de la diversaj landoj kaj de Ĉinio respektive. Du armeoj interbatalas, unu venkas kaj la alia malvenkas; la venko kaj la malvenko ambaŭ estas deciditaj de internaj kaŭzoj. Unu venkas aŭ pro sia forteco aŭ pro sia ĝusta komando, dum la alia malvenkas aŭ pro sia malforteco aŭ pro sia malĝusta komando; la eksteraj kaŭzoj efikas pere de la internaj. En 1927, en Ĉinio la venko super la proletaro fare de la egburĝaro efikiĝis pere de la oportunismo tiam ekzistanta interne de la ĉina proletaro (interne de la Komunista Partio de Ĉinio). Kiam ni likvidis tiun oportunismon, la ĉina revolucio denove disvolviĝis. Poste, la ĉina revolucio ree suferis severajn batojn de la malamiko, ĉar aperis aventurismo en nia Partio. Kiam ni likvidis tiun aventurismon, nia afero denove disvolviĝis. El tio oni povas vidi ke, por konduki la revolucion al triumfo, politika partio devas

sin apogi sur la ĝusteco de sia politika linio kaj sur la firmeco de sia organizo.

Jam en la antikveco la dialektika mondkoncepto naskiĝis kaj en Ĉinio kaj en Eŭropo. Sed antikva dialektiko havis en si spontanan kaj primitivan karakteron; laŭ la tiamaj sociaj kaj historiaj kondiĉoj, ĝi ankoraŭ ne povis formi kompletan teorion, sekve ĝi ne povis fari plenan klarigon pri la mondo kaj poste estis anstataŭita de metafiziko. Hegel, fama germana filozofo, kiu vivis en la fina periodo de la 18-a jarcento kaj la komenca periodo de la 19-a, faris tre gravan kontribuon al dialektiko, sed lia dialektiko estas ideisma. Nur kiam Marks kaj Engels, la grandaj aktivuloj de la proletara movado, resumis la pozitivajn atingojn en la historio de homa konado kaj, precipe, sorbis kritike la raciajn elementojn de la dialektiko de Hegel kaj kreis la grandan teorion de dialektika kaj historia materiismo, tiam okazis en la historio de homa konado sen-

precedence granda revolucio. Poste, tiu granda teorio estis plue disvolvita de Lenin kaj Stalin. Enkondukite en Ĉinion, ĝi tuj estigis grandegajn ŝanĝojn en la rondoj de penso en Ĉinio.

Tiu dialektika mondkoncepto ĉefe instruas onin scipovi observi kaj analizi la movadon de kontraŭdiroj en diversaj objektoj kaj, surbaze de tiu analizo, elmontri rimedojn por solvi kontraŭdirojn. Tial, tre gravas por ni konkrete kompreni la leĝon de kontraŭdiro en objektoj.

II. LA UNIVERSALECO DE KONTRAŬDIRO

Por faciligi la eksponadon, ĉi tie mi traktos unue la universalecon de kontraŭdiro kaj poste ĝian partikularecon. Ĉar Marks, Engels, Lenin kaj Stalin, la grandaj kreintoj kaj heredantoj de Marksismo, eltrovis la materiism-dialektikan mondkoncepton kaj jam aplikis kun treege granda sukceso

la materiisman dialektikon al multaj sferoj en la analizado de la homa historio kaj natura historio kaj al multaj sferoj en la transformado de socio kaj naturo (ekzemple, en Sovetunio), la universaleco de kontraŭdiro estas jam rekonata de multaj homoj, kaj tial tiu problemo estas klarigebla nur per malmultaj vortoj; sed la problemo pri la partikulareco de kontraŭdiro ankoraŭ restas neklara por tre multaj kamaradoj, precipe por la dogmistoj. Ili ne komprenas, ke la universaleco de kontraŭdiro ekzistas ĝuste en ĝia partikulareco. Ili ne komprenas ankaŭ, kian gravan signifon havas la studo pri la partikulareco de kontraŭdiro en la aktualaj konkretaj objektoj por nia direktado de la disvolviĝo de revolucia praktiko. Tial, ni devas emfazi la studon pri la problemo de la partikulareco de kontraŭdiro kaj ĝin klarigi per sufiĉe da paĝoj. Pro tio, analizante la leĝon de kontraŭdiro en objektoj, ni komencos per la problemo pri la universaleco

de kontraŭdiro, poste ni turnos nin kun speciala atento al la problemo pri ĝia partikulareco kaj fine revenos denove al la problemo pri ĝia universaleco.

La problemo pri la universaleco aŭ absoluteco de kontraŭdiro havas duoblan signifon. Unu estas ke kontraŭdiro ekzistas en la procezo de disvolviĝo de ĉiuj objektoj; la alia estas ke en la procezo de disvolviĝo de ĉiu objekto ekzistas movado de kontraŭdiroj de la komenco ĝis la fino.

Engels diris: "Movado mem estas kontraŭdiro."[6] Lenin difinis la leĝon de la unueco de kontraŭoj, dirante, ke ĝi estas " . . . la rekono (eltrovo) de la kontraŭdiraj, *reciproke ekskluzivaj*, kontraŭstaraj tendencoj en *ĉiuj* fenomenoj kaj procezoj de naturo (*inkluzive* de menso kaj socio)".[7] Ĉu tiuj opinioj estas pravaj? Jes, ili estas pravaj. La interdependado kaj interbatalado de la kontraŭdiraj flankoj entenataj de ĉiuj objektoj determinas la vivon de ĉiuj objektoj kaj antaŭenpuŝas ilian disvolviĝon. Neniu objekto ne havas en si kontraŭdiron; sen kontraŭdiro ne ekzistus la mondo.

Kontraŭdiro estas la bazo de simplaj movadformoj (ekzemple, mekanika movado) kaj tiom pli la bazo de kompleksaj movadformoj.

Engels klarigis la universalecon de kontraŭdiro jene:

> Se simpla mekanika translokiĝo entenas kontraŭdiron, tiom pli ĝin entenas la pli superaj movadformoj de materio, kaj precipe organika vivo kaj ĝia disvolviĝo. . . . vivo, antaŭ ĉio, konsistas precize en tio, ke viva estaĵo en ĉiu momento estas si mem kaj tamen io alia. Sekve, ankaŭ vivo estas kontraŭdiro kiu ekzistas en objektoj kaj procezoj mem kaj konstante estiĝas kaj solviĝas per si mem; kaj tuj kiam la kontraŭdiro ĉesas, ĉesas ankaŭ la vivo, kaj alvenas la morto. Ni same vidis, ke ankaŭ en la sfero de penso ni ne povas eviti kontraŭdirojn, kaj ke, ek-

zemple, la kontraŭdiro inter la homa interne senlima kapablo de konado kaj ĝia efektiva realigo nur ĉe individuaj personoj, kiuj estas ekstere limigitaj kaj havas limigitan konon, solviĝas en senfina — almenaŭ praktike por ni — sinsekvado de generacioj, en senfina progresado.

. . . unu el la ĉefaj bazoj de supera matematiko estas la kontraŭdiro . . .

Sed eĉ elementa matematiko estas plena de kontraŭdiroj.[8]

Ankaŭ Lenin klarigis la universalecon de kontraŭdiro jene:

En matematiko: + kaj —. Diferencialo kaj integralo.

En mekaniko: ago kaj reago.

En fiziko: pozitiva kaj negativa elektro.

En kemio: la kombino kaj malkomponо de atomoj.

En socia scienco: la klasa batalo.[9]

En milito, ofensivo kaj defensivo, antaŭenmarŝo kaj retiriĝo, venko kaj malvenko, ĉiuj estas kontraŭdiraj fenomenoj. Sen unu

flanko ne povas ekzisti la alia. La du flankoj, interbatalantaj kaj interligitaj, konsistigas la tuton de milito, antaŭenpuŝas disvolviĝon de milito kaj solvas problemon de milito.

Ĉiu diferenco en homaj konceptoj devas esti rigardata kiel reflekto de objektiva kontraŭdiro. Objektivaj kontraŭdiroj, spegulitaj en subjektiva penso, formas la movadon de kontraŭdiroj en konceptoj, kiu antaŭenpuŝas la disvolviĝon de penso kaj senĉese solvas problemojn de homa penso.

Kontraŭstaro kaj batalo inter malsamaj ideoj en la Partio konstante okazas, tio estas reflekto interne de la Partio de kontraŭdiroj inter la klasoj en la socio kaj inter nova kaj malnova aferoj. Se en la Partio ne estus kontraŭdiroj kaj ideologiaj bataloj por solvi tiujn kontraŭdirojn, do la vivo de la Partio ĉesus.

Sekve, estas jam klare, ke kontraŭdiro ekzistas universale kaj en ĉiuj procezoj,

ĉu en la simplaj ĉu en la kompleksaj movadformoj, ĉu en objektivaj ĉu en ideologiaj fenomenoj. Sed ĉu kontraŭdiro ekzistas ankaŭ en la komenca etapo de ĉiu procezo? Ĉu estas movado de kontraŭdiroj, de la komenco ĝis la fino, en la procezo de disvolviĝo de ĉiu objekto?

El la artikoloj, en kiuj la sovetiaj filozofiaj rondoj kritikas Deborin-skolon, ni povas vidi ke tiu ĉi skolo havas tian opinion, ke kontraŭdiro aperas ne tuj kiam la procezo komenciĝas, sed nur kiam ĝi estas disvolviĝinta ĝis certa etapo. Do, antaŭ tiu etapo, la procezo disvolviĝas ne pro internaj kaŭzoj, sed pro kaŭzoj eksteraj. Tiamaniere Deborin revenas al la metafizikaj teorioj de eksteraj kaŭzoj kaj de mekaniko. Analizante konkretajn problemojn laŭ tiu vidpunkto, Deborin-skolo vidas, ke sub la kondiĉoj de Sovetunio estas nur diferencoj, sed ne kontraŭdiroj inter la kulakoj kaj la kamparanoj en ĝeneralo, kaj plene konsentas la opi-

nion de Buĥarin.[10] Analizante la Francan Revolucion, tiu skolo opinias, ke antaŭ tiu revolucio ekzistis nur diferencoj, sed ne kontraŭdiroj en la Tria Klaso kiu konsistis el laboristoj, kamparanoj kaj burĝaro. Tiuj opinioj de Deborin-skolo estas kontraŭmarksismaj. Tiu skolo ne komprenas, ke ĉiu diferenco en la mondo jam enhavas kontraŭdiron kaj ke diferenco mem estas kontraŭdiro. Laboro kaj kapitalo jam troviĝas en kontraŭdiro ekde la naskiĝo de la du klasoj, nur komence la kontraŭdiro ankoraŭ ne akriĝis. Eĉ sub la sociaj kondiĉoj de Sovetunio diferenco ekzistas inter la laboristoj kaj kamparanoj; tiu diferenco ja estas kontraŭdiro, sed, malsame al la kontraŭdiro inter laboro kaj kapitalo, ĝi ne intensiĝos en antagonismon kaj ne prenos la formon de klasbatalo; en la socialisma konstruado, la laboristoj kaj kamparanoj formis firman aliancon kaj solvas iom post iom tiun kontraŭdiron dum la procezo de disvol-

viĝo de socialismo al komunismo. Ĉi tie la problemo temas pri la karaktera diferenco de kontraŭdiroj, kaj ne pri la ekzisto aŭ neekzisto de kontraŭdiroj. Kontraŭdiro estas universala kaj absoluta, ekzistas en ĉiuj procezoj de la disvolviĝo de objektoj kaj trairas ĉiujn procezojn de la komenco ĝis la fino.

Kion signifas la estiĝo de nova procezo? Ĝi signifas, ke la malnova unueco kaj ties konsistigaj kontraŭstaraj elementoj cedas lokon al nova unueco kaj ties konsistigaj kontraŭstaraj elementoj, tiel ke nova procezo estiĝas anstataŭ la malnova. La malnova procezo finiĝas kaj la nova estiĝas. La nova procezo entenas novajn kontraŭdirojn kaj komencas sian propran historion de la disvolviĝo de kontraŭdiroj.

Lenin montris, ke Marks donis en sia *Kapitalo* modelan analizon pri la movado de kontraŭdiroj kiu trairas la tutan procezon de disvolviĝo de objektoj de la komenco ĝis la fino. Tio estas la metodo

aplikenda en la studo pri la procezo de disvolviĝo de ĉiu ajn objekto. Ankaŭ Lenin mem ĝin aplikis ĝuste kaj praktikis ĝin en sia tuta verkaro.

En sia *Kapitalo* Marks unue analizas la plej simplan, ordinaran, fundamentan, la plej oftevideblan, ĉiutagan, miliardfoje renkontatan *rilaton* de burĝara (komercaĵa) socio: la interŝanĝon de komercaĵoj. La analizo malkovras en tiu ĉi plej simpla fenomeno (en tiu ĉi "ĉelo" de burĝara socio) *ĉiujn* kontraŭdirojn (aŭ la ĝermojn de *ĉiuj* kontraŭdiroj) de la moderna socio. La posta rakontado montras al ni la disvolviĝon (*kaj* kreskadon *kaj* movadon) de tiuj ĉi kontraŭdiroj kaj de tiu ĉi socio, en la Σ [sumo] de ĝiaj apartaj partoj, de ĝia komenco ĝis ĝia fino.

Post tio, Lenin aldonis: "Tia devas esti la metodo de rakontado (aŭ studo) de dialektiko en ĝeneralo. . ."[11]

Ĉinaj komunistoj devas ellerni tiun ĉi metodon; nur tiam ili povos ĝuste analizi

la historion kaj nunan staton de la ĉina revolucio kaj dedukti ĝian estontecon.

III. LA PARTIKULARECO DE KONTRAŬDIRO

Kiel supre dirite, la universaleco kaj absoluteco de kontraŭdiro kuŝas en tio, ke kontraŭdiro ekzistas en la procezo de disvolviĝo de ĉiuj objektoj kaj trairas la procezon de disvolviĝo de ĉiu objekto de la komenco ĝis la fino. Nun ni pritraktu la partikularecon kaj relativecon de kontraŭdiro.

Tiu ĉi problemo devas esti studata en pluraj kazoj.

Antaŭ ĉio, la kontraŭdiro en ĉiu movadformo de materio havas sian partikularecon. La homa kono pri materio estas kono pri ĝiaj movadformoj, ĉar troviĝas nenio en la mondo krom materio en movado kaj cetere tiu ĉi movado nepre prenas certajn formojn. Koncerne al ĉiu movadformo de materio, ni devas atenti la komunajn punktojn, kiujn ĝi havas kun aliaj diversaj movadformoj. Sed tio, kio des pli gravas kaj formas la bazon de nia kono pri objektoj, estas, ke ni devas atenti partikularajn punktojn de tiu ĉi movadformo, nome la kvalitan diferencon inter tiu ĉi kaj aliaj movadformoj. Nur kiam ni tion faras, ni povas distingi objektojn. Ĉiu ajn movadformo havas en si propran partikularan kontraŭdiron. Tiu partikulara kontraŭdiro konsistigas la partikularan esencon kiu distingas unu objekton de la aliaj. Tio estas la interna kaŭzo aŭ, alinome, la bazo de miloj kaj miloj da diferencoj inter objektoj en la mondo. En la naturo troviĝas multaj movadformoj: mekanika movado, sonado, lumado, varmado, kurento, malkompono, kombino ktp. Ĉiuj tiuj movadformoj de materio reciproke dependas inter si, sed esence ili diferencas unu de alia. La partikulara esenco de ĉiu movadformo de materio estas

determinita de la partikulara kontraŭdiro propra al tiu formo. Tiu stato ekzistas ne nur en la naturo, sed ankaŭ en la sociaj kaj ideologiaj fenomenoj. Ĉiu formo de socio kaj ĉiu formo de ideologio havas siajn partikularan kontraŭdiron kaj partikularan esencon.

La sciencaj studoj estas klasifikitaj ĝuste surbaze de la partikularaj kontraŭdiroj kiujn enhavas la respektivaj stud-objektoj. Tial, certa kontraŭdiro propra al la sfero de certa fenomeno konsistigas la stud-objekton de certa branĉo de scienco. Ekzemple, pozitivaj nombroj kaj negativaj nombroj en matematiko; ago kaj reago en mekaniko; negativa kaj pozitiva elektro en fiziko; malkompono kaj kombino en kemio; produktaj fortoj kaj produktaj rilatoj, reciproka batalo inter klaso kaj klaso, en socia scienco; ofensivo kaj defensivo en milita scienco; ideismo kaj materiismo, la metafizika koncepto kaj la dialektika koncepto en filozofio; ktp. — ĉar ili

ĉiuj havas siajn partikularan kontraŭdiron kaj partikularan esencon, ili konsistigas la stud-objektojn de malsamaj branĉoj de scienco. Kompreneble, se ni ne konas la universalecon de kontraŭdiro, ni neniel povas eltrovi la universalan kaŭzon aŭ universalan bazon de la movado, la disvolviĝo de objektoj; sed, se ni ne studas la partikularecon de kontraŭdiro, ni neniel povas determini la partikularan esencon per kiu unu objekto diferencas de la aliaj, nek eltrovi la partikularan kaŭzon aŭ partikularan bazon de la movado, la disvolviĝo de objektoj, nek distingi unu objekton de alia, nek klasifiki la sferojn de scienca studo.

Koncerne al la sinsekvo en la movado de homa konado, la kono ĉiam pliamplekSiĝas laŭgrade de la kono pri individuaj kaj partikularaj objektoj al la kono pri objektoj en ĝeneralo. Oni ĉiam konas antaŭ ĉio la partikularan esencon de multaj malsamaj objektoj kaj poste povas iri

pluen al ĝeneraligo kaj koni la komunan esencon de objektoj. Koninte tiun komunan esencon, oni povas, sub la gvido de tiu komuna kono, plue studi diversajn konkretajn objektojn, kiuj ankoraŭ ne estas studitaj aŭ ne estas profunde studitaj, kaj eltrovi iliajn partikularajn esencojn; nur tiamaniere oni povas kompletigi, riĉigi kaj disvolvi la konon de tiu komuna esenco kaj ne lasi tiun konon fariĝi io seka kaj morta. Tiuj estas la du procezoj de konado: unu iras de la partikulara al la ĝenerala, kaj la alia, de la ĝenerala al la partikulara. La homa kono antaŭeniras ĉiam en cikloj, kaj ĉiu ciklo povas levi la homan konon unu ŝtupon pli alten kaj konstante ĝin pli profundigi (se nur oni severe observas la sciencan metodon). La eraro de niaj dogmistoj en tiu ĉi problemo estas ke, unuflanke, ili ne komprenas, ke ni devas studi la partikularecon de kontraŭdiro kaj koni la partikularan esencon de individuaj objektoj, antaŭ ol ni povas plene koni la universalecon de

kontraŭdiro kaj la komunan esencon de objektoj, kaj, aliflanke, ili ne komprenas ke, koninte la komunan esencon de objektoj, ni ankoraŭ devas daŭre studi tiujn konkretajn objektojn kiuj ankoraŭ ne estas profunde studitaj aŭ estas nove aperintaj. Niaj dogmistoj estas maldiligentuloj; ili rifuzas fari ian ajn penigan studon pri konkretaj objektoj, ili rigardas ĝeneralan veron kiel ion aperintan el nenio, turnas ĝin en pure abstraktan formulon nepalpeblan kaj tiel tute neas kaj renversas la normalan ordon laŭ kiu homo konas veron. Ili ankaŭ ne komprenas la interligiĝon de la du procezoj de la homa konado: de la partikulara al la ĝenerala kaj de la ĝenerala al la partikulara; ili tute ne komprenas la marksisman teorion de konado.

Estas necese studi ne nur la partikularajn kontraŭdirojn de movadformoj de materio de ĉiu granda sistemo kaj la esencon determinitan de tiuj kontraŭdiroj, sed ankaŭ la partikularan kontraŭdiron kaj la esencon

de ĉiu procezo en la longa vojo de disvolviĝo de ĉiu movadformo de materio. Ĉiuj movadformoj en ĉiu reala kaj neimaga procezo de disvolviĝo estas kvalite malsamaj. Nia studado devas substreki tiun ĉi punkton kaj komenciĝi de ĝi.

Kvalite malsamaj kontraŭdiroj povas esti solvataj nur per kvalite malsamaj metodoj. Ekzemple, la kontraŭdiro inter la proletaro kaj la burĝaro estas solvata per la metodo de socialisma revolucio; la kontraŭdiro inter la vastaj popolamasoj kaj la feŭda sistemo estas solvata per la metodo de demokratia revolucio; la kontraŭdiro inter la kolonioj kaj imperiismo estas solvata per la metodo de nacia revolucia milito; la kontraŭdiro inter la laborista klaso kaj la kamparanaro en socialisma socio estas solvata per la metodo de kolektivigo kaj mekanikigo de la agrikulturo; la kontraŭdiro interne de la Komunista Partio estas solvata per la metodo de kritiko kaj memkritiko; la kontraŭdiro inter la socio kaj la naturo estas solvata per la me-

todo de disvolvado de la produktaj fortoj. Procezoj ŝanĝiĝas, malnovaj procezoj kaj malnovaj kontraŭdiroj malaperas, novaj procezoj kaj novaj kontraŭdiroj aperas, ankaŭ la metodoj por solvi kontraŭdirojn konsekvence ŝanĝiĝas. Estis radikala diferenco inter la kontraŭdiroj solvitaj de la Februara Revolucio kaj de la Oktobra Revolucio en Rusio kaj ankaŭ inter la metodoj uzitaj por ilin solvi. Uzi malsamajn metodojn por solvi malsamajn kontraŭdirojn estas principo kiun marksist-leninistoj devas severe observi. La dogmistoj ne observas tiun principon; ili ne komprenas la diferencojn inter diversaj revoluciaj situacioj kaj sekve ne komprenas, ke malsamaj metodoj devas esti uzataj por solvi malsamajn kontraŭdirojn, ili nur senvarie uzas unu formulon, kiun ili opinias neŝanĝebla, kaj mekanike ĝin aplikas ĉie; tio povas konduki la revolucion nur al malsukceso aŭ tute fuŝas la aferon kiu povus esti bone farita.

Por malkovri la partikularecon de la kontraŭdiroj dum la procezo de disvolviĝo de objekto en ilia totaleco, en ilia interligiĝo, t.e. por malkovri la esencon de la procezo de disvolviĝo de objekto, estas necese malkovri la partikularecon de ĉiuj flankoj de la kontraŭdiroj en la procezo; alie estas neeble malkovri la esencon de la procezo. Ankaŭ tio devas esti multe atentata de ni en la studado.

Ĉiu granda objekto enhavas multajn kontraŭdirojn en la procezo de sia disvolviĝo. Ekzemple, en la procezo de la burĝara demokratia revolucio de Ĉinio ekzistas la kontraŭdiro inter la diversaj subpremataj klasoj de ĉina socio kaj imperiismo, la kontraŭdiro inter la vastaj popolamasoj kaj la feŭda sistemo, la kontraŭdiro inter la proletaro kaj la burĝaro, la kontraŭdiro inter la kamparanaro kaj la urba etburĝaro en unu flanko kaj la burĝaro en la alia, la kontraŭdiro inter la diversaj reakciaj regantaj grupoj, ktp., kaj la stato estas tre komplika. Ne nur ĉiuj

tiuj kontraŭdiroj havas respektive sian propran partikularecon kaj ne povas esti sammaniere traktataj, sed ankaŭ la du flankoj de ĉiu kontraŭdiro havas respektive siajn proprajn trajtojn kaj ankaŭ ne povas esti sammaniere traktataj. Ni, kiuj okupiĝas pri la ĉina revolucio, ne nur devas kompreni la partikularecon de la kontraŭdiroj en ilia totaleco, t.e. en ilia interligiĝo, sed ankaŭ devas studi ĉiun el iliaj diversaj flankoj, kaj nur tiamaniere ni povas kompreni ilian totalecon. Kompreni ĉiun el la flankoj de kontraŭdiro signifas kompreni, kian specialan pozicion okupas ĉiu flanko, kian konkretan formon ĝi prenas en la rilato de interdependado kaj kontraŭdirado kun la kontraŭa flanko, kaj kian konkretan rimedon ĝi prenas en la batalo kontraŭ la kontraŭa flanko dum iliaj interdependado kaj kontraŭdirado kaj post la rompiĝo de ilia interdependado. La studo pri tiuj demandoj estas ege grava. Lenin esprimis ĝuste tiun saman ideon, kiam li diris, ke la pleja

esenco, la vivanta animo de Marksismo, estas la konkreta analizo de konkreta situacio.[12] Malobservante la instruon de Lenin, niaj dogmistoj neniam cerbumas por analizi ian ajn objekton konkrete, sed ĉiam plenigas siajn skribaĵojn aŭ paroladojn per stereotipaj, senenhavaj kaj malplenaj vortoj kaj kreas per tio tre malbonan laborstilon en nia Partio.

En studo de problemo, oni devas eviti subjektivecon, unuflankecon kaj supraĵecon. Subjektiveco signifas ne scii rigardi problemon objektive, t.e. ne scii rigardi problemon el la materiisma vidpunkto. Pri tio mi jam parolis en mia artikolo "Pri Praktiko". Unuflankeco signifas ne scii rigardi problemon ĉiuflanke. Ekzemple, kompreni nur Ĉinion sed ne Japanion, nur la Komunistan Partion sed ne Kuomintangon, nur la proletaron sed ne la burĝaron, nur la kamparanojn sed ne la bienulojn, nur la favorajn kondiĉojn sed ne la malfacilajn, nur la pasintecon sed ne la estontecon, nur

la parton sed ne la tuton, nur la difektojn sed ne la atingojn, nur la akuzanton sed ne la akuzaton, nur la sekretan revolucian laboron sed ne la malkaŝan revolucian laboron, ktp. Unuvorte, ne kompreni la karakterizajn trajtojn de ambaŭ flankoj de kontraŭdiro. Tio estas nomata rigardi problemon unuflanke, aŭ vidi nur la parton sed ne la tuton, vidi nur la arbojn sed ne la arbaron. Tiamaniere estas neeble trovi la metodojn por solvi kontraŭdirojn, estas neeble plenumi la taskojn de la revolucio, estas neeble bone fari komisiitajn laborojn, kaj estas neeble disvolvi ĝuste la ideologian batalon en la Partio. Traktante pri milita scienco, Sun Zi diris: "Konu la malamikon kaj konu vin mem, kaj vi povas fari cent batalojn sen malsukceso."[13] Li aludis al ambaŭ flankoj en batalo. Vej Ĝeng de Tang-dinastio diris: "Aŭdi de ambaŭ flankoj faras la okulojn klaraj, kredi je unu flanko faras la vidon nebula."[14] Ankaŭ li komprenis, ke unuflankeco estas malprava.

Sed niaj kamaradoj ofte rigardas problemojn unuflanke, kaj tiel ili ofte kolizias kun obstakloj. En la romano *Ĉe la Akvobordo*, Song Giang trifoje atakis Ĝugiaĝuang,[15] sed du fojojn malsukcesis pro tio, ke li malbone konis la situacion kaj uzis erarajn metodojn. Poste li ŝanĝis siajn metodojn kaj esploris unuė la situacion, tiel li sukcesis koni la labirintajn vojojn, rompis la aliancon inter Ligiaĝuang, Hugiaĝuang kaj Ĝugiaĝuang kaj embuskigis siajn soldatojn en la tendaro de la malamiko, laŭ la taktiko simila al tiu de la Ĉevalo de Trojo[16] en la eksterlanda rakonto, kaj fine li venkis en la tria batalo. En la romano *Ĉe la Akvobordo* estas multaj ekzemploj de materiismа dialektiko, el kiuj la plej bona estas tiu pri la tri atakoj kontraŭ Ĝugiaĝuang. Lenin diris:

> Por efektive koni objekton estas necese kapti, studi ĉiujn ĝiajn flankojn, ĉiujn interligojn kaj "peradojn". Ni neniam atingos tion plene, sed la postulo pri ĉiuflankeco gardas nin kontraŭ eraroj kaj rigidiĝo.[17]

Ni devas noti liajn vortojn en la memoro. Suprajeco signifas ke oni ne konsideras la karakterizajn trajtojn de kontraŭdiroj en ilia totaleco nek tiujn de ĉiu el iliaj flankoj, neas la neceson penetri profunde en la objekton kaj studi detale la karakterizajn trajtojn de la kontraŭdiroj, kaj, nur post ekrigardo de malproksime kaj senatente ekvidinte kelkajn ĝeneralajn trajtojn de la kontraŭdiroj, jam volas komenci ilin solvi (respondi demandon, solvi disputon, plenumi laboron aŭ direkti militan operacion). Tia agmaniero kondukas ĉiam al nenio krom malordo. La ĉinaj dogmismaj kaj empiriismaj kamaradoj faras erarojn ĝuste pro tio, ke ilia metodo uzata por observi objektojn estas subjektiva, unuflanka kaj supraja. Ankaŭ unuflankeco kaj suprajeco estas subjektiveco; ĉar ĉiuj objektive ekzistantaj objektoj estas propre interligiĝaj kaj regataj de siaj internaj leĝoj, sed anstataŭ ĝuste tion spe-

guli, iuj homoj nur rigardas la objektojn unuflanke aŭ supraĵe, ne konas iliajn interligiĝon kaj internajn leĝojn, do la metodo de tiuj homoj estas subjektivisma.

Ne nur en la tuta procezo de la disvolviĝo de objekto, la karakterizajn trajtojn de la movado de kontraŭdiroj ni devas atenti, kaj en ilia interligiĝo kaj en ĉiuj iliaj flankoj, sed ankaŭ en ĉiu stadio de la disvolviĝo de la procezo, la movado de kontraŭdiroj havas siajn karakterizajn trajtojn, kiujn ni devas atenti.

La fundamenta kontraŭdiro en la procezo de disvolviĝo de objekto kaj la esenco de la procezo determinita de tiu fundamenta kontraŭdiro ne malaperos ĝis la finiĝo de la procezo, sed la statoj en ĉiuj stadioj de la longa procezo de disvolviĝo de objekto ofte diferencas unu de la aliaj. Tio okazas pro tio, ke, kvankam la karaktero de la fundamenta kontraŭdiro en la procezo de disvolviĝo de objekto kaj la esenco de la procezo restas senŝanĝaj, tamen la fundamenta

kontraŭdiro prenas pli kaj pli akriĝantan formon en la diversaj stadioj de la disvolviĝo en la longa procezo. Krome, el la multaj grandaj kaj malgrandaj kontraŭdiroj, determinitaj aŭ influataj de la fundamenta kontraŭdiro, iuj akriĝas, aliaj provizore aŭ parte solviĝas aŭ moderiĝas, kaj denove aperas ceteraj kontraŭdiroj; pro tio en la procezo distingiĝas stadioj. Se oni ne atentas la malsamajn stadiojn en la procezo de disvolviĝo de objekto, oni ne povas konvene trakti ties kontraŭdirojn.

Ekzemple, kiam la kapitalismo de la epoko de libera konkuro disvolviĝis en imperiismon, restis senŝanĝaj la karaktero de la du klasoj fundamente kontraŭdiraj — la proletaro kaj la burĝaro — kaj same la kapitalisma naturo de tiu ĉi socio; sed akriĝis la kontraŭdiro inter la du klasoj, aperis la kontraŭdiro inter monopola kapitalo kaj nemonopola kapitalo, akriĝis la kontraŭdiro inter la metropoloj kaj iliaj kolonioj, kaj precipe akre elmontriĝis la kontraŭdiro

inter la kapitalismaj landoj, kaŭzita de ilia neegala disvolviĝo; tial formiĝis la speciala stadio de kapitalismo, la stadio de imperiismo. Leninismo estas Marksismo en la epoko de imperiismo kaj la proletara revolucio ĝuste pro tio, ke Lenin kaj Stalin ĝuste klarigis tiujn kontraŭdirojn kaj ĝuste ellaboris la teorion kaj taktikon de la proletara revolucio por ilin solvi.

Ni prenu kiel ekzemplon la procezon de la ĉina burĝara demokratia revolucio, kiu komenciĝis per la Revolucio de 1911; ankaŭ ĝi havas kelkajn specialajn stadiojn. Precipe la periodo de la revolucio sub la gvido de la burĝaro kaj la periodo de la revolucio sub la gvido de la proletaro distingiĝas kiel du treege malsamaj historiaj stadioj. Tio estas, la gvido de la proletaro radikale ŝanĝis la fizionomion de la revolucio, kaŭzis rearanĝiĝon de la klasrilatoj, alportis grandskalan disvolviĝon de la kamparana revolucio, ĝisfundecon de la revolucio kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo,

eblecon de transiro de la demokratia revolucio al la socialisma revolucio ktp. Ĉio ĉi tio ne povis okazi kiam la revolucio estis gvidata de la burĝaro. Kvankam ne ŝanĝiĝis la karaktero de la fundamenta kontraŭdiro en la tuta procezo, t.e. la karaktero de kontraŭimperiisma kaj kontraŭfeŭdisma demokratia revolucio de la procezo (ĝia kontraŭa flanko estas la duonkolonia kaj duonfeŭda karaktero), tamen dum tiu ĉi longa periodo okazis multaj grandaj eventoj, kiel la malsukceso de la Revolucio de 1911 kaj la stariĝo de la reĝimo de la nordaj militaristoj, la formiĝo de la unua nacia unuecfronto kaj la revolucio de 1924 — 1927, la rompiĝo de la unueca fronto kaj la transiro de la burĝaro al kontraŭrevolucio, la militoj inter la novaj militaristoj, la Milito de Agrara Revolucio, la formiĝo de la dua nacia unuecfronto kaj la Kontraŭjapana Rezistmilito, dum pli ol dudek jaroj estas trairitaj pluraj stadioj de disvolviĝo. Tiuj stadioj enhavis tiajn

partikularajn cirkonstancojn, kiaj la akriĝo de iuj kontraŭdiroj (ekzemple, la Milito de Agrara Revolucio kaj la invado de Japanio en la kvar nordorientajn provincojn[18]), la parta aŭ provizora solviĝo de aliaj kontraŭdiroj (ekzemple, la elimino al la nordaj militaristoj kaj nia konfisko de la tero de la bienuloj) kaj la denova apero de ceteraj kontraŭdiroj (ekzemple, la lukto inter la novaj militaristoj kaj la repreno de la tero fare de la bienuloj post la perdo de niaj sudaj revoluciaj bazlokoj).

Studante la partikularecon de la kontraŭdiroj en ĉiu stadio de la procezo de disvolviĝo de objekto, ni devas ne nur observi ilin en ilia interligiĝo, en ilia totaleco, sed ankaŭ konsideri ĉiujn flankojn de kontraŭdiroj en ĉiu stadio de la disvolviĝo.

Ni prenu Kuomintangon kaj la Komunistan Partion kiel ekzemplojn. Koncerne al Kuomintango, en la periodo de la unua unueca fronto, ĉar ĝi praktikis la Tri Gran-

dajn Politikojn de Sun Jatsen pri alianco kun Rusio, kunlaboro kun la Komunista Partio kaj helpo al la laboristoj kaj kamparanoj, tial ĝi estis revolucia kaj vivplena, kaj estis unio de diversaj klasoj en la demokratia revolucio. Sed de 1927, ĝi ŝanĝiĝis en la kontraŭan flankon kaj fariĝis reakcia bloko de la bienuloj kaj egburĝaro. Post la Hi'an-a Evento en decembro 1936,[19] ĝi komencis alian ŝanĝiĝon al la flanko de ĉesigo de la interna milito kaj kunligiĝo kun la Komunista Partio por kune batali kontraŭ la japana imperiismo. Tiuj estas la karakterizaj trajtoj de Kuomintango en la tri stadioj. Tiuj karakterizaj trajtoj formiĝis sendube pro diversaj kaŭzoj. Koncerne al la Komunista Partio de Ĉinio, en la periodo de la unua unueca fronto, ĝi troviĝis en sia infaneco kaj brave gvidis la revolucion de 1924 — 1927, sed ĝi montris nematurecon en sia kompreno pri la naturo, taskoj kaj metodoj de la revolucio, kaj sekve ĉenduhiuismo, aperinta

en la posta periodo de tiu ĉi revolucio, povis ludi sian rolon kaj kondukis la revolucion al malvenko. De 1927, la Komunista Partio denove gvidis brave la Militon de Agrara Revolucio kaj kreis revolucian armeon kaj revoluciajn bazlokojn, sed ĝi faris ankaŭ aventurismajn erarojn, kiuj kaŭzis tre grandajn perdojn al la armeo kaj la bazlokoj. De 1935, ĝi korektis tiujn aventurismajn erarojn kaj gvidis la novan unuecan fronton kontraŭjapanan; tiu ĉi granda batalo nun estas disvolviĝanta. En la nuna stadio, la Komunista Partio estas partio kiu trapasis la provadon de du revolucioj kaj akiris riĉan sperton. Tiuj estas la karakterizaj trajtoj de la Komunista Partio de Ĉinio en la tri stadioj. Ankaŭ tiuj karakterizaj trajtoj formiĝis pro diversaj kaŭzoj. Sen studi tiujn karakterizajn trajtojn, oni ne povas kompreni la partikularajn interrilatojn de la du partioj en iliaj diversaj stadioj de disvolviĝo, nome la formiĝon

de unueca fronto, la rompiĝon de la unueca fronto kaj la formiĝon de alia unueca fronto. Por studi la diversajn karakterizajn trajtojn de la du partioj, estas eĉ pli fundamente, ke oni devas studi la klasajn bazojn de la du partioj kaj la rezultantajn kontraŭdirojn, kiuj aperis inter ĉiu el ili kaj aliaj flankoj dum diversaj periodoj. Ekzemple, en la periodo de sia unuafoja kunligiĝo kun la Komunista Partio, Kuomintango troviĝis unuflanke en kontraŭdiro kun la fremdlanda imperiismo kaj sekve oponis kontraŭ imperiismo; aliflanke ĝi troviĝis en kontraŭdiro kun la enlandaj popolamasoj, kaj kvankam ĝi surbuŝe promesis al la laborantaj popolanoj multe da bonoj, tamen fakte ĝi donis al ili nur malmulton aŭ eĉ nenion. Dum la periodo, en kiu ĝi kondukis la kontraŭkompartian militon, ĝi kunlaboris kun imperiismo kaj feŭdismo por oponi kontraŭ la popolamasoj, nuligis ĉiujn bonojn gajnitajn de la popolamasoj dum la revolucio kaj tiel akrigis la kon-

traŭdiron inter si kaj la popolamasoj. Nun, en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, Kuomintango, estante en kontraŭdiro kun la japana imperiismo, volas kunligiĝi kun la Komunista Partio, sed samtempe ĝi ne mildigas sian batalon kaj sian subpremadon kontraŭ la Komunista Partio kaj la enlanda popolo. Dume, la Komunista Partio, en ĉiu ajn periodo, ĉiam staras kun la popolamasoj kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, sed en la nuna periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito ĝi ekadoptis moderan politikon kontraŭ Kuomintango kaj la enlandaj feŭdaj fortoj, ĉar Kuomintango montras sian volon rezisti kontraŭ Japanio. Tiuj kondiĉoj kaŭzis jen kunligiĝon, jen batalon inter la du partioj, kaj eĉ dum la periodo de ilia kunligiĝo ekzistas kompleksa situacio, en kiu samtempe estas kunligiĝo kaj batalo. Se ni ne studas la karakterizajn trajtojn de tiuj flankoj de la kontraŭdiroj, ni ne nur ne povas kompreni la rilatojn inter

ĉiu el la du partioj kaj aliaj flankoj, sed ankaŭ ne povas kompreni la rilatojn inter la du partioj mem.

El tio ni povas vidi, ke ĉe la studo de la karakterizo de ia ajn kontraŭdiro — la kontraŭdiro de ĉiu movadformo de materio, la kontraŭdiro de ĉiu movadformo en ĉiu aparta procezo de disvolviĝo, ĉiu flanko de la kontraŭdiro en ĉiu procezo de disvolviĝo, la kontraŭdiro de ĉiu procezo de la disvolviĝo en ĝia aparta stadio kaj ĉiu flanko de la kontraŭdiro en ĉiu stadio de disvolviĝo — ĉe la studo de la karakterizoj de ĉiuj tiuj kontraŭdiroj ne estas permesata subjektiva arbitreco, sed necesas konkreta analizo pri ili. Sen konkreta analizo ne eblas koni la karakteron de ia ajn kontraŭdiro. Ni devas ĉiam memori la vortojn de Lenin: konkreta analizo de konkreta situacio.

Marks kaj Engels la unuaj donis al ni tre bonan modelon de tia konkreta analizo.

Aplikante la leĝon de kontraŭdiro en objektoj al la studo de la procezo de socia historio, Marks kaj Engels vidis la kontraŭdiron inter la produktaj fortoj kaj la produktaj rilatoj, la kontraŭdiron inter la ekspluatanta klaso kaj la ekspluatata klaso kaj la kontraŭdiron, rezultintan el tiuj kontraŭdiroj, inter la ekonomia bazo kaj la superstrukturo, kiaj politiko, ideologio ktp.; ili vidis ankaŭ, kiel tiuj kontraŭdiroj neeviteble estigas diversajn sociajn revoluciojn en diversaj klasaj socioj.

Kiam Marks aplikis tiun leĝon al la studo de la ekonomia strukturo de kapitalisma socio, li vidis, ke la fundamenta kontraŭdiro de tiu ĉi socio estas la kontraŭdiro inter la socia karaktero de la produktado kaj la privata karaktero de la posedsistemo. Tiu kontraŭdiro elmontriĝas en la kontraŭdiro inter la organiziteco de la produktado de apartaj entreprenoj kaj la neorganiziteco de la produktado de la tuta socio. Ĝia klasa manifestiĝo

troviĝas en la kontraŭdiro inter la burĝaro kaj la proletaro.

Pro la grandega amplekso de objektoj kaj la senlimeco de ilia disvolviĝo, tio kio estas universala en unu kazo fariĝas partikulara en alia difinita kazo. Kaj inverse, tio kio estas partikulara en unu kazo fariĝas universala en alia difinita kazo. La kontraŭdiro entenata en la kapitalisma sistemo inter la sociigo de produktado kaj la privata posedsistemo de la produktaj rimedoj estas komuna al ĉiuj landoj, kie kapitalismo ekzistas kaj disvolviĝas, kaj ĝi konsistigas la universalecon de kontraŭdiro por kapitalismo. Sed tiu kontraŭdiro de kapitalismo ekzistas nur en certa historia stadio de la disvolviĝo de klasa socio en ĝeneralo; kaj por la kontraŭdiro inter la produktaj fortoj kaj la produktaj rilatoj en la klasa socio en ĝeneralo, ĝi konsistigas la partikularecon de kontraŭdiro. Tamen, montrante per sekcado la partikularecon de ĉiuj tiuj kontraŭdiroj de la kapitalisma

socio, Marks samtempe eksplikis ankoraŭ pli profunde, pli plene kaj pli komplete la universalecon de kontraŭdiro inter la produktaj fortoj kaj la produktaj rilatoj de klasa socio en ĝeneralo.

Ĉar la partikulara interligiĝas kun la universala, ĉar ĉiu objekto havas en si ne nur la partikularecon, sed ankaŭ la universalecon de kontraŭdiro, la universaleco ekzistas ĝuste en la partikulareco, tial ni devas, ĉe studo de certa objekto, eltrovi tiujn du flankojn kaj ilian interligiĝon, eltrovi la partikularecon kaj la universalecon en la objekto kaj ilian interligiĝon kaj eltrovi la interligiĝon de tiu objekto kun la multaj aliaj objektoj ekster ĝi. Kiam Stalin en sia fama verko *Pri la Fundamentoj de Leninismo* klarigis la historiajn radikojn de Leninismo, li analizis la internacian situacion, en kiu Leninismo naskiĝis, analizis la diversajn kontraŭdirojn de kapitalismo, kiuj jam disvolviĝis ĝis sia kulmino sub la kondiĉoj de imperiismo, kaj montris,

kiel tiuj kontraŭdiroj faris la proletaran revolucion demando de rekta praktiko kaj kreis favorajn kondiĉojn por rekta sturmo kontraŭ kapitalismo. Krom tio, li analizis ankaŭ la kaŭzojn, kial Rusio fariĝis la lulilo de Leninismo, kial la cara Rusio estis tiam la fokuso de ĉiuj kontraŭdiroj de imperiismo, kaj kial la rusa proletaro povis fariĝi la avangardo de la internacia revolucia proletaro. Tiamaniere, Stalin analizis la universalecon de kontraŭdiro de imperiismo, montrante ke Leninismo estas la Marksismo en la epoko de imperiismo kaj la proletara revolucio, kaj analizis ankaŭ la partikularecon de la imperiismo de la cara Rusio en tiu ĝenerala kontraŭdiro, montrante kial Rusio fariĝis la naskiĝloko de la teorio kaj taktiko de la proletara revolucio kaj kiel en tiu partikulareco troviĝas la universaleco de kontraŭdiro. Tiu analizo farita de Stalin servas al ni kiel modelo por koni la par-

tikularecon kaj la universalecon de kontraŭdiro kaj ilian interligiĝon.

Koncerne la aplikadon de dialektiko al la studo de objektivaj fenomenoj, Marks kaj Engels, ankaŭ Lenin kaj Stalin, ĉiam instruis, ke oni devas forigi ĉian subjektivan arbitrecon, devas eltrovi el la konkretaj kondiĉoj entenataj de la reala objektiva movado la konkretajn kontraŭdirojn en tiuj fenomenoj, la konkretan pozicion de ĉiu el la flankoj de la kontraŭdiro kaj la konkretan interrilaton de la kontraŭdiroj. Niaj dogmistoj ĉiam faras erarojn, ĉar al ili mankas tia sinteno en la studo. Ni devas avertiĝi de ilia malsukceso kaj ellerni tian sintenon en la studo; krom tiu ne troviĝas alia korekta studmetodo.

La rilato inter la universaleco kaj la partikulareco de kontraŭdiro estas la rilato inter la komuna karaktero kaj la individua karaktero de kontraŭdiro. La komuna karaktero signifas ke kontraŭdiro ekzistas

en ĉiuj procezoj kaj trapenetras ilin de la komenco ĝis la fino, kontraŭdiroj ja estas movado, objektoj, procezoj kaj ankaŭ pensado. Nei la kontraŭdiron de objektoj signifas nei ĉion. Tio estas vero komuna por ĉiuj tempoj kaj ĉiuj landoj, senescepte. Tial kontraŭdiro estas karaktero komuna, absoluta. Sed tiu ĉi komuna karaktero estas entenata en ĉiuj individuaj karakteroj; sen individua karaktero ne povas ekzisti komuna karaktero. Kia komuna karaktero ankoraŭ restus, se ĉiuj individuaj karakteroj estus forigitaj? Individuaj karakteroj estiĝis pro tio, ke ĉiu kontraŭdiro havas sian apartan partikularecon. Ĉiuj individuaj karakteroj ekzistas kondiĉe kaj provizore, kaj pro tio estas relativaj.

Tiu ĉi vero pri komuna karaktero kaj individua karaktero, pri absoluteco kaj relativeco, estas la kvintesenco de la problemo pri la kontraŭdiro de objektoj; ne kompreni ĝin signifas forlasi dialektikon.

IV. LA ĈEFA KONTRAŬDIRO KAJ LA ĈEFA FLANKO DE KONTRAŬDIRO

En la problemo de la partikulareco de kontraŭdiro, estas ankoraŭ du punktoj, kiuj bezonas apartan analizon, nome la ĉefa kontraŭdiro kaj la ĉefa flanko de kontraŭdiro.

Ekzistas multaj kontraŭdiroj en la komplika procezo de disvolviĝo de objekto; el ili unu certe estas la ĉefa kontraŭdiro, kies ekzisto kaj disvolviĝo determinas aŭ influas la ekziston kaj disvolviĝon de la ceteraj kontraŭdiroj.

Ekzemple, en kapitalisma socio, la du kontraŭdiraj fortoj, la proletaro kaj la burĝaro, formas la ĉefan kontraŭdiron; la aliaj kontraŭdiroj, kiel tiuj inter la restanta feŭda klaso kaj la burĝaro, inter la kamparano-etburĝoj kaj la burĝaro, inter la proletaro kaj la kamparano-etburĝoj, inter la nemonopola burĝaro kaj la monopola burĝaro, inter la burĝara demokratio kaj la burĝara faŝismo, inter la kapitalismaj landoj mem, inter imperiismo kaj la kolonioj kaj ceteraj kontraŭdiroj, ĉiuj estas determinataj kaj influataj de tiu ĉefa kontraŭdiro.

En duonkoloniaj landoj, ekzemple en Ĉinio, la rilato inter la ĉefa kontraŭdiro kaj la neĉefaj kontraŭdiroj prezentas komplikan bildon.

Kiam imperiismo faras agresan militon kontraŭ tia lando, la diversaj klasoj en tiu lando, escepte de iuj naciperfiduloj, povas provizore unuiĝi por konduki nacian militon kontraŭ imperiismo. En tiu tempo, la kontraŭdiro inter imperiismo kaj tiu lando fariĝas la ĉefa, dum ĉiuj kontraŭdiroj inter la diversaj klasoj interne de tiu lando (inkluzive de la ĉefa kontraŭdiro inter la feŭda sistemo kaj la popolamasoj) provizore malleviĝas al duagrada kaj subordigita pozicio. Tia estis la kazo en Ĉinio dum la Opia Milito de 1840,[20]

la Ĉina-Japana Milito de 1894,[21] la Jihetuan-a Milito de 1900, kaj tia estas la kazo ankaŭ en la nuna Ĉina-Japana Milito.

Sed en alia situacio, la kontraŭdiroj ŝanĝas siajn poziciojn. Kiam imperiismo subpremas ne en la formo de milito, sed en relative mildaj formoj de politiko, ekonomio, kulturo ktp., la reganta klaso en duonkoloniaj landoj povas kapitulaci al imperiismo kaj alianciĝas kun ĝi por kune subpremi la popolamasojn. Tiam la popolamasoj ofte prenas la formon de enlanda milito por oponi kontraŭ la alianco de imperiismo kaj la feŭda klaso, dume imperiismo, evitante rektan agadon, ofte uzas malrektajn metodojn por helpi la reakciulojn de tiuj duonkoloniaj landoj subpremi la popolon, kaj tiuokaze la interna kontraŭdiro montriĝas ekstreme akra. Tio okazis en Ĉinio en la Revolucia Milito de 1911, la Revolucia Milito de 1924 — 1927 kaj la dekjara Milito de Agrara Revolucio de post 1927. Al tiu kategorio apartenas

ankaŭ la internaj militoj inter la diversaj reakciaj regantaj grupoj en la duonkoloniaj landoj, kiel ekzemple la militoj inter la militaristoj de Ĉinio.

Kiam enlanda revolucia milito disvolviĝas ĝis tia grado, ke ĝi minacas de radike la ekziston de imperiismo kaj ĝiaj lakeoj — la enlandaj reakciuloj, imperiismo ofte uzas aliajn metodojn ol la supre diritajn, intencante konservi sian regadon; ĝi aŭ fendas la revolucian fronton de interne aŭ rekte sendas armitajn fortojn por helpi la enlandajn reakciulojn. Tiam la fremdlanda imperiismo kaj la enlandaj reakciuloj tute senkaŝe staras ĉe unu ekstremo dum la popolamasoj ĉe la alia, formante tiel la ĉefan kontraŭdiron kiu determinas aŭ influas la disvolviĝon de la aliaj kontraŭdiroj. La helpo donita de diversaj kapitalismaj landoj al la rusaj reakciuloj post la Oktobra Revolucio estas ekzemplo de armita interveno. La perfido de Ĉiang Kajŝek en

1927 estas ekzemplo de disfendo de la revolucia fronto.

Sed en kia ajn okazo, estas tute sendube, ke en ĉiu stadio de la disvolviĝo de procezo ekzistas nur unu ĉefa kontraŭdiro kiu ludas la gvidan rolon.

El tio oni povas vidi, se en iu ajn procezo ekzistas multaj kontraŭdiroj, el ili unu certe estas la ĉefa kiu ludas gvidan kaj decidigan rolon, dum la aliaj okupas duagradan kaj subordigitan pozicion. Sekve, ĉe studo de kiu ajn procezo, se tiu estas komplika, enhavanta pli ol du kontraŭdirojn, ni devas per la tuta forto trovi la ĉefan kontraŭdiron. Kiam tiu ĉi ĉefa kontraŭdiro estas kaptita, ĉiuj problemoj povas esti facile solvitaj. Tio estas la metodo, kiun Marks montris al ni en sia studo pri la kapitalisma socio. Tio estas ankaŭ la metodo, kiun montris al ni Lenin kaj Stalin en sia studo pri imperiismo kaj la ĝenerala krizo de kapitalismo kaj pri la ekonomio de Sovetunio. Miloj kaj dekmiloj da kle-

ruloj kaj praktikantoj ne komprenas tiun metodon, kaj rezulte ili, kvazaŭ dronante en maro de nebulo, ne povas trovi la kernon de la problemo kaj pro tio ankaŭ ne povas trovi metodon por solvi la kontraŭdirojn.

Kiel supre dirite, oni ne povas egale trakti ĉiujn kontraŭdirojn entenatajn en procezo, sed devas distingi la ĉefan de la duagradaj kaj doni specialan atenton por kapti la ĉefan kontraŭdiron. Tamen, ĉu en ĉiu kontraŭdiro, ĉu ĉefa ĉu duagrada, oni povas egale trakti la du kontraŭdirajn flankojn? Ne, ankaŭ tion oni ne povas fari. La disvolviĝo de la kontraŭdiraj flankoj de ĉiu ajn kontraŭdiro estas neekvilibra. Kelkfoje ŝajnas, ke iliaj fortoj egalas unu al la alia, sed tio estas nur stato provizora kaj relativa, dum neekvilibreco estas la stato fundamenta. El la du kontraŭdiraj flankoj unu devas esti la ĉefa kaj la alia duagrada. La ĉefa flanko estas tiu kiu ludas kondukan rolon en la kon-

traŭdiro. La karaktero de objekto estas determinita precipe de la ĉefa flanko de la kontraŭdiro, kiu okupas la regantan pozicion.

Sed tia situacio ne estas stabila; la ĉefa kaj la neĉefa flankoj de kontraŭdiro transformiĝas unu en la alian, kaj la karaktero de objekto ankaŭ ŝanĝiĝas laŭe. En certa procezo aŭ en certa stadio de la disvolviĝo de kontraŭdiro, la ĉefa flanko estas A kaj la neĉefa flanko estas B; en alia stadio aŭ en alia procezo de la disvolviĝo, iliaj roloj inversiĝas; tio dependas de la grado de la pligrandiĝo aŭ malpligrandiĝo de la forto de ĉiu el la du flankoj de la kontraŭdiro kiuj luktas unu kontraŭ la alia en la disvolviĝo de objekto.

Ni ofte diras ke "la nova anstataŭas la malnovan". La anstataŭo de la malnova fare de la nova estas ĝenerala kaj neniam kontraŭstarebla leĝo de la universo. La transformiĝo de unu objekto en alian, tra malsamaj formoj de salto konforme

al ĝia naturo kaj la kondiĉoj en kiuj ĝi troviĝas, ja estas la procezo de anstataŭo de la malnova fare de la nova. En ĉiu ajn objekto ekzistas kontraŭdiro inter la nova kaj la malnova flankoj, kiu kaŭzas serion da zigzagaj luktoj. Rezulte de la luktoj, la nova pligrandiĝas kaj fariĝas superreganta, dum la malnova malpligrandiĝas kaj iom post iom proksimiĝas al pereo. Kaj tuj kiam la nova flanko ekokupas la regantan pozicion super la malnova, la malnova objekto ŝanĝiĝas karaktere en la novan. El tio oni povas vidi, ke la karakteron de objekto determinas ĉefe la ĉefa flanko de la kontraŭdiro, kiu okupas regantan pozicion. Kiam la ĉefa flanko de la kontraŭdiro, kiu okupas regantan pozicion, ŝanĝiĝas, ankaŭ la karaktero de objekto ŝanĝiĝas laŭe.

En kapitalisma socio, kapitalismo, kiu okupis dependan pozicion en la malnova epoko de feŭdisma socio, fariĝas la forto kiu okupas la regantan pozicion, kaj la

karaktero de la socio ankaŭ ŝanĝiĝas de feŭdisma en kapitalisman. En la nova epoko de kapitalisma socio, la feŭdaj fortoj ŝanĝiĝas de la forto antaŭe okupinta regantan pozicion en forton dependan, kaj poste iom post iom proksimiĝas al pereo. Tiel okazis, ekzemple, en Britio kaj Francio. Kun la disvolviĝo de la produktaj fortoj, la burĝaro transformiĝas de nova klaso ludanta progresan rolon en malnovan klason ludantan rolon reakcian, ĝis ĝi estas fine renversita de la proletaro kaj fariĝas klaso, senigita je private posedataj produktaj rimedoj kaj perdinta sian potencon, kaj tiam ankaŭ tiu ĉi klaso iom post iom proksimiĝas al pereo. La proletaro, multe pli grandnombra ol la burĝaro, kreskanta samtempe kun la burĝaro sed troviĝanta sub ties regado, estas nova forto kiu, dependa de la burĝaro en la komenca periodo, laŭgrade fortiĝas kaj fariĝas klaso sendependa kaj ludanta kondukan rolon en la historio, ĝis ĝi fine kap-

tas al si la politikan potencon kaj fariĝas reganta klaso. Tiam la socio transformiĝas, laŭ sia karaktero, de la malnova kapitalisma socio en la novan socialisman socion. Tio estas la vojo kiun jam trairis Sovetunio kaj kiun nepre iros ĉiuj aliaj landoj.

Ni prenu Ĉinion kiel ekzemplon. Imperiismo okupas la ĉefan pozicion en la kontraŭdiro, en kiu Ĉinio fariĝas duonkolonio, ĝi subpremas la ĉinan popolon, kaj Ĉinio ŝanĝiĝas de lando sendependa en landon duonkolonian. Sed tiu ĉi stato neeviteble ŝanĝiĝos; en la lukto inter ambaŭ flankoj, la forto de la ĉina popolo, kiu kreskas sub la gvido de la proletaro, neeviteble transformos Ĉinion el lando duonkolonia en landon sendependan, dum imperiismo estos renversita, kaj la malnova Ĉinio neeviteble ŝanĝiĝos en novan Ĉinion.

La ŝanĝo de la malnova Ĉinio en novan Ĉinion ankaŭ implicas la ŝanĝon de la stato inter la malnovaj feŭdaj fortoj kaj

la novaj popolaj fortoj en la lando. La malnova feŭda bienula klaso estos renversita kaj ŝanĝiĝos el reganto en regaton, kaj tiu ĉi klaso ankaŭ iom post iom proksimiĝos al pereo. La popolo, sub la gvido de la proletaro, ŝanĝiĝos el regato en reganton. Tiam la karaktero de la ĉina socio ŝanĝiĝos: la malnova, duonkolonia kaj duonfeŭda socio ŝanĝiĝos en novan demokratian socion.

Kazoj de tiaj intertransformiĝoj troviĝis jam en nia pasinta sperto. King-dinastio, kiu regis Ĉinion ĉirkaŭ tricent jaroj, estis renversita dum la Revolucio de 1911, kaj la Revolucia Tongmenghuj gvidata de Sun Jatsen iam portempe akiris venkon. En la Revolucia Milito de 1924 — 1927, la kunligitaj revoluciaj fortoj de la Komunista Partio kaj Kuomintango en la sudo iam ŝanĝiĝis de malfortaj en potencajn kaj akiris venkon en la Norden-Ekspedicio, dum la nordaj militaristoj, kiuj iam ĉion superpotencis, estis renversitaj. En 1927, la

popola forto gvidata de la Komunista Partio fariĝis tre malgranda sub la atakoj de la reakciaj fortoj de Kuomintango, sed iom post iom ĝi denove grandiĝis pro elimino de oportunismo el siaj vicoj. En la revoluciaj bazlokoj gvidataj de la Komunista Partio, la kamparanoj transformiĝis el regatoj en regantojn, dum la bienuloj ŝanĝiĝis inverse. En la mondo, ĉiam tiel okazas, ke la malnova estas substituata per la nova, ĉiam tiel okazas, ke la nova anstataŭas la malnovan, la malnova iĝas forigita cede al la nova, aŭ la nova emerĝas el la malnova.

En iuj tempoj dum la revolucia batalo la malfacilaj kondiĉoj superas la favorajn; tiam la malfaciloj estas la ĉefa flanko de la kontraŭdiro, dum la favoraj kondiĉoj estas la duagrada flanko. Sed, dank' al la penado de la revoluciuloj, povas esti venkitaj paŝo post paŝo la malfaciloj kaj kreiĝas nova favora situacio, tiam la malfacila situacio cedas lokon al la favora.

Tia estis la kazo post la malvenko de la revolucio en Ĉinio en 1927 kaj dum la Longa Marŝo de la Ĉina Ruĝa Armeo. En la nuna Ĉina-Japana Milito, Ĉinio denove troviĝas en malfacila situacio, sed ni povas ŝanĝi tiun staton kaj radikale aliigi la staton inter Ĉinio kaj Japanio. Kontraŭe, favora situacio povas ankaŭ transformiĝi en malfacilan, se la revoluciuloj faras erarojn. Tiel la venko de la revolucio de 1924—1927 ŝanĝiĝis en malvenkon. La revoluciaj bazlokoj starigitaj en la sudaj provincoj post 1927 ĉiuj suferis malvenkon en 1934.

Same estas ĉe la kontraŭdiro en la procezo de nescio al scio dum studo. Kiam ni ĵus komencas studi Marksismon, sin trovas la kontraŭdiro inter nia nescio aŭ malmulta scio pri Marksismo kaj scio de Marksismo. Sed rezulte de diligenta studo, la nescio povas ŝanĝiĝi en scion, la malmulta scio en vastan scion, kaj la blindeco kontraŭ Marksismo en liberan aplikadon de Marksismo.

Iuj pensas, ke la kazo ne estas tia en iuj kontraŭdiroj. Ekzemple, en la kontraŭdiro inter la produktaj fortoj kaj la produktaj rilatoj, la produktaj fortoj estas la ĉefa flanko; en la kontraŭdiro inter la teorio kaj la praktiko, la praktiko estas la ĉefa flanko; en la kontraŭdiro inter la ekonomia bazo kaj la superstrukturo, la ekonomia bazo estas la ĉefa flanko; kaj la unuaj kaj la duaj ne ŝanĝas reciproke siajn poziciojn. Tia estas vidpunkto de mekanika materiismo, kaj ne vidpunkto de dialektika materiismo. Estas vere, ke la produktaj fortoj, la praktiko kaj la ekonomia bazo ĝenerale manifestas sin en la ĉefa kaj decida rolo; tiu, kiu ne rekonas tion, ne estas materiisto. Tamen oni devas rekoni ankaŭ, ke en certaj kondiĉoj la flankoj kiel la produktaj rilatoj, la teorio kaj la superstrukturo manifestas sin siavice en la ĉefa kaj decida rolo. Kiam la produktaj fortoj ne povas disvolviĝi sen ŝanĝo de la produktaj rilatoj, la ŝanĝo de la produktaj rilatoj ekludas la ĉefan kaj

decidan rolon. Kiam, kiel Lenin diris, "sen revolucia teorio ne povas esti ankaŭ revolucia movado",[22] la kreo kaj diskonigo de revolucia teorio ludas la ĉefan kaj decidan rolon. Kiam iu afero (kiu ajn ĝi estu) devas esti farata, sed oni ankoraŭ ne havas por tio ian orientilon, metodon, planon aŭ politikon, la ellaboro de orientilo, metodo, plano aŭ politiko fariĝas do la ĉefa kaj decida faktoro. Kiam la superstrukturo, kiel politiko, kulturo k.a., malhelpas la disvolviĝon de la ekonomia bazo, la politikaj kaj kulturaj renovigoj fariĝas do la ĉefa kaj decida faktoro. Tiel dirante, ĉu ni malobservas materiismon? Ne. La kaŭzo estas, ke dum ni rekonas ke en la ĝenerala disvolviĝo de historio la materiaĵo decidas la spiritaĵon kaj la socia ekzisto decidas la socian konscion, ni ankaŭ rekonas kaj devas rekoni la reagon de la spiritaĵo, la reagon de la socia konscio al la socia ekzisto kaj la reagon de la superstrukturo al la ekonomia bazo. Tio ne

estas malobservo de materiismo, sed evito de mekanika materiismo kaj persisto en dialektika materiismo.

En la studo pri la problemo de la partikulareco de kontraŭdiro, se ni ne studas tiujn du statojn en procezo: tiu de la ĉefa kontraŭdiro kaj la neĉefaj kontraŭdiroj unuflanke, kaj tiu de la ĉefa flanko kaj la neĉefa flanko de kontraŭdiro aliflanke, t.e., se ni ne studas la karakteran diferencon de tiuj du statoj de kontraŭdiroj, ni dronos en abstrakta studo, ne povas konkrete kompreni la statojn de kontraŭdiroj kaj sekve ne povas trovi la ĝustan metodon por ilin solvi. La karaktera diferenco aŭ partikulareco de tiuj du statoj de kontraŭdiroj reprezentas la neegalecon de la kontraŭdiraj fortoj. Nenio en la mondo disvoviĝas kun absoluta egaleco, kaj ni devas opozicii al la teorio de egala disvolviĝo aŭ la teorio de ekvilibro. Samtempe, la konkreta stato de kontraŭdiro kaj la ŝanĝiĝo de ĝiaj ĉefa kaj neĉefa flankoj en la

procezo de disvolviĝo montras precize la forton de la nova objekto kiu anstataŭas la malnovan. Ĉiuj komunistoj devas atenti, ke la studo pri la diversaj statoj de neegaleco de kontraŭdiroj, pri la ĉefa kontraŭdiro kaj la neĉefaj kontraŭdiroj kaj pri la ĉefa flanko kaj la neĉefa flanko de kontraŭdiro estas unu el la gravaj metodoj, per kiuj revolucia politika partio ĝuste determinas siajn strategiajn kaj taktikajn orientilojn en politiko kaj militaj aferoj.

V. LA IDENTECO KAJ BATALECO DE LA FLANKOJ DE KONTRAŬDIRO

Kompreninte la problemon de la universaleco kaj partikulareco de kontraŭdiro, ni devas pluiri al la studo pri la problemo de la identeco kaj bataleco de ĝiaj flankoj.

Identeco, unueco, koincideco, interpenetrado, interkomunikado, interdependo

(aŭ reciproka dependo por ekzisto), interligiĝo aŭ kunlaboro — ĉiuj tiuj malsamaj terminoj signifas la samon kaj diras la jenajn du statojn: unue, la du flankoj de ĉiu kontraŭdiro en la procezo de disvolviĝo de objekto estas reciproke premisitaj unu de la ekzisto de la alia flanko kontraŭstara, kaj ambaŭ flankoj kunekzistas en unueca ento; due, ĉiu el la du kontraŭdiraj flankoj transformiĝas, laŭ certaj kondiĉoj, en sian kontraŭan flankon. Tio estas la tiel nomata identeco.

Lenin diris:

> *Dialektiko* estas la doktrino pri tio, kiel *kontraŭoj* povas esti kaj estas (fariĝas) *identaj*, — sub kiaj kondiĉoj ili estas identaj, transformiĝante unu en la alian,— kial la homa menso ne devas preni tiujn kontraŭojn kiel mortajn, rigidajn, sed kiel vivantajn, kondiĉajn, facilmovajn kaj transformiĝantajn unu en la alian.[23]

Kio estas la signifo de tiuj ĉi vortoj de Lenin?

La kontraŭdiraj flankoj en ĉiu procezo ĉiam ekskluzivas reciproke, batalas inter si kaj kontraŭstaras unu la alian. Tiaj kontraŭdiraj flankoj estas entenataj senescepte en la procezo de disvolviĝo de ĉiuj objektoj de la mondo kaj en la homa penso. Simpla procezo havas nur unu paron da kontraŭoj, dum kompleksa procezo havas pli ol unu paron. La diversaj paroj da kontraŭoj siavice estas en kontraŭdiro unu al alia. Tiamaniere ĉiuj objektoj en la objektiva mondo kaj homa penso estas formitaj kaj puŝataj al movado.

Sekve ŝajnas, ke entute mankas ĝuste identeco aŭ unueco. Kiel ni povas paroli pri identeco aŭ unueco?

La fakto estas, ke ĉiu kontraŭdira flanko ne povas ekzisti izole. Sen la opozicia flanko, ĉiu flanko perdas la kondiĉon de sia ekzistado. Imagu, ĉu iu ajn el la flankoj de ĉiuj kontraŭdiraj objektoj aŭ kontraŭdiraj konceptoj en la homa menso povas ekzisti sendepende? Sen vivo, ne estas

morto; sen morto, ankaŭ ne estas vivo. Sen supro, ne estas malsupro; sen malsupro, ankaŭ ne estas supro. Sen malfeliĉo, ne estas feliĉo; sen feliĉo, ankaŭ ne estas malfeliĉo. Sen facilo, ne estas malfacilo; sen malfacilo, ankaŭ ne estas facilo. Sen bienuloj, ne estas farmuloj; sen farmuloj, ankaŭ ne estas bienuloj. Sen burĝaro, ne estas proletaro; sen proletaro, ankaŭ ne estas burĝaro. Sen nacia subpremado de imperiismo, ne estas kolonioj kaj duonkolonioj; sen kolonioj kaj duonkolonioj, ankaŭ ne estas nacia subpremado de imperiismo. Ĉiuj kontraŭaj elementoj sin prezentas jene: pro certaj kondiĉoj, unuflanke, ili kontraŭstaras unu la alian, kaj, aliflanke, ili interligiĝas, interkomunikiĝas, interpenetriĝas kaj interdependas, kaj tiu karaktero estas nomata identeco. Ĉiuj kontraŭdiraj flankoj, pro certaj kondiĉoj, estas karakterizitaj per neidenteco kaj sekve estas nomataj kontraŭoj. Sed ili estas karakterizitaj ankaŭ per identeco kaj pro

tio interligiĝas. Ĝuste pri tio parolis Lenin, kiam li diris, ke dialektiko studas "kiel *kontraŭoj* povas esti . . . *identaj*". Kiel ili povas esti identaj? Ĉar ĉiu estas la kondiĉo por la ekzisto de la alia. Tio estas la unua signifo de identeco.

Sed ĉu sufiĉas diri nur, ke ĉiu el la kontraŭdiraj flankoj estas la kondiĉo por la ekzisto de la alia, ke inter ili estas identeco kaj ke tial ili povas kunekzisti en unueca ento? Ne, ne sufiĉas. La afero ne finiĝas per ilia reciproka dependo por ekzisto; ankoraŭ pli grava estas ilia transformiĝado de unu en la alian. Tio estas, ke ĉiu el la kontraŭdiraj flankoj en la interno de objekto, pro certaj kondiĉoj, transformiĝas en sian kontraŭan flankon, transiras al la pozicio de sia kontraŭstara flanko. Tio estas la dua signifo de la identeco de kontraŭoj.

Kial ankaŭ ĉi tie troviĝas identeco? Jen vidu, dank' al revolucio la proletaro, kiu estis regato, transformiĝas en reganton,

dum la burĝaro, kiu estis reganto, transformiĝas en regaton, transirante en la pozicion origine okupitan de la kontraŭa flanko. Tio jam okazis en Sovetunio kaj okazos ankaŭ en la tuta mondo. Se ne ekzistus interligiĝo kaj identeco inter tiuj kontraŭoj sub certaj kondiĉoj, kiel tia ŝanĝo povus okazi?

Kuomintango, kiu ludis ian pozitivan rolon en certa stadio de la moderna ĉina historio, pro la propra al si klasa naturo kaj la tentado de imperiismo (tiuj estis la kondiĉoj), transformiĝis en kontraŭrevolucian partion de 1927; sed pro la akriĝo de la kontraŭdiro inter Ĉinio kaj Japanio kaj pro la unuecfronta politiko de la Komunista Partio (tiuj estis la kondiĉoj), ĝi estis devigita konsenti la reziston kontraŭ Japanio. Kontraŭdiraj objektoj transformiĝas unu en la alian, kaj en tio kuŝas certa identeco.

La agrara revolucio, kiun ni praktikis, estas kaj estos tia procezo, en kiu la ter-

posedanta bienula klaso transformiĝas en klason senigitan je sia tero, dum la kamparanoj, antaŭe senigitaj je sia tero, transformiĝas en etajn proprajŭlojn, kiuj ricevis teron. Havo kaj nehavo, akiro kaj perdo estas interligiĝaj pro certaj kondiĉoj kaj en tio kuŝas la identeco de la du flankoj. Sub la kondiĉoj de socialismo, la privata posedsistemo de la kamparanoj transformiĝos siavice en komunan posedsistemon de socialisma agrikulturo, tio jam okazis en Sovetunio kaj okazos ankaŭ en la tuta mondo. Inter privata proprajĵo kaj komuna proprajĵo ekzistas ponto kiu kondukas de unu al la alia, kaj tio estas nomata en filozofio identeco, aŭ reciproka transformiĝo, aŭ interpenetrado.

Firmigi la diktaturon de la proletaro aŭ la diktaturon de la popolo estas ĝuste por pretigi la kondiĉojn por aboli tiun diktaturon kaj antaŭeniri al pli alta stadio kiam ĉia ŝtata reĝimo estos likvidita. Establi kaj disvolvi la komunistan partion

estas ĝuste por pretigi la kondiĉojn por aboli la komunistan partion kaj ĉiujn partiajn sistemojn. Establi revolucian armeon sub la gvido de la komunista partio kaj konduki revolucian militon estas ĝuste por pretigi la kondiĉojn por elimini militon por ĉiam. Tiuj kontraŭaĵoj samtempe kompletigas unu la alian.

Kiel ĉiuj scias, milito kaj paco transformiĝas reciproke unu en la alian. Milito transformiĝas en pacon; ekzemple, la Unua Mondmilito transformiĝis en la postmilitan pacon, kaj ankaŭ la interna milito de Ĉinio nun ĉesis, kaj aperis paco en la lando. Paco transformiĝas en militon; ekzemple, en 1927 la kunlaboro inter Kuomintango kaj la Komunista Partio transformiĝis en militon, kaj ankaŭ la nuna paca situacio en la mondo povas transformiĝi en duan mondmiliton. Kial do? Ĉar en klasa socio tiaj kontraŭdiraj objektoj, kiaj milito kaj paco, havas identecon en certaj kondiĉoj.

Ĉiuj kontraŭdiraj objektoj estas interligiĝaj, kaj ili ne nur kunekzistas en unueca ento sub difinitaj kondiĉoj, sed ankaŭ transformiĝas reciproke unu en la alian sub aliaj difinitaj kondiĉoj; tio estas la tuta signifo de la identeco de kontraŭoj. Ĝuste tion montris Lenin, kiam li diris: "kiel *kontraŭoj* . . . estas (fariĝas) *identaj* — sub kiaj kondiĉoj ili estas identaj, transformiĝante unu en la alian . . ."

". . . kial la homa menso ne devas preni tiujn kontraŭojn kiel mortajn, rigidajn, sed kiel vivantajn, kondiĉajn, facilmovajn kaj transformiĝantajn unu en la alian"? Ĉar propre tiaj estas la objektivaj objektoj. La unueco aŭ identeco de la kontraŭdiraj flankoj en la objektivaj objektoj neniam estas morta, rigida, sed estas vivanta, kondiĉa, facilmova, portempa kaj relativa; ĉiuj kontraŭoj transformiĝas sub certaj kondiĉoj en sian malon. Speguliĝante en la homa penso, tia stato fariĝas la marksisma materiism-dialektika mondkoncepto.

Nur la reakciaj regantaj klasoj en la estanteco kaj en la pasinteco kaj la metafiziko, kiu ilin priservas, ne prenas kontraŭstarajn objektojn kiel vivantajn, kondiĉajn, facilmovajn kaj transformiĝantajn unu en la alian, sed kiel mortajn kaj rigidajn, kaj propagandas ĉie tiun eraran opinion por trompi la popolamasojn, kun la celo daŭrigi sian regadon. La tasko de la komunistoj estas malkaŝi la erarajn ideojn de la reakciuloj kaj metafizikistoj, propagandi la dialektikon propran al objektoj, akceli la transformiĝon de objektoj kaj tiel atingi la celon de revolucio.

Parolante pri la identeco de kontraŭoj sub certaj kondiĉoj, ni aludas ke tiuj kontraŭoj estas realaj kaj konkretaj kaj ankaŭ ilia reciproka transformiĝo estas reala kaj konkreta. Multaj transformiĝoj en mitologio, ekzemple, la persekuto de Kuafu al la suno en la *Libro de Montoj kaj Maroj*,[24] la paffaligo de naŭ sunoj fare de Ji en *Huaj Nan Zi*,[25] la sepdek du metamorfozoj de

Sun Vukong en *Pilgrimado al la Okcidento*,[26] la multaj rakontoj pri la aliformiĝo en homojn fare de fantomoj kaj vulpospiritoj en la *Notoj pri Strangaĵoj de Liaŭĝaj*,[27] ktp., — la reciprokaj transformiĝoj de kontraŭoj en tiuj mitoj estas nur infanecaj, imagaj, subjektive fantaziaj transformiĝoj, inspiritaj al homoj de la reciprokaj transformiĝoj de sennombraj kaj komplikaj realaj kontraŭoj kaj ne estas konkretaj transformiĝoj montritaj en konkretaj kontraŭoj. Marks diris: "Ĉia mitologio konkeras, superregas kaj figurigas la fortojn de naturo en imago kaj helpe de imago; sekve ĝi malaperas kiam la fortoj de naturo estas efektive superregitaj."[28] Kvankam tiuj rakontoj pri senfinaj metamorfozoj en mitologio (kaj ankaŭ en fabeloj) plaĉas al homoj, ĉar ili reprezentas image la konkeradon de la fortoj de naturo fare de homoj, kaj, krome, la plej bonaj mitoj posedas "eternan ĉarmon" (*Marks*), tamen la mitoj ne estas bazitaj sur certaj kondiĉoj de konkretaj kontraŭdiroj kaj pro

tio ne estas scienca speguliĝo de realo. Tio signifas, ke en mitoj aŭ fabeloj la flankoj kiuj konsistigas kontraŭdiron havas ne konkretan, sed nur imagan identecon. La scienca speguliĝo de la identeco en realaj ŝanĝoj estas marksisma dialektiko.

Kial ovo povas transformiĝi en kokidon, sed ŝtono ne? Kial ekzistas identeco inter milito kaj paco, sed ne inter milito kaj ŝtono? Kial homo povas naski nur homon, sed ne ion alian? Ne estas alia kaŭzo ol tio, ke la identeco de kontraŭoj ekzistas nur sub certaj necesaj kondiĉoj. Sen certaj necesaj kondiĉoj ne povas ekzisti ia ajn identeco.

Kial en Rusio la burĝara demokratia Februara Revolucio de 1917 rekte interligiĝis kun la proletara socialisma Oktobra Revolucio de la sama jaro, dum en Francio la burĝara revolucio ne rekte interligiĝis kun socialisma revolucio kaj la Pariza Komunumo de 1871[29] finfine malsukcesis? Kial la nomada sistemo de Mongolio kaj Centra Azio rekte interligiĝis kun socialismo?

Kial la ĉina revolucio povas eviti kapitalisman estontecon kaj rekte interligiĝi kun socialismo, sen trairo de la malnova historia vojo de la okcidentaj landoj kaj sen trapaso de periodo de burĝara diktaturo? Ĉion ĉi tion kaŭzis nenio alia ol la siatempaj konkretaj kondiĉoj. Kiam maturiĝas certaj necesaj kondiĉoj, en la procezo de disvolviĝo de objekto ekaperas certaj kontraŭoj, kaj, cetere, tiuj kontraŭoj (paro aŭ pli multe da) estas interdependaj por ekzisto kaj transformiĝas unu en la alian; alie, nenio estas ebla.

Tia estas la problemo pri identeco. Kio do estas bataleco? Kia estas la rilato inter identeco kaj bataleco?

Lenin diris:

> La unueco (koincido, identeco, egalago) de kontraŭoj estas kondiĉa, portempa, efemera, relativa. La batalo de reciproke ekskluzivaj kontraŭoj estas absoluta, same kiel disvolviĝo kaj movado estas absolutaj.[30]

Kion signifas tiuj vortoj de Lenin?

Ĉiuj procezoj havas komencon kaj finon kaj transformas sin en siajn kontraŭaĵojn. La konstanteco de ĉiuj procezoj estas relativa, sed la ŝanĝiĝemo montrita en la transformiĝo de unu procezo en la alian estas absoluta.

La movado de ĉia objekto montriĝas en du statoj: la stato de relativa senmoveco kaj la stato de evidenta ŝanĝiĝo. Ambaŭ statoj de movado estas kaŭzitaj de la batalo inter la du kontraŭdiraj faktoroj interne de objekto. Kiam la movado de objekto troviĝas en la unua stato, ĝi ŝanĝiĝas nur kvante kaj ne kvalite, kaj sekve sin montras ŝajne senmova. Kiam la movado de objekto troviĝas en la dua stato, ĝi jam atingis iun kulminan punkton de la kvanta ŝanĝo de la unua stato, kaŭzis la dissolviĝon de la unueca objekto, okazigis kvalitan ŝanĝon kaj tial sin prezentas en evidenta ŝanĝiĝo. La unueco, solidareco, interligo, harmonio, ekvilibro, stabileco, stagno, senmoveco, konstanteco, egalpezo, kondensado, altiro

ktp., kiujn ni vidas en ĉiutaga vivo, ĉiuj estas la aspektoj de objektoj en la stato de kvanta ŝanĝiĝo. Dume la dissolviĝo de la unueca objekto, la rompiĝo de la stato de solidareco, interligo, harmonio, ekvilibro, stabileco, stagno, senmoveco, konstanteco, egalpezo, kondensado, altiro ktp. kaj ilia ŝanĝiĝo en la kontraŭan staton, ĉiuj estas la aspektoj de objektoj en la stato de kvalita ŝanĝiĝo, dum la transpaso de unu procezo al la alia. Objektoj senĉese transformiĝas de la unua stato al la dua, dum la batalo de kontraŭoj ekzistas en ambaŭ statoj kaj la solviĝo de la kontraŭdiro estas atingata tra la dua stato. Tial estas dirite, ke la unueco de kontraŭoj estas kondiĉa, portempa kaj relativa, sed la batalo de reciproke ekskluzivaj kontraŭoj estas absoluta.

Supre ni diris, ke inter du kontraŭaĵoj ekzistas identeco kaj tial ili povas kunekzisti en unueca ento kaj ankaŭ transformiĝi unu en la alian; per tio ni klarigis kondiĉecon, t.e., en certaj kondiĉoj kontraŭdiraj objek-

toj povas unuiĝi kaj ankaŭ transformi sin reciproke unu en la alian; sen tiuj kondiĉoj ili ne povas esti en kontraŭdiro kaj povas nek kunekzisti nek transformiĝi unu en la alian. Ĉar la identeco de kontraŭoj formiĝas nur sub certaj kondiĉoj, tial ĝi estas kondiĉa, relativa. Ĉi tie ni diras aldone, ke la batalo de kontraŭoj trairas procezon de la komenco ĝis la fino kaj igas unu procezon transformiĝi en alian; la batalo de kontraŭoj troviĝas ĉie senescepte, tial estas dirite ke la bataleco de kontraŭoj estas senkondiĉa, absoluta.

La kombino de kondiĉa, relativa identeco kun senkondiĉa, absoluta bataleco konsistigas la movadon de kontraŭdiroj en ĉiuj objektoj.

Ni ĉinoj ofte diras: "Reciproke kontraŭaj kaj reciproke kompletigaj."[31] Tio signifas, ke ekzistas identeco inter kontraŭaĵoj. Tiu diro estas dialektika kaj kontraŭa al metafiziko. "Reciproke kontraŭaj" signifas la reciprokan ekskluzivon aŭ batalon inter

la du kontraŭdiraj flankoj. "Reciproke kompletigaj" signifas ke la du kontraŭdiraj flankoj interligiĝas sub certaj kondiĉoj kaj atingas identecon. Kaj bataleco ekzistas ĝuste en identeco; sen bataleco ne povas esti identeco.

En identeco estas bataleco, en partikulareco estas universaleco kaj en karaktero individua estas karaktero komuna. Per la vortoj de Lenin "... *en* la relativa *estas* la absoluta."[32]

VI. LA LOKO DE ANTAGONISMO EN KONTRAŬDIRO

La problemo de la bataleco de kontraŭoj inkluzivas la demandon, kio estas antagonismo. Nia respondo estas: antagonismo estas unu formo, sed ne la unika formo, de la batalo de kontraŭoj.

En la homa historio, ekzistas klasa antagonismo, ĝi estas partikulara manifesto de la batalo de kontraŭoj. Koncerne al kon-

traŭdiro inter la ekspluatanta klaso kaj la ekspluatata klaso, ĉu en sklava socio, ĉu en feŭda socio, ĉu en kapitalisma socio, tiuj du reciproke kontraŭdiraj klasoj kune ekzistas por longa tempo en sama socio kaj batalas unu kontraŭ la alia; sed nur kiam la kontraŭdiro inter la du klasoj disvolviĝas ĝis certa stadio, ili ekprenas la formon de ekstera antagonismo, kaj la kontraŭdiro transformiĝas en revolucion. En klasa socio ankaŭ la transformiĝo de paco en militon iras laŭ la sama maniero.

Antaŭ sia eksplodo, bombo estas unueca ento en kiu kunekzistas kontraŭaĵoj pro certaj kondiĉoj. Nur kiam aperas nova kondiĉo (ekbruligo), la eksplodo ekokazas. Analoga stato troviĝas en ĉiuj naturaj fenomenoj, kiam ili finfine prenas la formon de ekstera konflikto por solvi malnovajn kontraŭdirojn kaj produkti novajn objektojn.

Estas treege grave koni tiun staton. Ĝi ebligas al ni kompreni, ke en klasa socio

revolucioj kaj revoluciaj militoj estas neeviteblaj, ke sen ili la salto en socia disvolviĝo ne povas plenumiĝi, la reakcia reganta klaso ne povas esti renversita kaj tiel la popolo ne povas akiri la politikan potencon. Komunistoj devas senmaskigi la trompan propagandon de la reakciuloj ke socia revolucio estas nenecesa kaj neebla, kaj ili devas firme persisti en la marksism-leninisma teorio pri socia revolucio kaj komprenigi al la popolo, ke socia revolucio estas ne nur absolute necesa sed ankaŭ tute ebla, kaj ke la tuta historio de la homaro kaj la triumfo de Sovetunio konfirmis tiun ĉi sciencan veron.

Sed ni devas konkrete studi la staton de diversspecaj bataloj de kontraŭoj kaj ne devas apliki nekonvene la supre diritan formulon al ĉiuj objektoj. Kontraŭdiro kaj batalo estas universalaj kaj absolutaj, sed la metodoj por solvi kontraŭdirojn, t.e. la formoj de batalo, varias laŭ la diferencoj en la naturo de la kontraŭdiroj. Iuj kon-

traŭdiroj estas karakterizitaj per malkaŝa antagonismo kaj aliaj ne. Konforme al la konkreta disvolviĝo de objektoj, iuj kontraŭdiroj, origine ankoraŭ ne antagonismaj, disvolviĝas en antagonismajn, dum aliaj, origine antagonismaj, disvolviĝas en neantagonismajn.

Kiel ni diris supre, la kontraŭdiro inter ĝustaj kaj eraraj ideoj interne de la komunista partio estas speguliĝo de la klasaj kontraŭdiroj en la partio, dum la tempo kiam klasoj ankoraŭ ekzistas. En la komenco, aŭ en apartaj demandoj, tia kontraŭdiro ne ĉiam tuj sin prezentas antagonisma. Sed kun la disvolviĝo de la klasbatalo, tia kontraŭdiro povas ankaŭ disvolviĝi en antagonisman. La historio de la Komunista Partio de Sovetunio montras al ni, ke la kontraŭdiro inter la ĝustaj ideoj de Lenin kaj Stalin kaj la eraraj ideoj de Trocki,[33] Buĥarin kaj aliaj en la komenco ankoraŭ ne prezentis sin en formo antagonisma, sed poste ĝi disvolviĝis en antagonisman. Si-

mila kazo okazis ankaŭ en la historio de la Komunista Partio de Ĉinio. La kontraŭdiro inter la ĝustaj ideoj de multaj kamaradoj en nia Partio kaj la eraraj ideoj de Ĉen Duhiu, Ĝang Guotaŭ kaj aliaj en la komenco ankaŭ ne prezentis sin en antagonisma formo, sed poste ĝi disvolviĝis en antagonisman. Nun la kontraŭdiro inter la ĝustaj ideoj kaj la eraraj ideoj en nia Partio ne prezentas sin en antagonisma formo kaj, se la erarintaj kamaradoj povos korekti siajn erarojn, ĝi ne disvolviĝos en antagonisman. Tial, la Partio devas unuflanke fari seriozan batalon kontraŭ la eraraj ideoj kaj aliflanke doni al la erarintaj kamaradoj sufiĉan ŝancon por konscii pri siaj eraroj. Sub tiaj kondiĉoj, ekscesa batalo evidente ne konvenas. Sed, se la erarintoj obstinas en siaj eraroj kaj eĉ pligravigas ilin, estas ankaŭ eble ke la kontraŭdiro disvolviĝos en antagonisman.

Ekonomie, la kontraŭdiro inter la urboj kaj kamparo en kapitalisma socio (kie la urboj sub la regado de la burĝaro senkompate rabas la kamparon) kaj en la regionoj regataj de Kuomintango en Ĉinio (kie la urboj sub la regado de fremdlanda imperismo kaj la enlanda kompradora egburĝaro sovaĝege rabas la kamparon) estas ekstreme antagonisma. Sed en socialisma lando kaj en niaj revoluciaj bazlokoj, tia antagonisma kontraŭdiro fariĝas neantagonisma, kaj en komunisma socio tia kontraŭdiro malaperos.

Lenin diris: "Antagonismo kaj kontraŭdiro tute ne estas unu kaj la sama. La unua malaperos, la dua restos sub socialismo."[34] Tio signifas, ke antagonismo estas nur unu formo, sed ne la unika formo, de la batalo de kontraŭoj, kaj tiu formulo ne devas esti mekanike aplikata ĉie.

VII. KONKLUDO

Nun ni povas fari mallongan resumon. La leĝo de kontraŭdiro en objektoj, t.e. la leĝo de la unueco de kontraŭoj, estas la

fundamenta leĝo de naturo kaj socio kaj sekve ankaŭ la fundamenta leĝo de penso. Ĝi estas kontraŭa al la metafizika mondkoncepto. Ĝi estas granda revolucio en la historio de homa konado. Laŭ la vidpunkto de dialektika materiismo, kontraŭdiro ekzistas en ĉiuj procezoj de objektivaj objektoj kaj de subjektiva penso kaj trairas ĉiujn procezojn de la komenco ĝis la fino; tio estas la universaleco kaj absoluteco de kontraŭdiro. Kontraŭdira objekto kaj ĉiu el ĝiaj flankoj havas respektive sian karakterizan trajton; tio estas la partikulareco kaj relativeco de kontraŭdiro. Kontraŭdiraj objektoj, en certaj kondiĉoj, estas karakterizitaj per identeco, kaj sekve ili povas kunekzisti en unueca ento kaj ankaŭ transformiĝi reciproke en la kontraŭan flankon; ankaŭ tio estas la partikulareco kaj relativeco de kontraŭdiro. Sed la batalo de kontraŭoj estas senĉesa, kaj ĝi ĉiam ekzistas, ĉu en la tempo kiam la kontraŭoj kunekzistas, ĉu en la tempo kiam ili transformiĝas unu en

la alian, kaj precipe en la lasta kazo la batalo montriĝas des pli evidenta; ankaŭ tio estas la universaleco kaj absoluteco de kontraŭdiro. Ĉe nia studo pri la partikulareco kaj relativeco de kontraŭdiro, ni devas atenti la diferencon inter la ĉefa kaj la neĉefaj kontraŭdiroj, inter la ĉefa kaj la neĉefa flankoj de kontraŭdiro, kaj ĉe nia studo pri la universaleco de kontraŭdiro kaj bataleco de kontraŭoj, ni devas atenti la diferencon inter la diversaj formoj de batalo de kontraŭoj; alie, ni faros erarojn. Se, post studo, ni vere komprenas la esencajn punktojn supre diritajn, ni povos frakasi tiujn dogmismajn ideojn kiuj estas kontraŭaj al la fundamentaj principoj de Marksismo-Leninismo kaj malutilas al nia revolucia afero, kaj tiam ni ankaŭ povos helpi al niaj multspertaj kamaradoj sistemigi siajn spertojn, animi ilin per principeco kaj tiel eviti la ripeton de eraroj de empiriismo. Jen estas simplaj konkludoj atingitaj en nia studo pri la leĝo de kontraŭdiro.

KLARIGOJ

1. V. I. Lenin, "Rimarkoj pri Libro de Hegel *Lekcioj pri la Historio de Filozofio*", *Kolektitaj Verkoj*, vol. I, "La Eleata Skolo". Vd. V. I. Lenin, "Resumo de Libro de Hegel *Lekcioj pri la Historio de Filozofio*" (1915).

2. Vd. V. I. Lenin, "Pri la Problemo de Dialektiko" (1915): "La dividiĝo de unueca objekto en du kaj la konado de ĝiaj kontraŭdiraj partoj (vd. la citaĵon el Philo pri Heraclitus en la komenco de sekcio III ('Pri Konado') de libro de Lassalle pri Heraclitus) estas la *esenco* (unu el la 'esencaĵoj', unu el la ĉefaj, se ne la ĉefa, karakterizoj aŭ trajtoj) de dialektiko." Vd. ankaŭ V. I. Lenin, "Rimarkoj pri Libro de Hegel *Scienco de Logiko*", parto III, ĉapitro III, "La Ideo": "Koncize dialektiko povas esti difinita kiel la doktrino pri la unueco de kontraŭoj. Tio kaptas la kernon de dialektiko, sed tio bezonas klarigon kaj disvolvon." Vd. V. I. Lenin, "Resumo de Libro de Hegel *Scienco de Logiko*" (septembro — decembro de 1914).

3. Deborin (1881 — 1963), sovetunia filozofo, estis membro de la Scienca Akademio de Sovetunio. En 1930, filozofiaj rondoj de Sovetunio lanĉis kritikon al Deborin-skolo, montrante, ke

ĝi faris ideismajn erarojn apartigi teorion disde praktiko kaj apartigi filozofion disde politiko.

4. V. I. Lenin, "Pri la Problemo de Dialektiko".

5. Dong Ĝongŝu (179 — 104 a.K.), fame konata reprezentanto de la konfucia skolo en Han-dinastio, iam diris al la imperiestro Vu-di: "La *daŭ* devenas primitive de la ĉielo. La ĉielo neniam ŝanĝiĝas, nek la *daŭ*." *Daŭ* estis komune uzata termino inter la ĉinaj antikvaj filozofoj. Ĝia senco estas "vojo" aŭ "principo", kaj ankaŭ "leĝo" aŭ "regulo".

6. F. Engels, *Anti-Dühring*, parto I, ĉapitro XII, "Dialektiko. Kvanto kaj Kvalito" (1877—1878).

7. V. I. Lenin, "Pri la Problemo de Dialektiko".

8. F. Engels, *Anti-Dühring*, parto I, ĉapitro XII, "Dialektiko. Kvanto kaj Kvalito".

9. V. I. Lenin, "Pri la Problemo de Dialektiko".

10. Buĥarin (1888 — 1938) estis la ĉefo de kontraŭleninisma sekto en la rusa revolucia movado, kaj poste, li estis eksigita en 1937 el la Partio pro tio, ke li partoprenis en naciperfida kliko. En 1938 li estis kondamnita al morto de la Sovetunia

Superega Juĝejo. Ĉi tie kamarado Maŭ Zedong kritikas eraran opinion, ĉe kiu Buĥarin longtempe persistis. Tiu erara opinio estas kovri klasajn kontraŭdirojn kaj anstataŭigi klasbatalon per klasa kunlaboro. En la jaroj 1928 — 1929, kiam Sovetunio sin preparis por efektivigi plenampleksan agrikulturan kolektivigon, Buĥarin pli malkaŝe elmetis tiun eraran opinion, penante kovri la klasan kontraŭdiron inter la riĉkamparanoj kaj la malriĉkamparanoj kaj mezkamparanoj, oponi firman batalon kontraŭ la riĉkamparanoj. Li ankaŭ absurde opiniis, ke la laborista klaso povas starigi aliancon kun la riĉkamparanoj kaj la riĉkamparanoj povas "pace kreski en socialismon".

11. V. I. Lenin, "Pri la Problemo de Dialektiko".

12. Vd. V. I. Lenin, "Komunismo" (12 junio 1920). En la artikolo Lenin kritikis la hungaran komuniston Bela Kun, dirante: "Li forĵetas la plejan esencon, la vivantan animon de Marksismo: la konkretan analizon de konkreta situacio."

13. Vd. *Sun Zi*, "Planado de Atako".

14. Vej Ĝeng (580 — 643 p.K.) estis politika aktivulo kaj historiisto en la unuaj jaroj de Tang-dinastio. La citaĵo en la nuna artikolo estas el volumo 192 de *Zi Ĝi Tong Gian.*

15. *Ĉe la Akvobordo* estas romano priskribanta kamparanan militon en la lastaj jaroj de la Norda Song-dinastio. Song Giang estas ĉefa heroo de la romano. Ĝugiaĝuang situis proksime de Liangŝanbo, la bazloko de la kamparana milito. La reganto de Ĝugiaĝuang estis granda despotbienulo nomata Ĝu Ĉaŭfeng.

16. "La Ĉevalo de Trojo" estas famkonata rakonto el greka mitologio. Laŭdire, antikvaj grekoj atakis la urbon Trojo, sed longe ne sukcesis ĝin venkopreni. Poste, ili ŝajnigis retiriĝi kaj lasis en kampejo ĉe la urba muro grandegan lignoĉevalon, en kiu sin kaŝis aro da kuraĝuloj. Ne sciante, ke tio estas la intrigo de la malamiko, la trojanoj tiris ĝin kiel trofeon en la urbon. En profunda nokto, elirinte el la lignoĉevalo kaj utiligante la sengardemon de la trojanoj, la kuraĝuloj kunagis kun la eksterurbaj trupoj kaj rapide kaptis la urbon Trojo.

17. V. I. Lenin, "Ankoraŭfoje pri la Sindikatoj, pri la Nuna Situacio kaj pri la Eraroj de Trocki kaj Buĥarin" (januaro de 1921).

18. La kvar nordorientaj provincoj aludas al la tiamaj provincoj Liaŭning, Gilin, Hejlonggiang kaj Ĵehe en la nordorienta parto de Ĉinio, kiuj respondas al la nunaj tri provincoj Liaŭning, Gilin kaj Hejlonggiang kaj la nordorienta parto de

la provinco Hebej norde de la Granda Muro. Post la Evento de 18-a de Septembro 1931, la japanaj agresantoj okupis la tri provincojn Liaŭning, Gilin kaj Hejlonggiang kaj en 1933 ankaŭ Ĵehe.

19. Influate de la Ĉina Ruĝa Armeo kaj la kontraŭjapana movado de la popolo, la kuomintanga Nordorienta Armeo estrata de Ĝang Hjueliang kaj la kuomintanga 17a-voja Armeo estrata de Jang Huĉeng konsentis pri la kontraŭjapana nacia unuecfronto elmetita de la Komunista Partio de Ĉinio kaj postulis, ke Ĉiang Kajŝek kunligiĝu kun la Komunista Partio por rezisti kontraŭ Japanio. Ĉiang Kajŝek rifuzis la postulon, kaj eĉ pli malice agis, aktive preparis militan agadon de "ekstermo al komunistoj" kaj subpremis la kontraŭjapanan movadon de studentoj en Hi'an. En la 12-a de decembro 1936, Ĝang kaj Jang okazigis la Hi'an-an Eventon kaj arestis Ĉiang Kajŝek. Post la okazo de la evento, la Komunista Partio de Ĉinio esprimis sian firman subtenon al la patriota ago de Ĝang kaj Jang kaj samtempe postulis solvi ĉifojan eventon sur la bazo de unuiĝo por rezisti kontraŭ Japanio. La 25-an de decembro, Ĉiang Kajŝek estis devigita akcepti la kondiĉojn de kunligiĝo kun la Komunista Partio por

rezisti kontraŭ Japanio kaj estis liberigita por reveni al Nankino.

20. Dum kelkaj jardekoj de la fino de la dekoka jarcento, Britio eksportis ĉiam pli da opio en Ĉinion. La enporto de opio grave venenis la ĉinan popolon kaj forrabis grandan kvanton da arĝento el Ĉinio. La opi-negoco estis oponata de Ĉinio. Sub la preteksto protekti komercon, la brita registaro lanĉis armitan agreson kontraŭ Ĉinio en 1840. La ĉina armeo rezistis sub la gvido de Lin Zehju. La popolo de Kantono spontane organizis Ping Jing Tuan (Korpuson por Subigi Britio), kiu donis al la britaj agresantoj tre grandajn batojn. En 1842, la putriĝinta registaro de King-dinastio subskribis kun la britaj agresantoj la "Nankinan Traktaton", en kiu estis konsentitaj krom monkompenso kaj la forcedo de Hongkong al Britio, ankaŭ la malfermo de komercaj havenoj en Ŝanhajo, Fuĝoŭ, Hiamen, Ningbo kaj Kantono, kaj ke la dogana tarifo de varoj importotaj de Britio en Ĉinion estos fiksita laŭ la konsento de ambaŭ flankoj.

21. La Ĉina-Japana Milito okazinta en 1894 estis kaŭzita de invado fare de Japanio kontraŭ Koreio kaj provoko al la teraj kaj maraj fortoj de Ĉinio. En la milito, la ĉinaj trupoj brave batalis, sed pro la koruptiĝo de la registaro de

King-dinastio kaj ĝia manko de preparo por firma opono kontraŭ la agreso, la ĉina flanko suferis malvenkon. Kiel rezulto, la registaro de King-dinastio subskribis kun Japanio la hontindan Traktaton de Ŝimonoseki.

22. V. I. Lenin, "Kion Fari?", ĉapitro I, sekcio 4 (aŭtuno de 1901 — februaro de 1902).

23. V. I. Lenin, "Rimarkoj pri Libro de Hegel *Scienco de Logiko*", parto I, ĉapitro I, "Determineco (Kvalito)". Vd. V. I. Lenin, "Resumo de Libro de Hegel *Scienco de Logiko*".

24. *Libro de Montoj kaj Maroj* estas verko en la epoko de la Militantaj Regnoj (403 — 221 a.K.). Kuafu estas superhomo, priskribita en la *Libro de Montoj kaj Maroj*. La libro rakontas: "Kuafu persekutis la sunon. Atinginte la lokon, kie la suno subiris, li suferis de soifo kaj trinkis akvon ĉe la Flava Rivero kaj Vejhe-rivero. La akvo de tiuj du riveroj ne sufiĉis, kaj li kuris al nordo por trinki el granda maro. Sed, ne atinginte la lokon, li mortis duonvoje pro soifo. La bastono postlasita de li transformiĝis en arbaron."

25. Ji estas unu el la legendaj herooj de antikva Ĉinio. Paffaligo de sunoj estas fame konata rakonto pri lia lerteco en arkpafado. La libro *Huaj Nan Zi*, kompilita de Liu An (nobelo en la 2-a jarcento a.K.) en la epoko de Han-dinastio,

rakontas: "Dum la tempo de reĝo Jaŭ sur la ĉielo troviĝis samtempe dek sunoj, forbrulis ĉiuj grenplantaĵoj, pereis ĉiuj vegetaĵoj, kaj la popolo havis nenion por manĝi. Multaj sovaĝaj bestoj faris damaĝon al la popolo. Jaŭ ordonis Ji paffaligi la dek sunojn sur la ĉielo kaj ĉasi la sovaĝajn bestojn sur la tero . . . La tuta popolo ĝojegis." Vang Ji (verkisto en la 2-a jarcento p.K.) de la Orienta Han-dinastio, en la klarigoj pri la poemo de antikva poeto Kju Juan "Tian Ven", diris: "En *Huaj Nan Zi* estas skribite, ke dum la tempo de reĝo Jaŭ sur la ĉielo troviĝis samtempe dek sunoj kaj forbrulis ĉiuj vegetaĵoj. Jaŭ ordonis Ji paffaligi la dek sunojn sur la ĉielo. Li paffaligis naŭ el la dek sunoj . . . kaj unu suno restis."

26. *Pilgrimado al la Okcidento* estas ĉina mitologia romano verkita en la 16-a jarcento p.K. Sun Vukong, ĉefa heroo de la romano, estas supernatura simio kun magia povo de metamorfozo, kiu povas ŝanĝi sin laŭvole en 72 formojn de birdo, besto, insekto, fiŝo, herbo, arbo, diversaj instrumentoj, homo k.a.

27. *Notoj pri Strangaĵoj de Liaŭĝaj* estas novelkolekto el 431 pecoj, verkita de Pu Songling de King-dinastio (en la 17-a jarcento p.K.), surbaze de la popolaj rakontoj de li kolektitaj. La plej-

parto el ili temas pri senmortuloj, vulpospiritoj kaj fantomoj.

28. K. Marks, "Antaŭparolo al la Kritiko de Politika Ekonomio" (1857 — 1858).

29. La Pariza Komunumo estis la unua proletara organo de ŝtatpotenco en la monda historio. En la 18-a de marto 1871, la franca proletaro ribelis en Parizo kaj kaptis potencon. Gvidita de la proletaro, la Pariza Komunumo estis fondita en la 28-a de marto tra elektado. Ĝi estis la unua revolucia provo de la proletaro por frakasi la burĝaran ŝtatan maŝinon kaj senprecedenca faro anstataŭigi la renversitan burĝaran ŝtatpotencon per la proletara ŝtatpotenco. Ne estante sufiĉe matura siatempe, la franca proletaro ne donis atenton al unuiĝo kun sia aliancano, la vastaj kamparanaj amasoj, estis tro malsevera al la kontraŭrevoluciuloj kaj ne lanĉis firman militan atakon en ĝusta tempo. Sekve la kontraŭrevolucio povis senhaste kolekti siajn forpelitajn fortojn, denove reveni kaj fari sovaĝan masakron al la ribelantaj amasoj. La Pariza Komunumo falis en la 28-a de majo.

30. V. I. Lenin, "Pri la Problemo de Dialektiko".

31. Tiu ĉi diro unue aperis en la *Historio de la Antaŭa Han-dinastio* (vol. 30, ĉapitro "Ji Ven Ĝi") verkita de Ban Gu (fame konata ĉina historiisto en la 1-a jarcento p.K.). Ĝi estas longe cirkulinta diro.

32. V. I. Lenin, "Pri la Problemo de Dialektiko".

33. Trocki (1879 — 1940) komence estis la ĉefo de kontraŭleninisma sekto en la rusa revolucia movado, kaj poste komplete degeneris kaj aliĝis al kontraŭrevolucia bando. Li estis eksigita el la Partio de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Sovetunio en 1927. Li estis ekzilita de la Sovetunia Registaro en 1929 kaj senigita je sovetunia nacieco en 1932. Li mortis eksterlande en 1940.

34. V. I. Lenin, "Rimarkoj pri Libro de N. I. Buĥarin *Ekonomiko de la Transira Periodo*" (majo de 1920).

PRI LA ĜUSTA TRAKTADO DE KONTRAŬDIROJ INTERNE DE LA POPOLO*

(*27 februaro 1957*)

Nia ĝenerala subjekto estas la problemo pri la ĝusta traktado de kontraŭdiroj interne de la popolo. Por plifaciligi la eksplikadon, ni dividu ĝin en dek du subtitolojn. Kvankam ni ankaŭ tuŝos la problemon de kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj, tamen ni ĉefe diskutos pri kontraŭdiroj interne de la popolo.

---

*Tio ĉi estas la parolado farita de kamarado Maŭ Zedong ĉe la Dekunua (Plivastigita) Sesio de la Plej Alta Ŝtata Konferenco. Poste kamarado Maŭ Zedong ĝin redaktis laŭ la tiama protokolo, faris kelkajn kompletigojn kaj publikigis ĝin en *Renmin Ribao* en la 19-a de junio 1957.

I. DU MALSAMAJ SPECOJ DE KONTRAŬDIROJ

Nuntempe nia lando estas senprecedence unuigita. La venkoj de la burĝar-demokratia revolucio kaj socialisma revolucio, kaj ankaŭ niaj atingoj en la socialisma konstruado rapide transformis la fizionomion de malnova Ĉinio. Antaŭ ni kuŝas des pli bela estonteco de la patrio. La stato de malunueco kaj ĥaoso de la nacio, kiun la popolo abomenis, estas jam forpasinta por ĉiam. Sub la gvido de la laborista klaso kaj la Komunista Partio nia sescentmiliona popolo entreprenas la grandan socialisman konstruadon en perfekta solidareco. La unueco de la lando, la solidareco de la popolo kaj la solidareco de niaj diversaj naciecoj — jen estas la fundamentaj garantioj por la nepra triumfo de nia afero. Tamen, tio ne signifas, ke en nia socio jam ne estas iaj ajn kontraŭdiroj. La penso de malesto de kontraŭdiroj estas supozo

naiva, ne konformanta al la objektiva realeco. Antaŭ ni estas du specoj de sociaj kontraŭdiroj — la kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj kaj tiuj interne de la popolo. Tiuj ĉi du specoj de kontraŭdiroj estas tute malsamaj en naturo.

Por ĝuste koni tiujn ĉi du malsamajn specojn de kontraŭdiroj — la kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj kaj tiuj interne de la popolo, oni devas unue kompreni klare, kio estas "la popolo" kaj kio "la malamikoj". La koncepto de "la popolo" tenas en si malsaman enhavon en diferencaj landoj kaj en diferencaj historiaj periodoj de ĉiu aparta lando. Prenu nian landon kiel ekzemplon. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, ĉiuj kontraŭjapanaj klasoj, tavoloj kaj sociaj grupoj apartenis al la kategorio de la popolo, dum la japanaj imperiistoj, ĉinaj naciperfiduloj kaj projapanaj elementoj estis malamikoj de la popolo. En la periodo de la Liberiga Milito, la usonaj imperiistoj kaj iliaj lakeoj — la

burokrata burĝaro, la bienula klaso kaj la kuomintangaj reakciuloj reprezentantaj tiujn ĉi du klasojn — ĉiuj estis malamikoj de la popolo, dum ĉiuj aliaj klasoj, tavoloj kaj sociaj grupoj, kiuj kontraŭstaris tiujn ĉi malamikojn, apartenis al la kategorio de la popolo. En la nuna stadio, la periodo de socialisma konstruado, ĉiuj klasoj, tavoloj kaj sociaj grupoj, kiuj aprobas, subtenas kaj partoprenas la aferon de la socialisma konstruado, apartenas al la kategorio de la popolo, dum ĉiuj sociaj fortoj kaj grupoj, kiuj rezistas kontraŭ la socialisma revolucio kaj malamike traktas, subfosas la socialisman konstruadon, estas malamikoj de la popolo.

La kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj estas antagonismaj kontraŭdiroj. La kontraŭdiroj interne de la popolo, se oni parolas pri la kontraŭdiroj inter la laborantaj popolanoj, estas neantagonismaj, dum tiuj inter la ekspluatata kaj ekspluatanta klasoj havas, krom la antagonisma flanko, ankaŭ la flankon neantagonisman. Kontraŭdiroj

interne de la popolo ekestas ne de nun, sed ili tenas en si malsaman enhavon en diversaj revoluciaj periodoj kaj en la periodo de socialisma konstruado. En la hodiaŭaj kondiĉoj de nia lando, la kontraŭdiroj interne de la popolo inkluzivas la kontraŭdirojn interne de la laborista klaso, la kontraŭdirojn interne de la kamparana klaso, la kontraŭdirojn interne de la intelektularo, la kontraŭdirojn inter la laborista kaj kamparana klasoj, la kontraŭdirojn inter la laboristoj kaj kamparanoj unuflanke kaj la intelektuloj aliflanke, la kontraŭdirojn inter la laborista klaso kaj aliaj sekcioj de la laboranta popolo unuflanke kaj la nacia burĝaro aliflanke, la kontraŭdirojn interne de la nacia burĝaro ktp. Nia Popola Registaro estas registaro kiu efektive reprezentas la interesojn de la popolo kaj servas al la popolo, sed sin trovas ankaŭ certaj kontraŭdiroj inter la registaro kaj la popolamasoj. Tiuj kontraŭdiroj inkluzivas la kontraŭdirojn inter la

ŝtataj interesoj, la kolektivaj interesoj kaj la individuaj interesoj, inter demokratio kaj centralizismo, inter la gvidantoj kaj la gvidatoj kaj inter la burokratisma laborstilo de iuj el la laborantoj de la ŝtataj organoj kaj la popolamasoj. Ankaŭ tiuj ĉi estas kontraŭdiroj interne de la popolo. Ĝeneraldire, la kontraŭdiroj interne de la popolo estas kontraŭdiroj sur la bazo de fundamenta identeco de la interesoj de la popolo.

En nia lando, la kontraŭdiro inter la laborista klaso kaj la nacia burĝaro apartenas al kontraŭdiroj interne de la popolo. La klasbatalo inter la laborista klaso kaj la nacia burĝaro ĝenerale apartenas al klasbatalo interne de la popolo, ĉar la nacia burĝaro de nia lando havas duoblan karakteron. En la periodo de la burĝardemokratia revolucio, ĝi havis flankon revolucieman, kaj ankaŭ flankon kompromiseman. En la periodo de la socialisma revolucio, ĝi havas la flankon de

ekspluatado al la laborista klaso por gajni profiton, kaj ankaŭ la flankon de subtenado al la Konstitucio kaj volonteco akcepti socialisman transformadon. La nacia burĝaro diferencas de imperiismo, la bienula klaso kaj la burokrat-burĝaro. Inter la nacia burĝaro kaj la laborista klaso ekzistas kontraŭdiro de la ekspluatanto kaj la ekspluatato, kontraŭdiro antagonisma laŭ sia naturo. Sed en la konkretaj kondiĉoj de nia lando, la antagonisma kontraŭdiro inter la du klasoj, se bone traktate, povas esti transformita en neantagonisman kontraŭdiron kaj solvita per pacaj metodoj. Se ni ne ĝuste traktos ĝin, ne alprenos la politikon de unuiĝo, kritikado kaj edukado en rilato kun la nacia burĝaro, aŭ se la nacia burĝaro ne akceptos tiun nian politikon, do la kontraŭdiro inter la laborista klaso kaj la nacia burĝaro povos turniĝi en kontraŭdiron inter ni kaj la malamikoj.

La kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj diferencas de la kontraŭdiroj interne de la

popolo laŭ sia karaktero, kaj sekve ankaŭ la metodoj por solvi ilin devas esti diferencaj. Mallonge dirite, la antaŭaj estas problemo distingi inter ni kaj niaj malamikoj, dum la lastaj estas problemo distingi inter pravo kaj malpravo. Kompreneble, ankaŭ la problemo distingi inter ni kaj niaj malamikoj estas problemo distingi inter pravo kaj malpravo. Ekzemple, ankaŭ la problemo, kiuj estas pravaj, ni aŭ la reakciuloj enlandaj kaj eksterlandaj — la imperiistoj, la feŭdistoj kaj la burokrat-kapitalistoj — estas problemo de pravo kaj malpravo, sed ĝi estas problemo de pravo kaj malpravo de alia kategorio kaj diferencas en naturo de tiu interne de la popolo.

Nia ŝtato estas ŝtato de popol-demokratia diktaturo gvidata de la laborista klaso kaj bazita sur la laborist-kamparana alianco. Por kio estas tiu ĉi diktaturo? Ĝia unua funkcio estas subpremi la enlandajn reakciajn klasojn, reakciulojn kaj ekspluatantojn kiuj kontraŭstaras la socialisman revolucion,

subpremi tiujn kiuj subfosas nian socialisman konstruadon, tio estas, solvi la kontraŭdirojn inter ni kaj la malamikoj en la lando. Ekzemple, aresti, juĝi kaj kondamni iujn kontraŭrevoluciulojn, kaj senigi dum difinita periodo la elementojn de bienula klaso kaj burokrat-burĝaro je la rajto de voĉdono kaj libereco de parolo — ĉio ĉi tio estas en la sfero de diktaturo. Por defendi la socian ordon kaj la interesojn de la vastaj popolamasoj, ni devas praktiki diktaturon ankaŭ super ŝtelistoj, friponoj, murdistoj, incendiistoj, kanajlaj klikoj kaj aliaj malbonaj elementoj kiuj serioze subfosas la socian ordon. La dua funkcio de diktaturo estas defendi nian landon kontraŭ renversa aktivado kaj ebla agreso fare de la eksteraj malamikoj. Se aperos tia situacio, la diktaturo prenos sur sin la taskon solvi la kontraŭdiron inter ni kaj la eksteraj malamikoj. La celo de diktaturo estas defendi nian tutan popolon, por ke ĝi povu pace labori kaj konstrui nian landon en

socialisman landon kun moderna industrio, moderna agrikulturo kaj moderna scienco kaj kulturo. Kiu praktikas diktaturon? Kompreneble, la laborista klaso kaj la popolo sub ĝia gvido. La sistemo de diktaturo ne aplikiĝas interne de la popolo. La popolo ne povas praktiki diktaturon super si mem, nek devas unu parto de la popolo subpremi alian. Ankaŭ leĝorompantaj elementoj inter la popolo estos punataj laŭ la leĝo, sed tio estas diferenca en principo de la diktaturo por subpremi la malamikojn de la popolo. Interne de la popolo estas aplikata demokratia centralizismo. Nia Konstitucio difinas, ke civitanoj de la Ĉina Popola Respubliko ĝuas la liberecon de parolo, eldono, kunveno, asociado, parado, manifestacio, religia kredo ktp. Nia Konstitucio difinas ankaŭ, ke ŝtataj organoj devas praktiki demokratian centralizismon, ke ili devas sin apogi sur la popolamasoj, kaj ke la laborantoj de ŝtataj organoj devas servi al

la popolo. Nia socialisma demokratio estas la plej vasta demokratio, kian ne povas havi iu ajn kapitalisma lando. Nia diktaturo estas nomata la popol-demokratia diktaturo gvidata de la laborista klaso kaj bazita sur la laborist-kamparana alianco. Tio signifas, ke demokratio estas praktikata interne de la popolo, dum la laborista klaso, unuiĝante kun ĉiuj popolanoj, kiuj ĝuas civitanajn rajtojn, unuavice kun la kamparanoj, praktikas diktaturon super la reakciaj klasoj, reakciuloj kaj elementoj kiuj kontraŭstaras socialisman transformadon kaj socialisman konstruadon. Ĝui civitanajn rajtojn signifas, politike, ĝui la rajtojn de libereco kaj demokratio.

Sed tiu ĉi libereco estas libereco kun gvidado kaj tiu ĉi demokratio estas demokratio sub centralizita direktado, kaj ne estas anarkio. Anarkio ne konformas al la interesoj kaj deziroj de la popolo.

Iuj personoj en nia lando ĝojis, post kiam la hungara evento[1] okazis. Ili esperis,

ke io simila ankaŭ okazos en Ĉinio, ke miloj kaj miloj da homoj manifestacios surstrate kontraŭ la Popola Registaro. Tiaj esperoj estas kontraŭ la interesoj de la popolamasoj kaj ne povas ricevi ilian subtenon. Parto de la amasoj en Hungario, trompite de enlandaj kaj eksterlandaj kontraŭrevoluciaj fortoj, erare faris perfortajn agojn kontraŭ la Popola Registaro, rezulte la ŝtato kaj la popolo ambaŭ suferis. La ekonomia damaĝo kaŭzita de kelksemajna tumulto bezonos longan tempon por ripari. Aliaj personoj en nia lando montris ŝanceliĝon rilate al la hungara evento, ĉar ili ne komprenis la konkretan situacion de la mondo. Ili pensis, ke sub nia popola demokratia sistemo estas tro malmulte da libereco, ne tiom multe kiom sub la okcidenta parlamenta demokratia sistemo. Ili postulis, ke ni alprenu la okcidentan dupartian sistemon, sub kiu unu partio estas sur la scenejo dum la alia ekster ĝi. Sed la tiel nomata dupartia sistemo estas nenio

alia ol rimedo por konservi la diktaturon de la burĝaro; ĝi absolute ne povas gardi la liberecon de la laboranta popolo. Fakte, en la mondo ekzistas nur konkreta libereco kaj konkreta demokratio, kaj ne abstrakta libereco kaj abstrakta demokratio. En socio kun klasbatalo, kiam estas libereco por la ekspluatantaj klasoj ekspluati la laborantan popolon, tiam ne povas esti libereco por la laboranta popolo ne esti ekspluatata; kiam estas demokratio por la burĝaro, tiam ne povas esti demokratio por la proletaro kaj laboranta popolo. En kelkaj kapitalismaj landoj la komunistaj partioj estas permesitaj laŭleĝe ekzisti, sed nur ĝis la limo ke ili ne endanĝerigu la fundamentajn interesojn de la burĝaro; ekster tio ili jam ne estas permesitaj. Homoj, kiuj postulas abstraktan liberecon kaj abstraktan demokration, opinias, ke demokratio estas celo, kaj ne rekonas, ke ĝi estas rimedo. Demokratio kelkfoje ŝajnas celo, sed efektive ĝi estas nur rimedo.

Marksismo instruas al ni, ke demokratio apartenas al superstrukturo, al la kategorio de politiko. Tio estas, en la fina analizo, ĝi servas al la ekonomia bazo. Tia estas ankaŭ libereco. Demokratio kaj libereco ambaŭ estas relativaj, ne absolutaj, kaj ili estiĝas kaj disvolviĝas en la historio. Interne de la popolo, demokratio estas korelativa al centralizismo, dum libereco al disciplino. Ili estas du kontraŭdirantaj flankoj de unueca ento, ili estas kaj kontraŭdiraj kaj unuecaj, kaj ni ne devas unuflankece emfazi unu flankon kaj nei la alian. Interne de la popolo, ne povas malesti libereco, nek malesti disciplino; ne povas malesti demokratio, nek malesti centralizismo. La unueco de demokratio kaj centralizismo kaj tiu de libereco kaj disciplino estas nia demokratia centralizismo. Sub tiu ĉi sistemo, la popolo ĝuas vastajn demokration kaj liberecon kaj samtempe devas sin limigi per socialisma

disciplino. Ĉion ĉi tion ja komprenas la vastaj popolamasoj.

Kiam ni pledas por libereco kun gvidado kaj demokratio sub centralizita direktado, tio neniel signifas, ke devigaj metodoj povas esti uzataj por solvi problemojn ideologiajn kaj problemojn koncerne distingon de pravo kaj malpravo interne de la popolo. Ia ajn provo solvi problemojn ideologiajn aŭ problemojn koncernantajn pravon kaj malpravon per administraj ordonoj aŭ devigaj metodoj estas ne nur senefika, sed eĉ malutila. Ni ne povas forigi religion per administraj ordonoj, nek devigi homojn ne kredi je ĝi. Ni ne povas devigi homojn forlasi ideismon, nek devigi ilin kredi je Marksismo. Ĉiujn problemojn kun ideologia karaktero, ĉiujn disputajn problemojn interne de la popolo ni povas solvi nur per demokratiaj metodoj, per metodoj de diskuto, de kritiko, de persvado kaj eduko, kaj ne per devigaj kaj subpremaj metodoj. Por entrepreni produktadon kaj lernadon efike kaj vivi sian vivon bonorde, la popolo postulas, ke ĝia registaro, la gvidantoj de produktado kaj de kulturaj kaj edukaj organoj publikigu diversajn konvenajn administrajn ordonojn kun deviga karaktero. Sen tiaj administraj ordonoj la konservado de socia ordo estas neebla — tio estas komuna scio de ĉiuj. Administraj ordonoj kaj la metodo de persvado kaj eduko por solvi la kontraŭdirojn interne de la popolo estas du flankoj, kiuj interkompletigas unu la alian. Ankaŭ administraj ordonoj publikigitaj por la konservado de socia ordo devas esti akompanataj de persvadado kaj edukado, ĉar en multaj kazoj solaj administraj ordonoj ne efikos.

En 1942 ni konkretigis tiun ĉi demokratian metodon por solvi kontraŭdirojn interne de la popolo en la formulon "unuiĝo — kritiko — unuiĝo". Por pli detale diri, ĝi signifas: starti de la deziro por unuiĝo, solvi kontraŭdirojn per kritiko aŭ batalo

kaj tiamaniere atingi novan unuiĝon sur nova bazo. Laŭ nia sperto, tio estas ĝusta metodo por solvi kontraŭdirojn interne de la popolo. En 1942 ni aplikis tiun ĉi metodon por solvi kontraŭdirojn interne de la Komunista Partio, t.e., kontraŭdirojn inter la dogmistoj kaj la vasta partimembraro, inter ideoj dogmismaj kaj ideoj marksismaj. En la pasinteco la "maldekstraj" dogmistoj uzis en la batalo interne de la Partio la metodon nomatan kiel "kruela batalo kaj senkompataj frapoj". Tio estis erara metodo. Kiam ni kritikis "maldekstran" dogmismon, ni ne uzis tiun malnovan metodon, sed alprenis novan metodon: starti de la deziro por unuiĝo, distingi pravon kaj malpravon per kritiko aŭ batalo kaj tiel atingi novan unuiĝon sur nova bazo. Tiu ĉi metodo estis uzata en la stilĝustigado de 1942. Post kelkaj jaroj, en 1945, kiam la Komunista Partio de Ĉinio okazigis la Sepan Tutlandan Kongreson, la celo de unuiĝo en la tuta Partio estis

efektive atingita kaj dank' al tio la granda venko de la popola revolucio estis gajnita. Ĉi tie, antaŭ ĉio necesas starti de la deziro por unuiĝo. Ĉar sen tiu ĉi subjektiva deziro por unuiĝo, ĉio fariĝos ĥaosa kaj ne reordigebla kiam la batalo komenciĝos, ĉu tio estos io alia ol "kruela batalo kaj senkompataj frapoj"? Kia unuiĝo partia tiam ankoraŭ restos? El tiu ĉi sperto ni trovis la formulon: "unuiĝo — kritiko — unuiĝo". Alivorte, "lerni el la pasintaj eraroj por eviti la estontajn kaj kuraci la malsanon por savi la pacienton". Ni etendis tiun ĉi metodon ekster la Partion. En ĉiuj kontraŭjapanaj bazlokoj ni uzis tiun ĉi metodon en traktado de la rilatoj inter la gvidantoj kaj la amasoj, inter la armeo kaj la popolo, inter oficiroj kaj soldatoj, inter diversaj unuoj de la armeo kaj inter diversaj grupoj de kadroj, kaj ni akiris grandajn sukcesojn. La apliko de tiu ĉi metodo povas esti retrospurata ĝis pli frua tempo en la historio de nia Partio.

Ekde 1927 kiam ni starigis la revoluciajn armeojn kaj revoluciajn bazlokojn en la sudo, ni jam uzis ĝin en traktado de la rilatoj inter la Partio kaj la popolamasoj, inter la armeo kaj la popolo, inter oficiroj kaj soldatoj, kaj de aliaj rilatoj interne de la popolo. Tamen, dum la Kontraŭjapana Rezistmilito ni bazis la metodon sur pli granda memkonscio. Post la Liberiĝo de la tuta lando, ni aplikis tiun ĉi metodon "unuiĝo — kritiko — unuiĝo" ankaŭ en niaj rilatoj kun la demokratiaj partioj kaj industri-komercaj rondoj. Nia nuna tasko estas daŭre disvastigi kaj pli bone apliki tiun metodon interne de la tuta popolo, postulante, ke ĉiuj fabrikoj, kooperativoj, firmoj, lernejoj, registaraj organoj, publikaj organizoj, unuvorte, nia sescentmiliona popolo uzu tiun metodon por solvi kontraŭdirojn inter si.

Sub ordinaraj cirkonstancoj, kontraŭdiroj interne de la popolo ne estas antagonismaj. Sed se ili ne estas konvene

traktataj, aŭ se ni perdas nian atentemon kaj malstreĉas nian gardemon, ankaŭ povas estiĝi antagonismo. En socialisma lando tia stato estas ĝenerale nur fenomeno loka kaj portempa. La kialo estas, ke en socialisma lando la ekspluatado de homo al homo estas forigita kaj la interesoj de la popolo estas fundamente la samaj. La vastecon de la skalo de la antagonismaj agadoj montritan en la hungara evento kaŭzis la efiko de enlandaj kaj eksterlandaj kontraŭrevoluciaj faktoroj. Tio estis speciala kaj ankaŭ portempa fenomeno. La enlandaj reakciuloj en socialisma lando, en koluzio kun la imperiistoj, utiligas la internajn kontraŭdirojn de la popolo por inciti malkonkordon kaj krei malordon por atingi siajn konspirajn celojn. La leciono de la hungara evento indas ĉies atenton.

Al multaj ŝajnas, ke la propono uzi demokratiajn metodojn por solvi kontraŭdirojn interne de la popolo estas nova

problemo. Sed fakte ne estas tiel. Marksistoj ĉiam opiniis kaj opinias, ke la afero de la proletaro povas apogi sin nur sur la popolamasoj, kaj ke komunistoj devas uzi demokratiajn metodojn de persvado kaj eduko, kiam ili faras laboron inter la laborantaj popolanoj, kaj neniel devas preni komandisman sintenon aŭ devigajn metodojn. La Komunista Partio de Ĉinio fidele observas tiun ĉi marksism-leninisman principon. Ni ĉiam asertis kaj asertas, ke sub la popol-demokratia diktaturo, du malsamaj metodoj, diktatura kaj demokratia, devas esti prenitaj por solvi la du malsamajn specojn de kontraŭdiroj — tiuj inter ni kaj la malamikoj kaj tiuj interne de la popolo. Tiu ĉi ideo estas multe priparolita en multaj pasintaj dokumentoj de nia Partio kaj en eldiroj de multaj niaj partiaj respondeculoj. En mia artikolo "Pri Popol-demokratia Diktaturo" skribita en 1949, mi diris: "La kombino de ĉi tiuj du flankoj, demokratio interne de la popolo

kaj diktaturo al la reakciularo, estas popol-demokratia diktaturo." Mi diris ankaŭ, ke por solvi problemojn interne de la popolo, "la metodo, kiun ni aplikas, estas demokratia metodo, t.e. metodo de persvado kaj ne de devigo". En la parolado farita ĉe la Dua Sesio de la Nacia Komitato de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco en junio 1950, mi diris refoje: "La popol-demokratia diktaturo uzas du metodojn. Rilate al la malamikoj, ĝi uzas la metodon de diktaturo, t.e., dum necesa periodo da tempo, ĝi malpermesas ilin partopreni en politikaj agadoj, devigas ilin obei la leĝojn de la Popola Registaro, devigas ilin okupiĝi en fizika laboro kaj transformas ilin en novajn homojn en la laborado. Rilate al la popolo, kontraŭe, ĝi ne uzas devigan metodon sed demokratian, t.e., ĝi devas permesi la popolon partopreni en politikaj agadoj, kaj, anstataŭ devigi la popolon fari tion aŭ ĉi tion, ĝin eduki kaj persvadi per demokratia metodo. Tiu eduko estas

sineduko interne de la popolo, kaj metodo de kritiko kaj memkritiko estas la fundamenta metodo de sineduko." Multajn fojojn en la pasinteco ni jam parolis pri la problemo de la uzado de demokratiaj metodoj por solvi kontraŭdirojn interne de la popolo, kaj fundamente ni ja tiel faras en nia laboro, kaj multaj kadroj kaj popolanoj komprenas tiun ĉi problemon en praktiko. Kial do nun ankoraŭ troviĝas iuj, kiuj sentas, ke ĝi estas nova problemo? La kialo kuŝas en tio, ke en la pasinteco la lukto inter ni kaj la malamikoj, enlandaj kaj eksterlandaj, estis tre akra, kaj kontraŭdiroj interne de la popolo ankoraŭ ne estis tiel atentataj kiel hodiaŭ.

Multaj personoj ne povas klare distingi la du malsamspecajn laŭkaraktere kontraŭdirojn — tiujn inter ni kaj la malamikoj kaj tiujn interne de la popolo — kaj facile konfuzas ilin. Ni devas konfesi, ke iatempe estas facile ilin konfuzi. Ankaŭ en nia pasinta laboro ni konfuzis ilin. En la

laboro de elimino de kontraŭrevoluciuloj ni iam erare prenis bonulojn por malbonuloj. Tiaj aferoj okazis antaŭe kaj ankoraŭ okazas nun. Niaj eraroj ne estas plivastigitaj, ĉar ni difinis en nia politiko, ke devas esti farita klara distingo inter ni mem kaj niaj malamikoj kaj estas reĝustigotaj ĉiuj faritaj eraroj.

Marksisma filozofio opinias, ke la leĝo de unueco de kontraŭoj estas fundamenta leĝo de la universo. Tiu ĉi leĝo ekzistas universale, ĉu en la naturo, ĉu en homa socio, ĉu en homa penso. Kontraŭaj flankoj en kontraŭdiro estas kaj en unueco kaj en batalo, kaj tio antaŭenpuŝas la aferojn moviĝi kaj ŝanĝiĝi. Kontraŭdiroj ekzistas universale, sed ili diferencas en karaktero laŭ la diferenco en la karaktero de diversaj aferoj. Por ĉiu ajn konkreta afero, la unueco de kontraŭoj estas kondiĉa, portempa, transira kaj sekve relativa, dum la batalo inter la kontraŭoj estas absoluta. Lenin faris tre klaran eksplikon pri tiu ĉi leĝo.

En nia lando iom post iom plimultiĝas homoj, kiuj ĝin komprenas. Tamen, por multaj homoj rekono de tiu leĝo estas unu afero kaj ĝia apliko en observado kaj traktado de problemoj estas alia afero. Multaj ne kuraĝas konfesi publike, ke interne de la popolo en nia lando ankoraŭ ekzistas kontraŭdiroj, kaj ĝuste tiuj kontraŭdiroj puŝas nian socion disvolviĝi antaŭen. Multaj ne rekonas, ke en socialisma socio ankoraŭ ekzistas kontraŭdiroj, kaj rezulte de tio ili fariĝas timemaj kaj senkonsile pasivaj antaŭ sociaj kontraŭdiroj; ili ne komprenas, ke en la procezo de senĉesaj ĝustaj traktado kaj solvado de kontraŭdiroj ĉiam pli firmiĝos la unueco kaj solidareco en la interno de socialisma socio. Tial, estas necese fari klarigadon inter niaj popolanoj kaj antaŭ ĉio inter niaj kadroj, por helpi ilin koni kontraŭdirojn en socialisma socio kaj scipovi alpreni korektan metodon por trakti tiajn kontraŭdirojn.

Kontraŭdiroj en socialisma socio diferencas radikale de tiuj en malnovaj socioj, ekzemple en kapitalisma socio. Kontraŭdiroj en kapitalisma socio manifestiĝas en akraj antagonismoj kaj konfliktoj, en akra klasbatalo, kaj tiaj kontraŭdiroj ne povas esti solvitaj per la kapitalisma sistemo mem kaj povas esti solvitaj nur per socialisma revolucio. Kontraŭdiroj en socialisma socio estas alia afero, ili, male, ne estas antagonismaj kaj povas esti solvitaj unu post alia per la socialisma sistemo mem.

La fundamentaj kontraŭdiroj en socialisma socio estas ankoraŭ tiuj inter la produktaj rilatoj kaj la produktaj fortoj, inter la superstrukturo kaj la ekonomia bazo. Tamen, tiuj ĉi kontraŭdiroj en socialisma socio havas radikale malsaman karakteron kaj cirkonstancojn ol la kontraŭdiroj inter la produktaj rilatoj kaj la produktaj fortoj, inter la superstrukturo kaj la ekonomia bazo en la malnovaj socioj.

La nuna socia sistemo de nia lando estas multe pli supera ol tiu de la malnovaj epokoj. Se ne tiel estus, la malnova sistemo ne povus esti renversita kaj la nova sistemo ne povus esti starigita. Kiam ni diras, ke la socialismaj produktaj rilatoj estas pli konvenaj al la karaktero de disvolviĝo de la produktaj fortoj ol la produktaj rilatoj de la malnovaj epokoj, ni aludas, ke la antaŭaj permesas la produktajn fortojn disvolviĝi kun tia rapideco kia ne ekzistis en la malnovaj socioj, tiel ke la produktado povas senĉese pligrandiĝi kaj la konstante kreskantaj bezonoj de la popolo povas esti paŝon post paŝo kontentigataj. En malnova Ĉinio sub la regado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapitalismo, la produktaj fortoj disvolviĝis ĉiam tre malrapide. Dum pli ol kvindek jaroj antaŭ la Liberiĝo, en la tuta lando, escepte de la Nordoriento, produktiĝis pojare nur kelkdek mil tunoj da ŝtalo; kun la Nordoriento enkalkulata, la plej alta jarprodukto estis nur iom pli

ol naŭcent mil tunoj. En 1949, la tutlanda produkto de ŝtalo estis nur cent kelkdek mil tunoj. Sed nur sep jarojn post la Liberiĝo, nia ŝtala jarprodukto jam atingis kvar milionojn kaj kelkcent milojn da tunoj. En malnova Ĉinio, apenaŭ troviĝis maŝinkonstrua industrio, kaj tute ne ekzistis aŭtomobila kaj aeroplana industrioj, sed nun ni jam ilin starigis. Kien Ĉinio iru, post kiam la regado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapitalismo estis renversita de la popolo? Al kapitalismo aŭ al socialismo? Ĉe multaj ne estis klara kompreno pri tiu ĉi problemo. Faktoj jam donis la respondon: Nur socialismo povas savi Ĉinion. La socialisma sistemo akcelis la rapidan disvolviĝon de la produktaj fortoj de nia lando, kaj tion eĉ niaj malamikoj eksterlandaj ne povas ne agnoski.

Sed nia socialisma sistemo estas ĵus starigita; ĝi estas ankoraŭ ne plene establita, nek plene firmigita. En la ŝtate-private kune funkciigataj industriaj kaj komercaj

entreprenoj, kapitalistoj ankoraŭ ricevas fiksitan interezon,[2] t.e., ekzistas ankoraŭ ekspluatado; rilate al posedsistemo, la entreprenoj de tiu tipo estas ankoraŭ ne tute socialismaj en karaktero. Parto de la agrikulturaj kaj metiaj produktaj kooperativoj ankoraŭ portas duonsocialisman karakteron; eĉ en la tute socialismaj kooperativoj iuj apartaj problemoj koncernantaj posedsistemon ankoraŭ restas solvotaj. Rilatoj en produktado kaj interŝanĝado en diversaj sektoroj de nia ekonomio estas ankoraŭ starigataj paŝon post paŝo laŭ socialismaj principoj, kaj kompare konvenaj formoj estas paŝon post paŝo serĉataj. En la ekonomio de tutpopola posedsistemo kaj en tiu de kolektiva posedsistemo kaj inter tiuj ĉi du formoj de socialisma ekonomio, la ĝusta proporcio de akumulado kaj konsumado estas komplika problemo, kiu ne povas esti facile tuj solvita tute racie. Resume, la socialismaj rilatoj de produktado estas jam starigitaj, kaj ili konformas

al la disvolviĝo de la produktaj fortoj; sed ili estas ankoraŭ ege neperfektaj, kaj tiu neperfekteco estas kontraŭdira al la disvolviĝo de la produktaj fortoj. Krom la kuna ekzisto de konformeco kaj kontraŭdiro inter la rilatoj de produktado kaj la disvolviĝo de la produktaj fortoj, estas ankaŭ kuna ekzisto de konformeco kaj kontraŭdiro inter la superstrukturo kaj la ekonomia bazo. La superstrukturo — la ŝtata sistemo kaj leĝoj de popol-demokratia diktaturo kaj la socialisma ideologio sub la gvido de Marksismo-Leninismo — ludas aktivan antaŭenpuŝan rolon por la venko de socialisma transformo kaj starigo de socialisma organizo de laboro en nia lando; ĝi estas konforma al la socialisma ekonomia bazo, t.e., al la socialismaj produktaj rilatoj. Sed la ekzisto de burĝara ideologio, de ia burokratisma laborstilo en la ŝtataj organoj kaj de mankoj en iuj ĉeneroj de la ŝtata sistemo estas ja kontraŭdira al la ekonomia bazo de socialismo.

Ni devas daŭre solvi la supre menciitajn kontraŭdirojn laŭ konkretaj cirkonstancoj en la estonteco. Kompreneble, post la solvo de tiuj ĉi kontraŭdiroj aperos ankoraŭ novaj problemoj. Kaj la novaj kontraŭdiroj denove bezonos solvon. Ekzemple, la kontraŭdiro inter la produktado kaj la bezonoj de la socio, kiu objektive ekzistos en longa tempo, bezonos konstantan reĝustigadon tra ŝtataj planoj. Ĉiujare nia lando skizas ekonomian planon, fiksante ĝustan proporcion inter akumulado kaj konsumado por atingi ekvilibron inter produktado kaj bezonoj. Tio, kion ni nomas ekvilibro, estas provizora relativa unueco de kontraŭoj. Post unu jaro, tia ekvilibro, parolate en la tuto, estas rompita de la batalo de kontraŭoj, la unueco ŝanĝiĝas, ekvilibro fariĝas malekvilibro, unueco fariĝas malunueco, kaj estas necese denove ellabori ekvilibron kaj unuecon por la venonta jaro. Tio estas la supereco de nia planita ekonomio. Fakte, tiaj ekvilibro

kaj unueco estas parte rompitaj ĉiumonate kaj ĉiutrimestre, kaj estas necese fari partan reĝustigon. Kelkfoje kontraŭdiroj kaj rompo de ekvilibro aperas pro nekonformeco de subjektiva aranĝo al la objektivaj cirkonstancoj; tio nomiĝas fari eraron. Kontraŭdiroj seninterrompe aperas kaj seninterrompe solviĝas, kaj tio estas la dialektika leĝo de la disvolviĝo de aferoj.

La nunaj cirkonstancoj estas jene: la grandskalaj uraganaj amasaj klasbataloj de la pasintaj revoluciaj periodoj jam fundamente finiĝis, sed klasbatalo estas ankoraŭ ne tute finita. Dum la vastaj amasoj bonvenigas la novan sistemon, ili tamen ankoraŭ ne tute alkutimiĝis al ĝi. Registaraj laborantoj estas ankoraŭ ne sufiĉe spertaj kaj devas plue ekzameni kaj esplori problemojn koncerne konkretajn politikojn. Alivorte, nia socialisma sistemo ankoraŭ bezonas procezon de plua establiĝo kaj firmiĝo, la popolamasoj ankoraŭ bezonas tempon por alkutimiĝi al la nova sistemo kaj la

registaraj laborantoj ankoraŭ bezonas tempon por lerni kaj akiri sperton. Sekve estas ege necese, ke ni elmetu en la nuna momento la problemon streki klaran linion inter la du kategorioj de kontraŭdiroj, tiuj inter ni kaj la malamikoj kaj tiuj interne de la popolo, kaj la problemon ĝuste trakti la kontraŭdirojn interne de la popolo por unuigi la popolon de ĉiuj naciecoj en nia lando entrepreni novan batalon — batali kontraŭ la naturo, disvolvi nian ekonomion, disvolvi nian kulturon, por ebligi al nia tuta popolo trapasi pli glate la nunan transiran periodon, plifirmigi nian novan sistemon kaj konstrui nian novan ŝtaton.

II. LA PROBLEMO DE ELIMINO DE KONTRAŬREVOLUCIULOJ

La problemo de elimino de kontraŭrevoluciuloj estas problemo de lukto en la kontraŭdiro inter ni kaj la malamikoj. Interne de la popolo, iuj havas iom mal-

samajn opiniojn rilate al tiu ĉi problemo. Sin trovas du specoj de homoj, kies opinioj diferencas de la niaj. Tiuj, kiuj havas dekstreman pensmanieron, faras nenian distingon inter ni kaj la malamikoj kaj erare prenas la malamikojn por niaj propraj homoj. Ili rigardas kiel amikojn tiujn personojn, kiujn la vastaj popolamasoj rigardas kiel malamikojn. Tiuj, kiuj havas "maldekstr"-eman pensmanieron, pligrandigas la kontraŭdirojn inter ni kaj la malamikoj, tiel ke ili erare prenas iujn kontraŭdirojn interne de la popolo por tiuj inter ni kaj la malamikoj kaj rigardas kiel kontraŭrevoluciulojn ankaŭ tiujn personojn, kiuj estas efektive ne tiaj. Ambaŭ opinioj estas eraraj. Neniu el ili ebligas al ni ĝuste trakti la problemon de elimino de kontraŭrevoluciuloj aŭ ĝuste taksi tiun ĉi laboron.

Por ĝuste taksi la laboron de elimino de kontraŭrevoluciuloj en nia lando, ne estus malutile rigardi, kian influon la hungara

krimojn, estis ekzekutitaj. Tio estis tute necesa, tio estis la postulo de la vastaj amasoj, tio estis farita por liberigi la vastajn amasojn longtempe subpremitajn de kontraŭrevoluciuloj kaj diversaj lokaj tiranoj, alivorte, por liberigi la produktajn fortojn. Se ni ne farus tiel, la popolamasoj ne povus levi siajn kapojn. Ekde 1956, la situacio jam radikale ŝanĝiĝis. Konsidere la tutan landon, la ĉefaj fortoj de kontraŭrevoluciuloj estas jam likviditaj. Nia fundamenta tasko turniĝis de liberigo de la produktaj fortoj en protekton kaj disvolvon de la produktaj fortoj sub la novaj produktaj rilatoj. Iuj personoj ne komprenas, ke nia nuna politiko estas konforma al la nuna situacio kaj nia pasinta politiko estis konforma al la pasinta situacio; ili volas utiligi la nunan politikon por renversi la pasintajn juĝdecidojn kaj nei la grandan sukceson siatempe atingitan en la elimino de kontraŭrevoluciuloj. Tio estas tute erara, kaj la popolamasoj neniam tion permesos.

En nia laboro de elimino de kontraŭrevoluciuloj sukcesoj estis la ĉefa afero, sed ankaŭ troviĝis eraroj. Ekscesoj kaj preterlasoj ambaŭ estis faritaj. Nia politiko estas: "Ĉiu kontraŭrevoluciulo estu nepre eliminota, kiam ajn trovita, kaj ĉiu eraro estu nepre korektota, kiam ajn malkovrita." Nia linio en la laboro de elimino de kontraŭrevoluciuloj estas la amasa linio. Kompreneble, malgraŭ la alpreno de la amasa linio, eraroj ankoraŭ povas okazi en nia laboro, sed ili estos pli malmultaj kaj pli facile korekteblaj. La amasoj akiras sperton en luktado. El tio, kio estas ĝuste farita, ili akiras sperton de ĝusta faro. El tio, kio estas erare farita, ili akiras sperton de erara faro.

Koncerne al ĉiuj malkovritaj eraroj en la laboro de elimino de kontraŭrevoluciuloj, ni jam prenis aŭ nun prenas paŝojn reĝustigajn. Tiujn ankoraŭ ne malkovritajn ni estas pretaj tuj korekti, kiam ajn ili estos malkovritaj. Decidoj de reĝustigo devas

krimojn, estis ekzekutitaj. Tio estis tute necesa, tio estis la postulo de la vastaj amasoj, tio estis farita por liberigi la vastajn amasojn longtempe subpremitajn de kontraŭrevoluciuloj kaj diversaj lokaj tiranoj, alivorte, por liberigi la produktajn fortojn. Se ni ne farus tiel, la popolamasoj ne povus levi siajn kapojn. Ekde 1956, la situacio jam radikale ŝanĝiĝis. Konsidere la tutan landon, la ĉefaj fortoj de kontraŭrevoluciuloj estas jam likviditaj. Nia fundamenta tasko turniĝis de liberigo de la produktaj fortoj en protekton kaj disvolvon de la produktaj fortoj sub la novaj produktaj rilatoj. Iuj personoj ne komprenas, ke nia nuna politiko estas konforma al la nuna situacio kaj nia pasinta politiko estis konforma al la pasinta situacio; ili volas utiligi la nunan politikon por renversi la pasintajn juĝdecidojn kaj nei la grandan sukceson siatempe atingitan en la elimino de kontraŭrevoluciuloj. Tio estas tute erara, kaj la popolamasoj neniam tion permesos.

En nia laboro de elimino de kontraŭrevoluciuloj sukcesoj estis la ĉefa afero, sed ankaŭ troviĝis eraroj. Ekscesoj kaj preterlasoj ambaŭ estis faritaj. Nia politiko estas: "Ĉiu kontraŭrevoluciulo estu nepre eliminota, kiam ajn trovita, kaj ĉiu eraro estu nepre korektota, kiam ajn malkovrita." Nia linio en la laboro de elimino de kontraŭrevoluciuloj estas la amasa linio. Kompreneble, malgraŭ la alpreno de la amasa linio, eraroj ankoraŭ povas okazi en nia laboro, sed ili estos pli malmultaj kaj pli facile korekteblaj. La amasoj akiras sperton en luktado. El tio, kio estas ĝuste farita, ili akiras sperton de ĝusta faro. El tio, kio estas erare farita, ili akiras sperton de erara faro.

Koncerne al ĉiuj malkovritaj eraroj en la laboro de elimino de kontraŭrevoluciuloj, ni jam prenis aŭ nun prenas paŝojn reĝustigajn. Tiujn ankoraŭ ne malkovritajn ni estas pretaj tuj korekti, kiam ajn ili estos malkovritaj. Decidoj de reĝustigo devas

esti publikigitaj en tia sfero, en kiu la eraraj decidoj estis antaŭe faritaj. Mi proponas tutamplekse kontroli la laboron de elimino de kontraŭrevoluciuloj ĉijare aŭ venontjare por resumi sperton, kuraĝigi spiriton de justeco kaj kontraŭbatali malsanecajn tendencojn.[3] Centrale, tiun ĉi kontrolon prirespondu la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj la Konstanta Komitato de la Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, kaj loke, la provincaj kaj municipalaj popolaj komitatoj kaj komitatoj de la Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. En la kontrolado de laboro, ni devas helpi la vastajn amasojn da kadroj kaj aktivuloj anstataŭ verŝi malvarman akvon sur ilin. Estas malprave verŝi sur ilin malvarman akvon. Tamen eraroj nepre devas esti korektitaj, kiam ili estas malkovritaj. Tiel sinteni devas ĉiuj organoj de publika sekureco, prokurorejoj kaj juĝejoj, malliberejoj kaj administrejoj respondecaj pri la remuldo de krimuloj per

laborado. Ni esperas, ke la membroj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj de la Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj la popolaj reprezentantoj, ĉiuj partoprenu en tiu ĉi kontrolado, se estas eble por ili. Tio estos helpodona por perfektigi nian leĝan sistemon kaj ĝuste trakti kontraŭrevoluciulojn kaj aliajn krimulojn.

La nuna stato pri kontraŭrevoluciuloj povas esti priskribita per jenaj vortoj: Sin trovas ankoraŭ kontraŭrevoluciuloj, sed jam ne multaj. Antaŭ ĉio, sin trovas ankoraŭ kontraŭrevoluciuloj. Iuj asertas, ke jam ne plu estas kontraŭrevoluciuloj kaj ĉio estas en ordo, kaj ke ni povas alte meti niajn kapkusenojn por trankvile dormi. Tio ne konformas al la fakto. Fakte ankoraŭ troviĝas kontraŭrevoluciuloj (kompreneble, tio ne signifas, ke vi povas trovi ilin ĉie kaj en ĉiu organizo), kaj ni devas daŭrigi la bataladon kontraŭ ili. Oni devas kompreni, ke la kaŝaj kontraŭrevo-

luciuloj ankoraŭ ne eliminitaj neniam rezignacios kaj nepre kaptos ĉiun ŝancon por krei malordon. La usonaj imperiistoj kaj la ĉiangkajŝeka kliko konstante sendas siajn sekretajn agentojn ĉi tien por plenumi subfosajn agadojn. Kiam ĉiuj ekzistantaj kontraŭrevoluciuloj estas eliminitaj, novaj kontraŭrevoluciuloj povos ankoraŭ aperi. Se ni perdos nian singardemon, ni estos ege trompitaj kaj suferos grandan damaĝon. Kie ajn troviĝas kontraŭrevoluciuloj kreantaj malordon, ni devas firme ekstermi ilin. Sed parole pri la tuta lando, efektive troviĝas ne multaj kontraŭrevoluciuloj. Estus same erare diri, ke sin trovas ankoraŭ tre multe da kontraŭrevoluciuloj en la tuta lando. Ankaŭ la akcepto de tiu ĉi vidpunkto rezultigos konfuzon.

III. LA PROBLEMO DE AGRIKULTURA KOOPERIGO

Nia lando havas agrikulturan loĝantaron de pli ol kvin cent milionoj, tial la stato de

la kamparanaro havas ekstreme grandan influon al la disvolviĝo de nia ekonomio kaj la firmiĝo de nia ŝtata potenco. Laŭ mia opinio, la stato estas fundamente bona. La agrikultura kooperigo jam plenumiĝis, kaj tio solvis la grandan kontraŭdiron inter socialisma industriigo kaj individua agrikultura ekonomio en nia lando. La kooperigo plenumiĝis rapide, kaj tiel iuj timis, ĉu el tio ne rezultiĝas iaj difektoj. Troviĝas iom da difektoj, sed feliĉe, ne grandaj, kaj la movado estas fundamente sana. La kamparanoj laboras tre entuziasme, kaj lastjare, malgraŭ la inundoj, sekeco kaj ŝtormoj pli seriozaj ol en iu ajn el la pasintaj kelkaj jaroj, la grenprodukto en la tuta lando ankoraŭ pliiĝis. Sed nun iuj personoj diras, ke agrikultura kooperigo ne taŭgas, kaj ke ĝi ne havas superecon — alblovas miniatura tajfuno. Ĉu agrikultura kooperigo havas superecon efektive? Inter la dokumentoj disdonitaj hodiaŭ en la kunveno estas materialo pri la Vangguofana

Kooperativo[4] en Zunhua-gubernio, Hebej-provinco, kiu indas tralegon. La loko, kie la kooperativo situas, estas montregiono, kiu estis tre malriĉa en la pasinteco kaj ĉiujare dependis de helpgreno tien alportita de la Popola Registaro. En 1953, kiam la kooperativo estis unue starigita, oni nomis ĝin "senhavula kooperativo". Sed post kvar jaroj da peniga luktado, ĝi fariĝis ĉiam pli prospera jaron post jaro, kaj nun la plejparto de ĝiaj membroj ekhavas superrestan grenon. Tio, kion la Vangguofana Kooperativo povis atingi, devas esti atingebla ankaŭ por la aliaj kooperativoj sub normalaj kondiĉoj, aŭ atingebla en iom pli longa tempo. Sekve estas videble senbaza la diro, ke kooperigo jam ne taŭgas.

El tio estas klare videble ankaŭ, ke kooperativoj devas esti starigitaj nepre tra peniga luktado. Ĉiu ajn novaĵo trapasas malfacilan kaj zigzagan vojon en sia kreskado. Estas simpla fantazio pensi, ke oni povas facile sukcesi en la afero de socialismo sub konstanta favora vento, sen malfacileco kaj zigzago, sen grandega penado.

Kiuj estas la aktivaj subtenantoj de la kooperativoj? Ili estas la superega plimulto de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiuj konsistigis pli ol 70 procentojn de la kampara loĝantaro. Ankaŭ la plejparto de la ceteraj portas esperojn por la estonteco de la kooperativoj. Nur tre malmultaj estas vere malkontentaj. Multaj personoj, ne analizinte tiun situacion, ne farinte plenampleksan ekzamenon pri la atingoj kaj mankoj de la kooperativoj kaj ankaŭ la kaŭzoj de tiuj mankoj, prenis unu parton aŭ flankon por la tuto; pro tio ekblovis miniatura tajfuno inter iuj personoj, kiuj diras, ke la kooperativoj ne havas superecon.

Kiom da tempo estos bezonata por ke firmiĝu la kooperativoj kaj ĉesu la argumentoj, ke ili ne havas superecon? Laŭ la sperto de la disvolviĝo de multaj kooperativoj, probable tio bezonos kvin jarojn aŭ ankoraŭ

iom pli da tempo. Nun, la plejparto de niaj kooperativoj havas historion nur de pli ol unu jaro, tial estas neracie postuli ilin esti tiel bonaj. Laŭ mia opinio, se la kooperativoj estos starigitaj dum la Unua Kvinjara Plano kaj firmigitaj dum la Dua, tio jam estos tre bona.

La kooperativoj estas en procezo de iom-post-ioma plifirmiĝo. Ĉe ili restas ankoraŭ iuj kontraŭdiroj bezonantaj solvon. Ekzemple, inter la ŝtato kaj la kooperativoj kaj interne de la kooperativoj kaj inter la kooperativoj mem, ĉie troviĝas iuj kontraŭdiroj bezonantaj solvon.

Ni devas doni konstantan atenton al problemoj de produktado kaj distribuado kiel la vojo por trakti la supre menciitajn kontraŭdirojn. En la problemo de produktado, unuflanke, la kooperativa ekonomio devas submeti sin sub la gvidon de la ŝtata unueca ekonomia plano kaj samtempe konservi por si certagradan flekseblecon kaj sendependecon, ne malobservante la ŝtatan unuecan planon, nek la politikojn kaj leĝojn de la ŝtato; aliflanke, ĉiu familio partopreninta la kooperativon, escepte de la parcelo rezervita por privata uzado kaj aliaj ekonomiaj entreprenoj lasitaj al individua administrado, pri kiuj ĝi povas fari sian propran planon, devas submeti sin sub la ĝeneralajn planojn de la kooperativo aŭ la produkta brigado. En la problemo de distribuado, ni devas zorgi samtempe la interesojn de la ŝtato, de la kooperativo kaj de la individuo. Ni devas trakti konvene la triflankan rilaton inter la impostoj de la ŝtato, la akumulado de la kooperativo kaj la persona enspezo de la kamparano kaj konstante atenti la reĝustigadon de la kontraŭdiroj inter ili. Akumuladon bezonas kiel la ŝtato tiel ankaŭ la kooperativo, sed ambaŭokaze tio ne devas esti tro multa. Ni devas laŭeble ebligi al la kamparano, dum normalaj jaroj en rikolto, pliigi siajn personajn enspezojn jaron post jaro surbaze de la kreskado de produktado.

Multaj personoj diras, ke la vivo de la kamparanoj estas mizera. Ĉu tia opinio estas prava? Parole de unu flanko, ĝi estas prava. Tio signifas, ĉar la imperiistoj kaj iliaj agentoj subpremis kaj ekspluatis nian landon por pli ol cent jaroj, kaj nia lando fariĝis tre malriĉa, ne nur la vivnivelo de la kamparanoj, sed ankaŭ tiu de la laboristoj kaj intelektuloj estas ankoraŭ malalta. Ni bezonos kelkajn jardekojn da penega klopodado por levi la vivnivelon de nia tuta popolo paŝon post paŝo. En tiu ĉi senco, la vorto "mizera" estas ĝusta. Sed parole de alia flanko, tio ne estas prava. Tio signifas, kvazaŭ dum la sep jaroj de post la Liberiĝo, nur la vivo de la laboristoj pliboniĝus, sed tiu de la kamparanoj ne. Fakte, kun tre malmultaj esceptoj, la vivo ĉu de la laboristoj ĉu de la kamparanoj jam iom pliboniĝis. De post la Liberiĝo, la kamparanoj estas liberigitaj de la ekspluatado de la bienuloj, kaj ilia produkto pliiĝas jaron post jaro. Prenu gre-

non kiel ekzemplon. En 1949, la tutlanda produkto de greno estis nur ducent dekkelkaj miliardoj da ĝinoj,[5] kaj en 1956, ĝi atingis tricent sesdekkelkajn miliardojn da ĝinoj, kun kresko de preskaŭ cent kvindek miliardoj da ĝinoj. La agrikultura imposto kolektata de la ŝtato ne estas peza, atingante nur ĝis la sumo de iom pli ol tridek miliardoj da ĝinoj ĉiujare. La greno aĉetata de la ŝtato laŭ normalaj prezoj el la kamparanoj estas nur iom pli ol kvindek miliardoj da ĝinoj ĉiujare. Tiuj ĉi du artikoloj kune sumiĝas je pli ol okdekkelkaj miliardoj da ĝinoj. El ĉi tiu kvanto da greno pli ol duono estas vendata en la vilaĝoj kaj apudaj urbetoj. Evidente, oni ne povas diri, ke la vivo de la kamparanoj ne pliboniĝis. Ni preparas stabiligi en la venontaj kelkaj jaroj la tutan sumon de impostgreno kaj la greno aĉetota de la ŝtato ĝenerale sur la nivelo de okdekkelkaj miliardoj da ĝinoj ĉiujare, por ke disvolviĝu la agrikulturo, solidiĝu la kooperativoj, la malmultaj gren-

mankaj familioj ankoraŭ troviĝantaj en la vilaĝoj ne estu plu grenmankaj, kaj ĉiuj kamparanaj familioj, escepte de tiuj, kiuj sin okupas speciale pri industriaj plantaĵoj, havu superrestan grenon aŭ almenaŭ fariĝu memsufiĉaj, por ke en la vilaĝoj sin trovu ne plu malriĉkamparanoj kaj la vivnivelo de ĉiuj kamparanoj atingu aŭ superu tiun de mezkamparanoj. Ne estas prave simple kompari la meznombran jaran enspezon de kamparano kun tiu de laboristo kaj diri, ke unu estas malalta dum la alia alta. La produktiveco de la laboristoj estas multe pli alta ol tiu de la kamparanoj, dum la kosto de vivado por la kamparanoj estas multe malpli alta ol tiu por la laboristoj en la urboj; sekve oni ne povas diri, ke la laboristoj ĝuas apartan favoron de la ŝtato. Tamen la salajroj de malmultaj laboristoj kaj de iuj laborantoj en la registaraj organoj estas iom tro altaj, kaj pri tio la kamparanoj havas kialon por esti malkontentaj, tial estas nece-

se fari konvenajn reĝustigojn laŭ la cirkonstancoj.

IV. LA PROBLEMO DE INDUSTRIISTOJ KAJ KOMERCISTOJ

En la sfero de transformo de nia socia sistemo, krom la kooperigo de agrikulturo kaj tiu de metiindustrio, estis plenumita en 1956 ankaŭ la transformo de privataj industriaj kaj komercaj entreprenoj en ŝtate-privatе kune funkciigatajn entreprenojn. La kaŭzo, kial tiu ĉi laboro estis plenumita tiel rapide kaj glate, havis intiman rilaton kun la fakto, ke ni traktis la kontraŭdiron inter la laborista klaso kaj la nacia burĝaro kiel kontraŭdiron interne de la popolo. Ĉu tiu ĉi klasa kontraŭdiro estas tute solvita? Ankoraŭ ne. Ni bezonos ankoraŭ sufiĉe longan tempon por ĝin tute solvi. Sed nun iuj personoj diras, ke la kapitalistoj estas jam tiel remulditaj, ke nun ili ne multe

diferencas de la laboristoj, kaj ke plua remuldado ne estas necesa. Aliaj eĉ diras, ke la kapitalistoj estas iom pli indaj ol la laboristoj. Ankoraŭ aliaj diras, ke se remuldado estas necesa, kial ne estu remuldata la laborista klaso? Ĉu tiuj ĉi opinioj estas pravaj? Kompreneble ne.

Dum la konstruado de socialisma socio, ĉiuj bezonas remuldadon, kiel la ekspluatantoj tiel ankaŭ la laboruloj. Kiu diras, ke la laborista klaso ĝin ne bezonas? Kompreneble la remuldado de la ekspluatantoj kaj tiu de la laboruloj estas du malsamaj tipoj de remuldado, kiujn oni ne devas konfuzi unu kun la alia. En la klasbatalo kaj en la batalo kontraŭ naturo, la laborista klaso remuldas la tutan socion kaj samtempe remuldas sin mem. Ĝi devas senĉese lerni en sia laboro, paŝon post paŝo venki siajn mankojn kaj neniam devas ĉesi. Prenu nin, kiuj estas ĉi tie, kiel ekzemplon. Multaj el ni havas iom da progreso ĉiujare, t.e., ni estas remuldataj ĉiujare. Mi mem

havis diversajn nemarksismajn ideojn antaŭe, kaj Marksismon mi akceptis nur poste. Mi lernis de libroj iom da Marksismo kaj unuapaŝe remuldis mian ideologion, sed mi estis remuldata ĉefe en la longtempa klasbatalo. Kaj mi devas daŭre lerni, nur tiamaniere mi povos fari pluan progreson, alie mi postlasiĝos. Ĉu la kapitalistoj povas esti tiel indaj, ke ili, male, ne bezonas remuldadon plu?

Iuj diras, ke la ĉina burĝaro ne plu havas duflankan karakteron, sed nur unuflankan karakteron. Ĉu tio estas fakto? Ne. Unuflanke, la burĝaraj elementoj jam fariĝis administrantoj en ŝtate-private kune funkciigataj entreprenoj kaj estas en procezo de transformado el ekspluatantoj en laborulojn vivantajn per sia propra laboro; aliflanke, ili ankoraŭ ricevas en tiuj entreprenoj fiksitan interezon, t.e., ili ankoraŭ ne sin derompis de la radikoj de ekspluatado. Sufiĉe longa distanco en ideologio, sentimentoj kaj vivkutimoj ankoraŭ estas inter

ili kaj la laborista klaso. Kiel oni povas diri ke ili jam ne plu havas duflankan karakteron? Eĉ se ili ĉesos ricevi sian fiksitan interezon kaj seniĝos je la etikedo "burĝaro", ili ankoraŭ bezonos sufiĉe longan tempon por ideologia remuldado. Se la burĝaro, kiel iuj opinias, ne plu havus duflankan karakteron, do ne plu estus ankaŭ la tasko de remuldado kaj lernado por la kapitalistoj.

Ni devas diri, ke tia opinio ne nur ne respondas al la efektiva stato de la industriistoj kaj komercistoj, sed ankaŭ ne respondas al la deziro de la plejmulto el ili. Dum la pasintaj kelkaj jaroj la plejmulto el ili volis lerni kaj faris rimarkindan progreson. La ĝisfunda remuldado de la industriistoj kaj komercistoj devas esti plenumata en la laboro; ili devas korplabori kune kun la oficistoj kaj laboristoj en la entreprenoj kaj preni la entreprenojn kiel terenon por sinremuldo. Sed estas grave por ili ankaŭ ŝanĝi per lernado iujn siajn malnovajn vid-

punktojn. Ilia lernado devas baziĝi sur propra volo. Vizitinte studgrupojn dum dekoj da tagoj kaj reveninte al la entreprenoj, multaj industriistoj kaj komercistoj trovas, ke ili havas pli da komuna lingvo kun la laboristaj amasoj kaj la ŝtataj reprezentantoj, kaj tial estas pli bonaj kondiĉoj por kuna laborado. El sia propra sperto ili komprenas, ke estas utile por ili daŭre lerni kaj sin remuldi. La opinio ĵus menciita, ke lernado kaj remuldado ne estas necesaj, spegulas la vidpunktojn ne de la plejmulto el la industriistoj kaj komercistoj, sed nur de malmultaj el ili.

V. LA PROBLEMO DE INTELEKTULOJ

Kontraŭdiroj interne de la popolo en nia lando montriĝas ankaŭ inter la intelektuloj. Kelkaj milionoj da intelektuloj, kiuj servis al la malnova socio en la pasinteco, nun turnas sin por servi al la nova socio. Ĉi

tie leviĝas la problemo, kiel ili adaptu sin al la bezonoj de la nova socio kaj kiel ni helpu ilin en tio. Ankaŭ tio estas unu el la kontraŭdiroj interne de la popolo.

La plejmulto de niaj intelektuloj jam faris rimarkindan progreson dum la pasintaj sep jaroj. Ili esprimas sian aprobon al la socialisma sistemo. Multaj el ili studas Marksismon diligente kaj parto el ili jam fariĝis komunistoj. Tiu parto, kvankam ankoraŭ malgranda en nombro nuntempe, estas iom post iom kreskanta. Kompreneble, inter la intelektuloj troviĝas iuj personoj, kiuj ankoraŭ dubas pri socialismo aŭ ĝin ne aprobas, sed ili formas nur malmulton.

La kolosa kaj malfacila afero de socialisma konstruado de nia lando ja bezonas kiel eble plej multe da intelektuloj por ĝin servi. Ni devas fidi ĉiujn intelektulojn, kiuj vere volas servi al la afero de socialismo, radikale plibonigi niajn rilatojn kun ili kaj helpi ilin solvi ĉiujn solvendajn problemojn, por

ke ili povu aktive elvolvi siajn talentojn. Multaj el niaj kamaradoj ne scipovas unuiĝi kun intelektuloj, traktas ilin en kruda maniero, ne respektas ilian laboron kaj en sciencaj kaj kulturaj laboroj malkonvene sintrudas en tiujn aferojn, en kiujn oni ne devus interveni. Ĉiuj ĉi tiuj mankoj devas esti forigitaj.

Kvankam la vastaj amasoj de intelektuloj faris iom da progreso, ili tamen ne devas esti memkontentaj pro tio. Por plene kontentigi la bezonojn de la nova socio kaj por intime unuiĝi kun la laboristoj kaj kamparanoj, la intelektuloj devas daŭre sin remuldi, forĵeti iom post iom la burĝaran mondkoncepton kaj starigi por si la proletaran, komunisman mondkoncepton. La ŝanĝo de mondkoncepto estas ŝanĝo fundamenta, kaj nun oni ankoraŭ ne povas diri, ke la plejmulto de la intelektuloj jam plenumis tiun ŝanĝon. Ni esperas, ke niaj intelektuloj daŭre antaŭen iros kaj, en la procezo de siaj laborado kaj lernado, iom post iom

starigos mondkoncepton komunisman, akiros pli bonan komprenon pri Marksismo-Leninismo kaj kunfandiĝos kun la laboristoj kaj kamparanoj, kaj ne haltos mezvoje, des pli ne retroiros, ĉar el retroiro estas nenia eliro. Pro tio, ke la socia sistemo de nia lando jam ŝanĝiĝis kaj la ekonomia bazo de burĝara ideologio estas fundamente likvidita, do troviĝas ne nur neceseco sed ankaŭ ebleco por grandnombraj intelektuloj ŝanĝi sian mondkoncepton. Sed ĝisfunda ŝanĝo de mondkoncepto bezonas tre longan tempon, kaj ni devas labori pacience kaj ne devas esti malpaciencaj. Fakte, certe troviĝas kelkiuj, kiuj ideologie neniam volas akcepti Marksismo-Leninismon kaj komunismon. Al ili ni ne estu tro postulemaj. Ni devas doni al ili ŝancojn por konvena laboro, se nur ili submetas sin al la bezonoj de la ŝtato kaj sin okupas pri normala laborado.

Inter la intelektuloj kaj studentoj malfortiĝis lastatempe la ideologi-politika laboro,

kaj aperis iuj malsanecaj tendencoj. Al iuj personoj ŝajnas, ke nenio estas prizorginda, ĉu politiko, ĉu la estonteco de la patrio kaj la idealoj de la homaro. Ŝajnas, ke Marksismo, kiu furoris iutempe, estas nun ne tiel en modo. Kontraŭ tiu ĉi situacio, ni devas plifortigi nian ideologi-politikan laboron. Kaj la intelektuloj kaj la studentoj devas pene lerni. Krom fakaj studobjektoj, ili devas studi Marksismon, studi kurantajn aferojn kaj politikon por progresi ideologie kaj politike. Ne havi ĝustan politikan vidpunkton egalas ne havi animon. La pasinta ideologia remuldado estis necesa kaj akiris pozitivajn rezultatojn. Sed ĝi estis efektivigata iom krude kaj vundis la sentojn de iuj personoj — tio ne estis bona. Tiun ĉi difekton ni devas eviti en la estonteco. Ĉiuj departementoj kaj organizoj devas preni sur sin la respondecon rilate al la ideologi-politika laboro. Ĝin devas prizorgi la Komunista Partio, la Junula Ligo, la koncernaj registaraj departementoj kaj pre-

cipe la estroj kaj instruistoj de lernejoj. Nia orientilo de eduko devas ebligi al la edukatoj disvolviĝi en la flankoj morala, intelekta kaj korpa kaj fariĝi laboruloj kun socialisma konscio kaj kulturo. Ni devas disvastigi la ideon konstrui nian landon per diligentemo kaj ŝparemo. Ni devas komprenigi al la tuta junularo, ke nia lando estas nun ankoraŭ tre malriĉa kaj ne estas eble radikale ŝanĝi tiun ĉi staton dum mallonga tempo, kaj ke nur en unuigita luktado dum kelkaj jardekoj, nia junularo kaj la tuta popolo povos krei per siaj propraj manoj prosperan kaj potencan landon. La starigo de socialisma sistemo malfermis al ni la vojon kondukantan al la ideala mondo de la estonteco, kies realiĝo tamen dependos ankoraŭ de nia peniga kaj diligenta laborado. Iuj junuloj pensas, ke kiam socialisma socio estas starigita, ĉio devas esti perfekta kaj oni povas ĝui feliĉan vivon tute pretan sen ajna penado. Tia penso estas nerealisma.

VI. LA PROBLEMO DE NACIMALPLIMULTOJ

La popolo de la nacimalplimultoj en nia lando nombras pli ol tridek milionojn. Kvankam ili okupas nur ses procentojn de la totala loĝantaro de Ĉinio, tamen la regionoj, en kiuj ili loĝas, estas vastaj kaj ampleksas kvindek ĝis sesdek procentojn de la totala areo de nia lando. Tial la rilatoj inter la han-nacio kaj la nacimalplimultoj devas esti harmoniaj. La ŝlosilo por tiu ĉi problemo estas venki han-nacian ŝovinismon. Kie ekzistas loka naciismo inter nacimalplimultoj, oni devas samtempe ĝin venki. Kaj han-nacia ŝovinismo kaj loka naciismo estas malutilaj al unuiĝo de la naciecoj; tio estas unu el la kontraŭdiroj interne de la popolo, kiu devas esti venkita. Tiuflanke ni jam faris iom da laboro. En la plejparto de la nacimalplimultaj regionoj, la rilatoj inter la naciecoj fariĝis multe pli bonaj ol antaŭe, sed restas ankoraŭ iuj problemoj

atendantaj sian solvon. En iuj lokoj, hannacia ŝovinismo kaj loka naciismo ambaŭ ekzistas en serioza grado, kaj al tio ni devas doni sufiĉan atenton. Rezulte de kelkjara klopodado de la popolo de ĉiuj naciecoj, demokratia reformo kaj socialisma transformo estas fundamente plenumitaj en la plejparto de niaj nacimalplimultaj regionoj. Ĉar la kondiĉoj en Tibeto estas ankoraŭ ne maturaj, demokratia reformo estas ankoraŭ ne efektivigita tie. Laŭ la deksep-punkta interkonsento inter la Centra Popola Registaro kaj la loka registaro de Tibeto, reformo de la socia sistemo nepre estos efektivigita, sed la tempo por ĝia efektivigo povos esti decidita, nur kiam la plejmulto de tibetaj popolamasoj kaj iliaj gvidantaj personoj konsideros ĝin efektivigebla, kaj oni ne devas esti malpaciencaj. Nun jam estas decidite ne efektivigi demokratian reformon en Tibeto dum la tempo de la Dua Kvinjara Plano. Ĉu efektivigi ĝin en la tempo de la Tria Kvinjara Plano

povos esti decidite nur laŭ tiama situacio.[6]

VII. UNUECA ĈIUFLANKA PLANADO KAJ KONVENA ARANĜADO

La "unueca ĉiuflanka planado" menciita ĉi tie aludas al la unueca ĉiuflanka planado rilate al la sescent-miliona loĝantaro de nia lando. Kiam ni skizas planojn, traktas aferojn aŭ pensas pri problemoj, ni devas ĉiam eliri el la punkto, ke Ĉinio havas sescent-milionan loĝantaron, kaj ĉi tion ni devas neniam forgesi. Kial ni elmetas tian problemon? Ĉu troviĝus personoj, kiuj ankoraŭ ne scias, ke ni havas sescent-milionan loĝantaron? Kompreneble, tion ĉiu scias, sed en praktikado iuj tute forgesas, pensante, kvazaŭ ju pli malmulte da homoj, ju pli malgranda la rondo, des pli bone. Personoj kun tia malgrandrondismo estas kontraŭaj al la sekvanta ideo: mobilizi ĉiujn pozitivajn faktorojn, unuigi ĉiujn

unuigeblajn personojn kaj fari ĉion eblan por turni negativajn faktorojn en la pozitivajn, por ke ili servu al la granda afero de konstruado de socialisma socio. Mi esperas, ke tiuj personoj pligrandigu sian vidkampon kaj vere rekonu, ke nia lando havas sescent-milionan loĝantaron, rekonu, ke tio estas objektiva fakto, tio estas nia kapitalo. Nia grandnombra loĝantaro estas bona afero, sed kompreneble, ankaŭ troviĝas malfaciloj. Nia konstruado vigle disvolviĝas en ĉiuj sferoj kaj grandaj sukcesoj estas atingitaj, sed en la nuna transira periodo de granda socia ŝanĝiĝo, ankoraŭ troviĝas multaj malfacilaj problemoj. Kaj disvolviĝo kaj malfaciloj — jen kontraŭdiro. Tamen, ĉiu ajn kontraŭdiro ne nur devas, sed ankaŭ tute povas esti solvita. Nia orientilo estas unueca ĉiuflanka planado kaj konvena aranĝado. Ĉiun problemon, ĉu tiun de nutraĵo, de naturaj katastrofoj, de laboraranĝo, de eduko, de la intelektuloj, de la

unueca fronto de ĉiuj patriotaj fortoj, de la nacimalplimultoj, ĉu iun ajn alian problemon — ni devas ĉiam trakti el la vidpunkto de unueca ĉiuflanka planado por la tuta popolo; ni devas interkonsiliĝi kun ĉiuflankaj personoj por fari diversajn konvenajn aranĝojn laŭ la realaj eblecoj en la specialaj tempo kaj loko. Ni neniam devas plendi pri la tromulteco de homoj, pri ilia postrestanteco, pri la ĝenaĵoj kaj malfacileco de aferoj, kaj simple forpuŝi ilin el la pordo. Ĉu tio dirita signifas, ke ĉiu kaj ĉio estu prizorgataj sole de la registaro? Kompreneble ne. Multajn homojn kaj multajn aferojn la sociaj organizoj kaj la popolamasoj mem povas prizorgi, kaj ili ja povas elpensi multe da tre bonaj rimedoj. Kaj ankaŭ tion inkluzivas la orientilo de "unueca ĉiuflanka planado kaj konvena aranĝado." Ni devas direkti la sociajn organizojn kaj popolamasojn en diversaj lokoj tion fari.

VIII. PRI "DISVOLVIĜU CENT FLOROJ KAJ KONKURU CENT SKOLOJ" KAJ "LONGDAŬRA KUNEKZISTADO KAJ RECIPROKA KONTROLADO"

Kiel estis elmetitaj la sloganoj "disvolviĝu cent floroj kaj konkuru cent skoloj" kaj "longdaŭra kunekzistado kaj reciproka kontrolado"? Ili estis elmetitaj laŭ la konkretaj kondiĉoj de Ĉinio, surbaze de la rekono, ke ekzistas ankoraŭ diversaj kontraŭdiroj en socialisma socio, kaj responde al la urĝa bezono de la lando rapide disvolvi siajn ekonomion kaj kulturon. La orientilo "disvolviĝu cent floroj kaj konkuru cent skoloj" estas tiu por akceli la disvolviĝon de la arto kaj la progreson de la scienco kaj estas tiu por akceli la prosperadon de socialisma kulturo en nia lando. Malsamaj formoj kaj stiloj en arto povas libere disvolviĝi kaj malsamaj skoloj en scienco povas libere argumenti. Ni opinias, ke deviga disvastigo de unu stilo, unu skolo kaj malpermeso de alia stilo, alia skolo per administraj rimedoj estas malutilaj al la disvolviĝo de arto kaj scienco. Problemoj de praveco kaj malpraveco en arto kaj scienco devas esti solvataj per libera diskutado en artaj kaj sciencaj rondoj kaj pere de praktikado en arto kaj scienco anstataŭ per simpla metodo. Por determini, ĉu io estas ĝusta aŭ erara, ofte necesas tempo por provado. En la historio, novaj kaj ĝustaj aferoj ofte ne ricevis la agnoskon de la plimulto de homoj en la komenco kaj povis nur disvolviĝi zigzage tra batalado. Ĝustajn kaj bonajn aferojn oni ofte ne rekonas en la komenco kiel aromajn florojn, sed male ilin rigardas kiel venenajn herbojn. La teorio de la suna sistemo de Koperniko[7] kaj la teorio de evoluo de Darvino[8] ambaŭ estis iam rigardataj kiel eraraj kaj ambaŭ trapasis malfacilegan luktadon. Ankaŭ en la ĉina historio troviĝis multaj similaj ekzemploj. Kompare kun la malnova socio, en la socialisma socio la kondiĉoj por la

kreskado de novaj aferoj estas radikale malsamaj kaj multe pli bonaj ol la pasintaj. Tamen subpremoj al nove kreskantaj fortoj kaj raciaj proponoj estas ankoraŭ ofte renkonteblaj. Eĉ ne intenca subpremo, sed nur konfuza distingado povas malhelpi la kreskadon de novaj aferoj. Tial ni devas sinteni singardeme rilate al problemoj de praveco kaj malpraveco en arto kaj scienco, kuraĝigi liberan diskutadon kaj ne devas facilanime fari konkludojn. Ni opinias, ke tia sinteno plifaciligos la kreskadon de arto kaj scienco.

Ankaŭ Marksismo disvolviĝas tra luktado. En la komenco Marksismo ricevis ĉiuspecajn atakojn kaj estis rigardata kiel venena herbo. Nuntempe ĝi estas ankoraŭ atakata kaj rigardata kiel venena herbo en multaj lokoj de la mondo. Malsama estas la pozicio de Marksismo en la socialismaj landoj. Sed eĉ en tiuj ĉi landoj, sin trovas ankoraŭ nemarksismaj kaj ankaŭ kontraŭmarksismaj ideologioj. En nia lando, kvankam socialisma transformo, koncerne posedsistemon, estas fundamente plenumita kaj la grandskalaj kaj uraganaj amasaj klasbataloj de la pasintaj revoluciaj periodoj estas fundamente finitaj, tamen la postrestaĵoj de la renversitaj bienula kaj kompradora klasoj ankoraŭ ekzistas, la burĝaro ankoraŭ ekzistas, kaj la remuldo de la etburĝaro nur ĵus komenciĝis. Klasbatalo ankoraŭ ne finiĝis. La klasbatalo inter la proletaro kaj la burĝaro, la klasbatalo inter diversaj politikaj fortoj kaj la klasbatalo en la ideologia kampo inter la proletaro kaj burĝaro estos ankoraŭ longdaŭraj, zigzagaj kaj iam eĉ tre akraj. La proletaro volas transformi la mondon laŭ sia mondkoncepto, kaj ankaŭ la burĝaro volas tion fari laŭ la sia. En tiu rilato, la problemo, kiu venkos kaj kiu malvenkos inter socialismo kaj kapitalismo, ankoraŭ ne estas vere solvita. Marksistoj konsistigas ankoraŭ malplimulton ĉu en la tuta loĝantaro ĉu en la intelektularo. Sekve Marksismo ankoraŭ devas disvolviĝi tra

luktado. Marksismo povas disvolviĝi nur tra luktado — tiel estas ne nur en la estinteco kaj estanteco, sed ankaŭ en la estonteco. La ĝusta ĉiam disvolviĝas en la procezo de luktado kontraŭ la erara. La vera, la bona kaj la bela ĉiam ekzistas en komparo kun la malvera, la malbona kaj la malbela kaj disvolviĝas en luktado kontraŭ la lastaj. Kiam io erara estas ĝenerale forĵetita kaj io vera ĝenerale akceptita de la homaro, pli nova vero komencas lukti kontraŭ novaj eraraj opinioj. Tiaj luktoj neniam finiĝos. Tio estas la leĝo de disvolviĝo de vero kaj, kompreneble, ankaŭ la leĝo de disvolviĝo de Marksismo.

En nia lando, la problemo, kiu venkos kaj kiu malvenkos en la ideologia lukto inter socialismo kaj kapitalismo, ankoraŭ bezonos sufiĉe longan tempon por esti fine solvita. La kialo estas, ke la influo de la burĝaro kaj la intelektuloj devenintaj de la malnova socio ankoraŭ restos longtempe en nia lando, kiel klasa ideologio ĝi ankoraŭ restos long-

tempe en nia lando. Se oni ne sufiĉe konas aŭ tute ne konas tiun ĉi situacion, oni faros grandegan eraron kaj ignoros la necesan ideologian luktadon. La luktado ideologia estas malsama ol alispecaj luktoj: anstataŭ kruda metodo de devigo, oni povas alpreni en ĝi nur delikatan metodon de rezonado. Hodiaŭ socialismo ĝuas favorajn kondiĉojn en la ideologia lukto. La ĉefa forto de la ŝtatpotenco estas en la manoj de la laboranta popolo gvidata de la proletaro. La Komunista Partio estas forta kaj ĝia prestiĝo estas tre alta. Kvankam estas difektoj kaj eraroj en nia laboro, tamen ĉiu justa persono povas vidi, ke ni estas lojalaj al la popolo, ke ni havas firman decidon kaj kapablon konstrui la patrion bonega kune kun la popolo, kaj ke ni jam akiris grandajn atingojn kaj akiros ankoraŭ pli grandajn atingojn. La plejparto de la burĝaro kaj la intelektuloj devenintaj de la malnova socio estas patriota; ili volontas servi al la pli kaj pli floranta socialisma patrio kaj komprenas,

ke se ili sin turnos for de la socialisma afero kaj la laboranta popolo gvidata de la Komunista Partio, ili povos sin apogi sur nenio kaj havos nenian brilan estontecon.

Oni demandas: En nia lando Marksismo jam estas agnoskita de plejmulto da homoj kiel la gvidanta ideologio, do, ĉu ĝi povas esti kritikata? Kompreneble jes. Marksismo estas scienca vero, kaj ĝi ne timas kritikon. Se Marksismo timus kritikon kaj povus esti venkita en kritikado, ĝi estus do senutila. Fakte, ĉu la ideistoj ne estas ĉiutage kritikantaj Marksismon en diversaj manieroj? Ĉu ne ankaŭ tiuj, kiuj sin tenas je burĝaraj kaj etburĝaraj ideoj kaj ne volas ilin ŝanĝi, estas kritikantaj Marksismon en diversaj manieroj? Marksistoj ne devas timi ies ajn kritikon. Kontraŭe, marksistoj devas hardi kaj disvolvi sin kaj plivastigi sian pozicion en alies kritikado kaj en la ŝtormo de luktado. Batalo kontraŭ eraraj ideoj similas al vakcinado — dank' al la efiko de vakcinado, oni akiras pli grandan

imunecon kontraŭ malsano. Plantaĵoj kreskigitaj en varmejoj ne povas havi grandan vivforton. La efektivigo de la orientilo "disvolviĝu cent floroj kaj konkuru cent skoloj" ne malfortigos, sed kontraŭe plifortigos la gvidantan pozicion de Marksismo en la ideologia kampo.

Kian orientilon oni devas adopti kontraŭ nemarksismaj ideoj? Kun evidentaj kontraŭrevoluciuloj kaj subfosantoj de la socialisma afero, la afero estas facila: ni simple senigu ilin je libereco de parolo. Rilate al la eraraj ideoj ekzistantaj interne de la popolo, la afero estas malsama. Ĉu oni povas malpermesi tiujn ideojn, donante al ili nenian ajn ŝancon por sin esprimi? Certe ne. Trakti per simplaj metodoj ideologiajn problemojn interne de la popolo, problemojn rilatantajn la spiritan mondon de la homo, ne nur donos nenian rezulton, sed estas eĉ tre malutile. Vi povas malpermesi eldiri erarajn ideojn, sed ili ankoraŭ ekzistas. Kaj se ĝustaj ideoj estas kreskigi-

taj en varmejoj, ne spertintaj severan veteron kaj ne imunigitaj kontraŭ malsano, ili do ne povos venki en batalo kontraŭ eraraj ideoj. Sekve, nur per la metodoj de diskutado, kritikado kaj rezonado oni povas efektive disvolvi ĝustajn ideojn, venki erarajn ideojn kaj vere solvi problemojn.

La burĝaro kaj etburĝaro nepre manifestas sian ideologion. Ili nepre esprimas sin obstine per diversaj rimedoj en politikaj kaj ideologiaj problemoj. Estas neeble postuli, ke ili tion ne faru. Ni ne devas uzi metodojn de subpremo por malebligi al ili sin esprimi, sed devas permesi al ili sin esprimi, kaj samtempe, kiam ili sin esprimas, argumenti kun ili kaj fari konvenajn kritikojn. Sendube, ni devas kritiki ĉiuspecajn erarajn ideojn. Ne fari kritikon, rigardi erarajn ideojn ĉien inundadi kaj lasi ilin libere okupi la "merkaton", kompreneble, ne estas prave. Se estas eraroj, oni devas ilin kritiki, se estas venenaj herboj, oni devas kontraŭ ili batali. Sed tia kritiko ne

devas esti dogmisma, oni ne devas uzi metafizikan metodon, sed devas ĉiurimede apliki dialektikan metodon. Estas bezonataj scienca analizo kaj sufiĉa konvinkeco. Dogmisma kritiko povas solvi neniun problemon. Ni oponas ĉiuspecajn venenajn herbojn, sed ni devas singardeme distingi, kio estas vera venena herbo, kaj kio estas vera aroma floro. Ni devas kune kun la popolamasoj ellerni singardeme distingi aromajn florojn disde venenaj herboj kaj kune uzi ĝustajn metodojn por batali kontraŭ venenaj herboj.

Kiam ni kritikas dogmismon, ni devas samtempe direkti nian atenton al la kritiko de reviziismo. Reviziismo, aŭ dekstra oportunismo, estas burĝara pensfluo, kaj ĝi estas pli danĝera ol dogmismo. Ankaŭ la reviziistoj, aŭ la dekstraj oportunistoj, havas Marksismon sur la lipoj kaj atakas "dogmismon". Sed tio, kion ili atakas, estas ĝuste la kvintesenco de Marksismo. Ili kontraŭstaras aŭ distordas materiismon

kaj dialektikon, kontraŭstaras aŭ provas malfortigi la popol-demokratian diktaturon kaj la gvidon de la Komunista Partio, kaj kontraŭstaras aŭ provas malfortigi socialisman transformadon kaj socialisman konstruadon. Post la fundamenta venko de la socialisma revolucio en nia lando, en la socio sin trovas ankoraŭ nombro da personoj, kiuj revas restaŭri la kapitalisman sistemon kaj volas batali kontraŭ la laborista klaso en ĉiuj frontoj, inkluzive la ideologian fronton. En tiu ĉi luktado, la reviziistoj estas iliaj plej bonaj helpantoj.

Laŭvorte, tiuj ĉi du sloganoj "disvolviĝu cent floroj kaj konkuru cent skoloj" ne havas klasan karakteron: ilin povas utiligi kaj la proletaro, kaj la burĝaro, kaj ankaŭ aliaj homoj. Pri aromaj floroj kaj venenaj herboj, ĉiuj klasoj, tavoloj kaj sociaj grupoj havas siajn proprajn opiniojn. Kio do estas la kriterioj hodiaŭ por distingi inter aromaj floroj kaj venenaj herboj laŭ la vidpunkto de la vastaj popolamasoj? Kiel

ni devas juĝi en la politika vivo de nia popolo la pravon kaj malpravon de niaj vortoj kaj agoj? Ni pensas, ke laŭ la principoj de nia Konstitucio, laŭ la volo de la plej granda plimulto de nia popolo kaj la kuna politika programo plurfoje proklamita de niaj politikaj partioj kaj grupoj, ni povas ĝenerale determini jenajn kriteriojn:

(1) Utili al la unuiĝo de la diversnacieca popolo de nia lando, kaj ne disigi ĝin;

(2) Utili al socialisma transformado kaj socialisma konstruado, kaj ne malutili al ili;

(3) Utili al la firmigo de la popol-demokratia diktaturo, kaj ne detrui aŭ malfortigi tiun ĉi diktaturon;

(4) Utili al la firmigo de la demokratia centralizismo, kaj ne detrui aŭ malfortigi tiun ĉi sistemon;

(5) Utili al la firmigo de la gvido de la Komunista Partio, kaj ne forskui aŭ malfortigi tiun ĉi gvidon;

(6) Utili al la internacia solidareco de socialismo kaj la internacia solidareco de la pacamaj popoloj tra la tuta mondo, kaj ne malutili al ili.

El la ses kriterioj, la plej gravaj estas la socialisma vojo kaj la gvido de la Partio. Tiuj ĉi kriterioj estas elmetitaj por helpi la popolon disvolvi liberan diskutadon pri diversaj problemoj, kaj ne por malhelpi tian diskutadon. Tiuj, kiuj malaprobas tiujn ĉi kriteriojn, povas ankoraŭ prezenti siajn proprajn opiniojn por interargumenti. Sed havante klarajn kriteriojn, la plejmulto da homoj povas konduki kritikon kaj memkritikon laŭ la ĝustaj reloj kaj distingi per tiuj ĉi kriterioj, ĉu ies vortoj kaj agoj estas ĝustaj, kaj ĉu ili estas aromaj floroj aŭ venenaj herboj. Tiuj ĉi estas politikaj kriterioj. Por juĝi la ĝustecon de sciencaj tezoj aŭ la estetikan nivelon de artaj verkoj, kompreneble iuj respektivaj kriterioj estas ankoraŭ bezonataj por ili. Sed tiuj ĉi ses politikaj kriterioj validas ankaŭ por ĉiu

ajn scienca aŭ arta agado. Ĉu en socialisma lando kiel la nia povus troviĝi iu utila scienca aŭ arta agado, kiu estas kontraŭa al tiuj ĉi politikaj kriterioj?

Ĉiuj vidpunktoj supre menciitaj devenis de la konkretaj historiaj kondiĉoj en nia lando. La kondiĉoj en diversaj socialismaj landoj kaj diversaj komunistaj partioj estas malsamaj. Tial ni ne opinias, ke ili devas aŭ bezonas sekvi nian agmanieron.

Ankaŭ la slogano de "longdaŭra kunekzistado kaj reciproka kontrolado" estas produktaĵo de la konkretaj historiaj kondiĉoj en nia lando. Ĝi ne estas elmetita subite, sed jam trapasis plurjaran preparadon. La ideo de longdaŭra kunekzistado jam ekzistas tre longe. Lastjare, kiam la socialisma sistemo jam estis fundamente starigita, la slogano estis eksplicite elmetita. Kial la demokratiaj partioj de la burĝaro kaj etburĝaro devas esti permesitaj longdaŭre ekzisti kune kun la politika partio de la laborista klaso? La kaŭzo

estas, ke ni ne havas kialon por ne adopti la orientilon de longdaŭra kunekzistado kun ĉiuj partioj, kiuj vere donas forton al la unuigo de la popolo por la afero de socialismo kaj ĝuas la fidon de la popolo. Ĉe la Dua Sesio de la Tutlanda Komitato de la Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco en junio 1950, mi jam diris la jenon: "La popolo kaj la Popola Registaro ne havas kialon forpuŝi iun ajn aŭ ne doni al iu ajn ŝancon por vivi kaj servi, se nur li efektive volontas servi al la popolo, efektive helpis la popolon, kiam la lasta estis ankoraŭ en malfacileco, faris kaj faras konstante bonajn aferojn kaj ne ĉesas duonvoje." Tio, kion mi diris tiam, estas la politika bazo por la longdaŭra kunekzistado de la diversaj partioj. La longdaŭra kunekzistado de la Komunista Partio kun la demokratiaj partioj estas nia deziro, ankaŭ nia orientilo. Ĉu tiuj partioj povos longe ekzisti, dependas ne nur de la deziro de la Komunista Partio, sed ankaŭ

de la manifestado de tiuj demokratiaj partioj mem kaj de tio, ĉu ili ĝuas la fidon de la popolo. Ankaŭ la fakto de reciproka kontrolado inter la diversaj partioj ekzistas jam de longe, t.e., iliaj reciprokaj konsilado kaj kritikadó. Reciproka kontrolado kompreneble ne estas unuflanka: la Komunista Partio povas kontroli la demokratiajn partiojn, ankaŭ la demokratiaj partioj povas kontroli la Komunistan Partion. Kial ni permesas la demokratiajn partiojn kontroli la Komunistan Partion? Ĉar same kiel individuo, partio tre bezonas aŭskulti opiniojn malsamajn ol la siajn. Ĉiuj scias, ke kontroladon super la Komunista Partio ĉefe faras la laboranta popolo kaj la membraro de la Partio. Sed la ekzisto de la demokratiaj partioj estos al ni ankoraŭ pli utila. Kompreneble, la konsiloj kaj kritikoj prezentitaj unu al la alia inter la Komunista Partio kaj la demokratiaj partioj ludos pozitivan rolon en reciproka kontrolado nur kondiĉe, ke ili konformas al la

supre menciitaj ses politikaj kriterioj. Tial ni esperas, ke ĉiuj demokratiaj partioj turnos sian atenton al ideologia remuldado kaj strebos al longdaŭra kunekzistado kaj reciproka kontrolado kun la Komunista Partio por konformiĝi al la bezonoj de la nova socio.

IX. PRI LA PROBLEMO DE TUMULTOJ KREITAJ DE MALMULTNOMBRAJ PERSONOJ

En 1956, en apartaj lokoj okazis strikoj de malmultnombraj laboristoj kaj studentoj. La rektaj kaŭzoj de tiuj ĉi tumultoj estis, ke iuj el iliaj materiaj postuloj ne estis kontentigitaj, kaj el tiuj unuj devus kaj ankaŭ povus esti kontentigitaj dum aliaj estis ne konvenaj aŭ tro postulemaj kaj sekve portempe nekontentigeblaj. Sed pli grava faktoro elvokinta la tumultojn estis burokratismo de la gvidantoj. Iujn el la burokratismaj eraroj devas prirespondi la superaj

instancoj, kaj oni ne povas riproĉi sole la subajn. Alia kaŭzo de la tumultoj estis manko de ideologi-politika edukado al la laboristoj kaj studentoj. En 1956 okazis ankaŭ tumultoj de malmultnombraj membroj de agrikulturaj kooperativoj, kaj ankaŭ ĉi tie la ĉefa kaŭzo estis burokratismo de la gvidantoj kaj manko de eduko al la amasoj.

Ni devas konfesi, ke iuj el la amasoj ofte pli atentas pri hodiaŭaj, partaj kaj personaj interesoj kaj ne komprenas aŭ ne sufiĉe komprenas longtempajn, tutlandajn kaj kolektivajn interesojn. Pro manko de sperto en politiko kaj socia vivo, sufiĉe multe da gejunuloj ne bone scias fari komparon inter la malnova Ĉinio kaj la nova, kaj ne estas facile por ili profunde kompreni, kiajn malfacilojn la popolo de nia lando travivis en la luktado por sin liberigi de la subpremo de la imperiistoj kaj la kuomintangaj reakciuloj kaj kia longtempa penego estas bezonata por starigi feliĉan socialisman

socion. Tial estas necese fari konstante vivecan kaj efikan politikan edukon inter la popolamasoj, kaj ni devas konstante laŭvere klarigi al ili la malfacilojn estiĝintajn kaj diskuti kun ili pri la rimedoj por solvi tiujn malfacilojn.

Ni ne aprobas tumultojn, ĉar kontraŭdiroj interne de la popolo povas esti solvataj per la metodo "unuiĝo — kritiko — unuiĝo", dum tumultoj neeviteble kaŭzas perdojn kaj estas malutilaj al la disvolviĝo de la socialisma afero. Ni kredas, ke la vastaj popolamasoj de nia lando subtenas socialismon, ke ili estas disciplinemaj kaj raciaj kaj ne faros tumultojn senkaŭze. Sed tio ne signifas, ke en nia lando jam ne plu troviĝas ebleco de tumultoj fare de amasoj. Rilate al tiu ĉi problemo, ni devas atenti la jenon:

(1) Por radikale forigi la kaŭzojn de tumultoj, ni devas decideme venki burokratismon, bone plifortigi ideologi-politikan edukon kaj ĝuste trakti ĉiujn

kontraŭdirojn. Se tio estos bone plenumita, tumultoj ĝenerale ne okazos.

(2) Se tumultoj okazos kaŭze de nia malbona laboro, tiam ni devos konduki tiujn amasojn implikitajn en la tumultoj al la ĝusta vojo, utiligi la tumultojn kiel specialan rimedon por plibonigi nian laboron kaj eduki la kadrojn kaj amasojn, kaj solvi la problemojn ne solvitajn en ordinara tempo. En la traktado de la tumultoj, ni devas fari subtilan laboron kaj ne uzu simplajn metodojn, nek haste deklaru la aferon finita. La gvidantoj de la tumultoj ne devas esti eksigitaj de siaj oficoj facilanime, escepte de elementoj farintaj krimajn ofendojn kaj aktivaj kontraŭrevoluciuloj, kiuj devas esti traktataj laŭ la leĝo. En tia granda lando, kia la nia, tute ne estas alarminde, se malmultaj personoj faras tumultojn; kontraŭe, tio povas helpi nin forigi burokratismon.

En nia socio troviĝas ankaŭ malmulte da personoj, kiuj ne zorgas publikajn in-

teresojn, rifuzas aŭskulti al racio, faras perfortaĵojn kaj rompas la leĝon. Ili eble profitas kaj distordas niajn orientilojn, intence prezentas nepravigeblajn postulojn por agiti la amasojn, aŭ intence distrumpetas kalumniojn por eksciti malkvieton kaj detrui la normalan ordon de socio. Ni ne aprobas lasi tiajn personojn agi senbride. Kontraŭe, oni devas doni al ili necesan leĝan sankcion. Puni tiajn personojn estas la postulo de la vastaj amasoj de la socio kaj ne fari tion estas kontraŭ la volo de la amasoj.

X. ĈU MALBONAJ AFEROJ POVAS FARIĜI BONAJ AFEROJ?

Kiel mi jam diris supre, en nia socio tumultoj de amasoj estas malbonaj aferoj, kiujn ni ne aprobas. Sed kiam okazas tumultoj, ili instigas nin akcepti lecionojn, venki burokratismon kaj eduki la kadrojn kaj la amasojn. En tiu ĉi senco, malbonaj

aferoj povas turniĝi en bonajn aferojn. Tumultoj havas duoblan karakteron. Ni povas rigardi ĉiujn tumultojn el tiu ĉi vidpunkto.

Estas klare por ĉiuj, ke la hungara evento ne estis bona afero. Sed ankaŭ ĝi havas duoblan karakteron. Ĉar hungaraj kamaradoj traktis ĝuste en la procezo de ĝia disvolviĝo, rezulte ĝi turniĝis de malbona afero en bonan aferon. Hungario fariĝis nun pli solida ol antaŭe, kaj ankaŭ ĉiuj aliaj landoj de la socialisma tendaro lernis lecionon.

Same, la mondskala kontraŭkomunisma kaj kontraŭpopola ŝtormo okazinta en la dua duonjaro de 1956 estis, kompreneble, malbona afero. Sed ĝi edukis kaj hardis la komunistajn partiojn kaj la laboristan klason en ĉiuj landoj, kaj tiel fariĝis bona afero. Dum tiu ĉi ŝtormo, nombro da homoj forlasis la komunistajn partiojn en multaj landoj. Eksiĝo de parto de la membroj el la partio kaj malpliiĝo de la nombro

de partianoj estas, kompreneble, malbona afero. Sed tio havas ankaŭ sian bonan flankon. La ŝanceliĝemaj elementoj, ne plu volante resti en la vicoj de la partio, fortiriĝis, kaj la plejparto de la firmaj partianoj povas pli bone unuigi sin por la luktado — kial tio ne estas bona afero?

Unuvorte, ni devas lerni rigardi problemojn ĉiuflanke, ne nur la pozitivan, sed ankaŭ la negativan flankon de aferoj. Sub difinitaj kondiĉoj, malbona afero povas konduki al bonaj rezultoj, kaj ankaŭ bona afero povas konduki al malbonaj rezultoj. Antaŭ pli ol du mil jaroj, Laŭ Zi jam diris: "Sur malfeliĉo sin apogas feliĉo, kaj en feliĉo sin kaŝas malfeliĉo."[9] Kiam la japanoj milite trudis sin en Ĉinion, ili nomis tion venko. Grandaj partoj de ĉina teritorio estis okupitaj, kaj la ĉinoj nomis tion malvenko. Sed en la malvenko de Ĉinio enteniĝis venko, dum en la venko de Japanio enteniĝis malvenko. Ĉu historio ne jam pruvis ĉi tion?

Tra la tuta mondo homoj estas nun priparolantaj, ĉu eksplodos tria mondmilito. Rilate al tiu ĉi problemo, ni devas esti mense preparitaj kaj samtempe fari analizon. Ni persistas pri paco kaj staras kontraŭ milito. Sed, se la imperiistoj insistas ĉe lanĉo de milito, ni ankaŭ ne devas ĝin timi. Nia sinteno en tiu ĉi problemo estas la sama, kiel nia sinteno al ĉiuj "tumultoj": unue, ni ĝin kontraŭstaras; due, ni ĝin ne timas. Post la Unua Mondmilito aperis Sovetunio kun loĝantaro nombranta ducent milionojn. Post la Dua Mondmilito estiĝis socialisma tendaro kun totala loĝantaro nombranta naŭcent milionojn. Se la imperiistoj insistas ĉe lanĉo de tria mondmilito, ni estas certaj, ke aliaj pluraj centmilionoj da homoj sin turnos al la flanko de socialismo; tiam restos por la imperiistoj jam ne multe da tereno kaj povos okazi ankaŭ plena disfalo de la imperiisma sistemo.

Kiel rezulto de sia interbatalo la du kontraŭstaraj flankoj en kontraŭdiro ĉiam turniĝas respektive en sian malon sub difinitaj kondiĉoj. Ĉi tie la kondiĉoj estas gravaj. Sen difinitaj kondiĉoj, neniu el la du kontraŭbatalantaj flankoj povas sin transformi en sian malon. En la mondo la klaso, kiu plej volas transformi sian pozicion, estas la proletaro, due estas la duonproletaro, ĉar la antaŭa posedas nenion dum la lasta ne multe. La nuna situacio, en kiu Usono komandas la plimulton de la voĉoj en la Unuiĝintaj Nacioj kaj superregas tre multajn partojn de la mondo, estas nur dumtempa kaj finfine ŝanĝiĝos. Ankaŭ la pozicio de Ĉinio kiel malriĉa lando kaj ĝia senrajteco en la internacia areno ŝanĝiĝos — malriĉa lando turniĝos en riĉan landon kaj senrajteco turniĝos en plenrajtecon—ŝanĝiĝo en kontraŭa direkto. Ĉi tie la decidigaj kondiĉoj estas la socialisma sistemo kaj la unuanime kunigita strebado de la popolo.

XI. PRI ŜPARO

Ĉi tie mi volas paroli iomete pri la problemo de ŝparo. Ni deziras entrepreni grandskalan konstruadon, sed nia lando estas ankoraŭ tre malriĉa — tio estas kontraŭdiro. Longdaŭra praktikado de ŝparo en ĉiuj flankoj estas rimedo por solvi tiun ĉi kontraŭdiron.

Dum la movado de "tri kontraŭoj" en 1952, ni batalis kontraŭ koruptiĝo, malŝparo kaj burokratismo, kun emfazo sur batalo kontraŭ koruptiĝo. En 1955 ni pledis por ŝparo, kun emfazo sur opono kontraŭ tro altaj normoj por neproduktaj projektoj en fundamenta konstruado kaj sur ŝparo en la uzado de krudmaterialoj en industria produktado. La atingo estis sufiĉe granda. Tiam la orientilo de ŝparo estis ankoraŭ ne serioze efektivigata en ĉiuj branĉoj de la nacia ekonomio, nek en registaraj oficejoj, armeaj unuoj, lernejoj kaj popolaj organizoj ĝenerale. Ĉijare

ni postulas kuraĝigon de ŝparo kaj batalon kontraŭ malŝparo en ĉiuj flankoj tra la tuta lando. Al ni ankoraŭ mankas sperto en konstrua laboro. Dum la pasintaj kelkaj jaroj, estis atingita granda sukceso, sed samtempe troviĝas ankaŭ malŝparo. Ni devas paŝon post paŝo konstrui aron da grandskalaj modernaj entreprenoj kiel la skeleton, sen kiu ni ne povos transformi nian landon en modernan industrian potencon en la daŭro de kelkdek jaroj. Sed la plejparto de niaj entreprenoj ne devas esti tiel konstruataj; ni devas starigi multe pli da mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj kaj plene utiligi la industrian bazon restigitan de la malnova socio, plenforte strebante al ŝparo, elspezante kompare malmulte da mono por fari pli da laboro. De kiam la orientilo praktiki rigoran ŝparadon kaj oponi malŝparemon estis pli emfaze elmetita de la Dua Plena Sesio de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio en novembro lastjare, efikoj jam

komencis montriĝi en la pasintaj monatoj. La nuna movado de ŝparo devas esti ĝisfunde kaj longdaŭre farata. Ĝuste kiel kritikado kontraŭ niaj aliaj difektoj kaj eraroj, la oponado kontraŭ malŝparemo similas al vizaĝlavado. Ĉu oni ne lavas sian vizaĝon ĉiutage? La Komunista Partio de Ĉinio, la demokratiaj partioj, senpartiaj demokratoj, intelektuloj, industriistoj kaj komercistoj, laboristoj, kamparanoj kaj metiistoj, unuvorte, nia tuta sescentmiliona loĝantaro devas praktiki produktopliigon kaj ŝparon kaj kontraŭbatali luksemon kaj malŝparemon. Tio havas grandan signifon ne nur ekonomie sed ankaŭ politike. Inter multaj el niaj laborantoj kreskas lastatempe danĝera tendenco — malemo al divido de ĝojo kaj sufero kun la amasoj kaj emo al zorgo pri persona famo kaj gajno. Tio estas tre malbona. Unu el la metodoj por venki tiun ĉi danĝeran tendencon estas, ke en nia kampanjo de produktopliigo kaj ŝparo,

ni simpligu niajn organizojn kaj transigu kadrojn al pli subaj niveloj, por ke sufiĉe granda nombro da kadroj revenu al produkta laboro. Ni klopodu, ke ĉiuj niaj kadroj kaj ĉiuj niaj popolanoj ĉiam memoru, ke Ĉinio estas granda socialisma lando sed ankaŭ ekonomie postiĝinta malriĉa lando, kaj ke tio estas tre granda kontraŭdiro. Por ke Ĉinio riĉiĝu kaj potenciĝu, necesas kelkdek jaroj da malfacila strebado, en kiu inkluziviĝos la plenumo de la orientilo praktiki rigoran ŝparon kaj oponi malŝparemon, por konstrui nian landon en diligentema kaj ŝparema maniero.

XII. LA VOJO DE INDUSTRIIGO DE ĈINIO

La problemo de la vojo de industriigo priparolata ĉi tie ĉefe aludas la interrilatojn en la disvolviĝo de peza industrio, malpeza industrio kaj agrikulturo. Ke peza industrio estas la centro de la ekonomia

konstruado de Ĉinio, tio devas esti certigita. Sed samtempe, ni devas plene priatenti la disvolvadon de agrikulturo kaj malpeza industrio.

Ĉinio estas granda agrikultura lando, en kiu la kampara loĝantaro konsistigas pli ol 80 procentojn de la tutlanda loĝantaro. Industrio devas esti disvolvata samtempe kun agrikulturo, nur tiam industrio havos krudajn materialojn kaj merkaton por siaj produktaĵoj, kaj nur tiam estos ebleco akumuli pli multe da fonduso por starigi potencan pezan industrion. Ĉiuj scias, ke malpeza industrio havas tre intiman rilaton kun agrikulturo. Sen agrikulturo ne povas esti malpeza industrio. Nuntempe oni ankoraŭ ne klare vidas, ke peza industrio devas havi agrikulturon kiel sian gravan merkaton. Sed tio estos pli facile komprenebla, kiam kun la paŝo-post-paŝa disvolviĝo de agrikultura teknik-plibonigo kaj tago-post-taga modernigo de agrikulturo, plimultiĝos tagon post tago maŝinoj, ster-

koj, akvoutiligaj konstruoj, elektraj stacioj kaj transportaj faciligoj servantaj agrikulturon kaj brulaĵoj kaj konstruaj materialoj por kamparana konsumado ktp. Se dum la periodo de la Dua kaj Tria Kvinjaraj Planoj ni povos atingi pli grandan disvolviĝon en nia agrikulturo, tiel ke ni havos proporcie pli multan disvolviĝon en nia malpeza industrio, tio utilos al la tuta nacia ekonomio. Kiam agrikulturo kaj malpeza industrio estos disvolvitaj, peza industrio, havante sian merkaton kaj fonduson, tiam disvolviĝos pli rapide. Tiel la paŝo de industriigo ŝajnas iom malrapida, sed efektive ĝi ne estas tia, aŭ kontraŭe estas eble eĉ pli rapida. Post tri kvinjaraj planoj aŭ iom pli longe, nia jara produkto de ŝtalo povos kreski de la plej alta produkto antaŭ la Liberiĝo, nome de pli ol 900,000 tunoj en 1943, ĝis 20,000,000 tunoj aŭ pli multe. Tiam ĝojos la popolo kaj en la urboj kaj en la vilaĝoj.

Mi ne multe parolos pri ekonomiaj problemoj hodiaŭ. Ankoraŭ mankas al ni sperto en ekonomia konstruado, kiun ni entreprenis nur sep jarojn, kaj ni ankoraŭ bezonas akumuli sperton. Ankaŭ en revolucio, komence ni ne havis sperton, faris stumblojn, kaj nur poste, akirinte sperton, ni gajnis la tutlandan venkon. Ni devas akiri la sperton de ekonomia konstruado en malpli longa tempo ol ni bezonis por tiu de revolucio, kaj samtempe ne pagi tiom altan prezon. Pago de prezo estas ne evitebla, sed ni esperas nur, ke ĝi ne estu tiel alta, kiel tiu pagita dum la revolucia periodo. Ni devas kompreni, ke en tiu ĉi problemo sin trovas kontraŭdiro, t.e., tiu inter la objektivaj leĝoj de la ekonomia disvolviĝo de socialisma socio kaj nia subjektiva kono, kiun ni devas solvi en praktikado. Tiu ĉi kontraŭdiro manifestiĝos ankaŭ kiel kontraŭdiro inter homoj, t.e., kontraŭdiro inter tiuj, kiuj relative ĝuste reflektas objektivajn leĝojn,

kaj tiuj, kiuj relative neĝuste reflektas objektivajn leĝojn, kaj tial ankaŭ tio ĉi estas kontraŭdiro interne de la popolo. Ĉiuj kontraŭdiroj estas objektive ekzistantaj, kaj nia tasko estas speguli ilin kaj solvi ilin kiel eble ĝuste.

Por transformi nian landon en industrian landon, ni devas serioze lerni la progresintan sperton de Sovetunio. Sovetunio konstruis socialismon jam kvardek jarojn, kaj ĝia sperto estas treege valora por ni. Ni rigardu, kiu projektis kaj ekipis tiom da gravaj fabrikoj por ni? Ĉu Usono? Aŭ Britio? Ne, neniu el ili. Nur Sovetunio estis volonta tion fari, ĉar ĝi estas socialisma lando kaj nia aliancano. Krom Sovetunio, ankaŭ kelkaj frataj landoj de Orienta Eŭropo donis al ni iom da helpo. Estas tute prave, ke ni devas lerni la bonan sperton de ĉiuj landoj, ĉu socialismaj ĉu kapitalismaj, kaj tio estas ekster dubo. Sed ĉefe ni devas lerni de Sovetunio. Estas du malsamaj sintenoj en lernado.

Unu estas dogmisma sinteno: transpreni ĉion sen konsideri, ĉu ĝi taŭgas aŭ ne al la kondiĉoj de nia lando. Tio ne estas bona sinteno. La alia sinteno estas pensi per niaj cerboj dum lernado kaj lerni tion, kio taŭgas al la kondiĉoj de nia lando, t.e., sorbi la al ni utilan sperton. Tia estas la sinteno de ni bezonata.

Firmigi nian unuiĝon kun Sovetunio, firmigi nian unuiĝon kun ĉiuj socialismaj landoj — tio estas nia fundamenta orientilo kaj ĉi tie kuŝas nia fundamenta intereso. Krome, estas la aziaj kaj afrikaj landoj kaj ĉiuj pacamaj landoj kaj popoloj — kun ili ni devas firmigi kaj disvolvi la unuiĝon. Unuiĝinte kun tiuj ĉi du fortoj, ni estos ne plu izolaj. Rilate al la imperiismaj landoj, ni ankaŭ devas unuiĝi kun iliaj popoloj kaj klopodi pace kunekzisti kun tiuj landoj, komerci kun ili kaj preventi eblan militon, sed ni nepre ne portu iajn nerealajn pensojn pri tiuj landoj.

KLARIGOJ

1. La hungara evento aludas al la kontraŭrevolucia ribelo okazinta en Hungario en oktobro 1956. En la lasta tagdeko de oktobro 1956, la imperiistoj instigis en Hungario, unu el la socialismaj landoj de Orienta Eŭropo, kontraŭrevolucian ribelon, en kiu revoluciaj popolanoj kaj kompartianoj estis grandamase masakritaj kaj la hungara ĉefurbo Budapesto estis unutempe okupata. La imperiistoj vane provis trabati breĉon en la socialisma tendaro tra Hungario, kun la celo detrui la socialismajn landojn unu post alia. La 4-an de novembro, la hungara popolo establis sian Laborist-Kamparanan Revolucian Registaron kaj, helpe de la Ruĝa Armeo de Sovetunio, kun la simpatio kaj subteno de ĉiuj landoj de la socialisma tendaro kaj la progresemaj fortoj de la tuta mondo, frakasis la komploton por kontraŭrevolucia restaŭro.

2. Fiksita interezo estas formo de efektivigo de la politiko adoptita de la ŝtato por reaĉeti la rimedojn de produktado de la nacia burĝaro en la procezo de socialisma transformado de nia lando. Post la ĉiubranĉa transformado de kapitalismaj industrio kaj komerco en ŝtate-private kune funkciigatajn entreprenojn en 1956, la ŝtato en difinita

periodo da tempo ĉiujare pagis al la kapitalistoj fiksitan procenton da interezo surbaze de la mona valoro de iliaj aktivoj, nomatan fiksita interezo. Tiu fiksita interezo ankoraŭ portas ekspluatan karakteron.

3. En 1957, laŭ la propono de kamarado Maŭ Zedong, la centra kaj lokaj diversnivelaj registaroj faris tutampleksan kontrolon pri la laboro de elimino de kontraŭrevoluciuloj. La rezultoj de kontrolado montris, ke en la batalo de elimino de kontraŭrevoluciuloj estis akiritaj grandaj sukcesoj, ke absoluta plimulto de procesoj en la batalo estis traktata ĝuste kaj ke nur en esceptaj kazoj estis faritaj eraroj, kiuj estis tuj korektitaj kiam ajn malkovritaj. En la somero de 1957, la burĝaraj dekstraj elementoj, utiligante nian kontrolon de la laboro de elimino de kontraŭrevoluciuloj, levis venton kaj ondojn por nei la sukcesojn en tiu ĉi laboro kaj ataki politikon de nia Partio pri elimino de kontraŭrevoluciuloj. Pro la opono de la popolo tra la tuta lando, ilia intrigo malsukcesis.

4. La Vangguofana Kooperativo estas la Agrikultur-arbarkultur-brutbreda Produkta Kooperativo "Gianming" en la vilaĝo Hisiŝilipu, Zunhuagubernio, Hebej-provinco. Sub la gvido de la kooperativestro Vang Guofan, tiu ĉi kooperativo fariĝis famkonata tra la tuta lando pro sia diligenta

kaj ŝparema administrado. En septembro 1958 la Vangguofana Kooperativo ricevis pluan disvolvon kaj estis transformita en la Popolan Komunumon "Gianming" kun Vang Guofan kiel la direktoro.

5. Ĝino, ĉina pezunuo, egalas duonkilogramon — *Trad.*

6. Demokratia reformo en Tibeto estis poste efektivigita pli frue ol la tempo menciita. En la 19-a de marto 1959, la tibeta loka registaro kaj la supertavolaj reakciuloj de Tibeto lanĉis plenskalan armitan ribelon en koluzio kun imperiistoj kaj fremdlandaj intervenistoj post longtempaj planado kaj preparo. Sub la aktiva kunhelpado de la vastaj amasoj de patriotaj tibetanoj, kaj lamaoj kaj laikoj, la Popola Liberiga Armeo rapide subigis la ribelon. Post tio, demokratia reformo estis efektivigita tra la vasta areo de Tibeto, kie la popolanoj tiel liberigis sin de la plej malluma kaj plej barbara servuta sistemo.

7. N. Koperniko (1473 — 1543) estis pola astronomo. En sia verko *Pri Rivoluo de Ĉielaj Sferoj*, Koperniko montris, ke la tero turniĝas ĉirkaŭ sia akso kaj kune kun la aliaj planedoj rondiras ĉirkaŭ la suno, refutante tiamaniere la kelkmiljaran doktrinon pri senmoveco de la tero.

8. Ĉ. Darvino (1809 — 1882) estis fama angla biologo. En sia verko *Origino de Genroj Pere de Natura Selekto* kaj aliaj verkoj, Darvino elmetis la evolucian teorion, malkovrante la leĝojn de estiĝo, ŝanĝiĝo kaj disvolviĝo de vegetaĵoj kaj animaloj.

9. Vd. *Laŭ Zi*, ĉapitro 58.

PAROLADO EN LA TUTLANDA KONFERENCO DE LA KOMUNISTA PARTIO DE ĈINIO PRI PROPAGANDA LABORO

(*12 marto 1957*)

Gekamaradoj! Tiu ĉi konferenco[1] iras bone. En ĝi estas elmetitaj multaj problemoj, kiuj konigas al ni multajn aferojn. Nun mi volus diri kelkajn opiniojn pri la problemoj de vi diskutitaj.

Ni vivas nun en periodo de grandaj sociaj ŝanĝoj. La ĉina socio troviĝas en grandaj ŝanĝoj jam delonge. La Kontraŭjapana Rezistmilito estis periodo de granda ŝanĝo, ankaŭ la Liberiga Milito estis periodo de granda ŝanĝo. Sed laŭ la karaktero, la nunaj ŝanĝoj estas multe pli profundaj ol la pasinttempaj. Ni estas nun

konstruantaj socialismon. Kelkcent milionoj da loĝantoj envolviĝis en la movado de socialisma transformo. Ŝanĝiĝas la interrilatoj de ĉiuj klasoj en la tuta lando. Spertas ŝanĝojn kiel la etburĝaro en agrikulturo kaj metiindustrio, tiel ankaŭ la burĝaro en industrio kaj komerco. La socia ekonomia sistemo aliiĝis: la individua ekonomio transformiĝis en kolektivan ekonomion, kaj la kapitalisma privata posedsistemo estas transformiĝanta en socialisman publikan posedsistemon. Tiaj grandaj ŝanĝoj kompreneble speguliĝas en la homa penso. Ekzisto determinas konscion. Tiuj grandaj ŝanĝoj de socia sistemo speguliĝas diversmaniere inter la elementoj de malsamaj klasoj, socitavoloj kaj sociaj grupoj. La vastaj popolamasoj varme ilin subtenas, ĉar, kiel pruvas la reala vivo, socialismo estas la unika eliro por Ĉinio. Renversi la malnovan socisistemon kaj starigi la novan, t.e., la socialisman sistemon, estas granda batalo, granda ŝanĝo

en la socia sistemo kaj homaj interrilatoj. Oni devas diri, ke fundamente tio iras sane. Sed, la nova socia sistemo estas ĵus establita; necesas tempo por ĝin firmigi. Oni ne devas pensi, ke la nova sistemo fariĝas tute solida tuj post sia fondiĝo. Tio ne eblas. Estas necese ĝin firmigi paŝo post paŝo. Por ĝin firmigi definitive, oni devas plenumi la socialisman industriigon de la lando, persisti en la socialisma revolucio sur la ekonomia fronto kaj, plie, fari konstantajn kaj penigajn socialisman revolucian batalon kaj socialisman edukadon sur la politika kaj ideologia frontoj. Krom tio, estas necesa ankaŭ la kunordiĝo de diversaj kondiĉoj internaciaj. En nia lando, la lukto por firmigi la socialisman sistemon kaj la batalo de "kiu venkos kiun" inter socialismo kaj kapitalismo ankoraŭ daŭros dum tre longa historia periodo. Tamen ni ĉiuj devas vidi, ke tiu ĉi nova sistemo de socialismo certe firmiĝos. Ni certe sukcesos konstrui socialisman landon kun moderna

industrio, moderna agrikulturo kaj moderna scienco kaj kulturo. Tio estas la unua punkto pri kiu mi volis paroli.

Due: Pri la situacio de la intelektuloj en nia lando. Ne estas ekzakta statistiko pri la nombro de intelektuloj en Ĉinio. Oni taksas, ke estas entute ĉirkaŭ kvin milionoj da diverstipaj intelektuloj, inkluzive de la superaj kaj ordinaraj. El ili la plejparto estas patriota, amas nian Ĉinan Popolan Respublikon kaj volonte servas al la popolo kaj al la socialisma ŝtato. Malgranda nombro da intelektuloj ne tiom bonvenigas la socialisman sistemon kaj ne tiom ĝojas pro ĝi. Ili ankoraŭ havas dubon pri socialismo, sed antaŭ imperiismo, ili ja estas patriotaj. Tiuj intelektuloj, kiuj montriĝas malamikaj al nia ŝtato, estas treege malmultaj. Tiaj homoj ne ŝatas nian ŝtaton de proletara diktaturo, ili sopiras al la malnova socio. Ĉiam, kiam prezentiĝas okazo, ili kreas malordojn kun la intenco renversi la Komunistan Partion

kaj restarigi la malnovan Ĉinion. Inter la proletara vojo kaj la burĝara, inter la socialisma vojo kaj la kapitalisma, ili obstinas en la dua. Sed tiu dua vojo praktike estas netrairebla; pro tio, ili fakte estas pretaj kapitulaci al imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapitalismo. Tiaj homoj troviĝas en rondoj politika, industria kaj komerca, kultura kaj eduka, scienca kaj teknika kaj religia, kaj ili estas ekstreme reakciaj. En la nombro de ĉirkaŭ kvin milionoj, ili okupas nur unu, du aŭ tri procentojn. La plejparto de la intelektuloj, t.e. pli ol naŭdek procentoj de la tuto de kvin milionoj, subtenas en malsamaj gradoj la socialisman sistemon. El la subtenantoj de la socialisma sistemo multaj ankoraŭ ne klare scias kiel labori sub ĝi, kiel kompreni, trakti kaj respondi grandnombrajn novajn demandojn.

Laŭ la sinteno al Marksismo, ŝajne oni povas diri, ke el la ĉirkaŭ kvin milionoj da intelektuloj pli ol dek procen-

toj, inkluzive kompartianojn kaj simpatiantojn ekster la Partio, konas relative bone Marksismon kaj firme staras sur siaj piedoj, sur la proletara pozicio. Ili estas malplimulto el la tuto de kvin milionoj, sed ili estas la kerno kaj havas forton. La plimulto volas lerni Marksismon kaj jam iom lernis, sed ankoraŭ ne sufiĉe ĝin konas. Iuj el ili restas en dubo, ankoraŭ ne firme staras sur siaj piedoj kaj ŝanceliĝas jen dekstren jen maldekstren kiam ajn okazas ŝtormo. Tiuj ĉi intelektuloj, konsistigantaj la plimulton el la tuto de kvin milionoj, troviĝas en meza pozicio. Tiuj, kiuj obstine oponas Marksismon kaj tenas sin malamike kontraŭ ĝi, formas nur ekstreme malgrandan parton. Iuj ne publike montras sin malaprobantaj Marksismon, sed reale ĝin malkonsentas. Tiaj homoj ekzistos dum longa tempo, kaj ni devas permesi al ili malkonsenti. Ekzemple, parto de ideistoj povas konsenti la politikan kaj ekonomian sistemojn de socialismo, sed ne la marksisman mond-

koncepton. La samo estas pri la patriotaj personoj en religiaj rondoj. Ili estas teistoj, dum ni estas ateistoj. Ni ne povas trudi al ili la marksisman mondkoncepton. Unuvorte, ni povas diri, ke, rilate al Marksismo, la ĉirkaŭ kvin milionoj da intelektuloj troviĝas en la jena stato: Tiuj, kiuj ĝin aprobas kaj konas relative bone, estas malmultaj; ankaŭ tiuj, kiuj ĝin kontraŭstaras, estas malmultaj; la plimultaj ĝin konsentas, sed ne bone ĝin konas, kaj ili konsentas en malsamaj gradoj. Ekzistas do tri sintenoj: firma, ŝanceliĝa kaj opozicia. Ni devas rekoni, ke tiu stato ankoraŭ daŭros en longa tempo. Se ni ne rekonus ĝin, ni farus postulon tro altan al aliaj kaj malaltigus la nivelon de nia tasko. Niaj kamaradoj okupataj en la propaganda laboro havas la taskon diskonigi Marksismon. Diskonigi Marksismon devas esti iompostiome kaj lerte, por ke oni volonte ĝin akceptu. Ni ne povas trudi Marksismon al aliaj, sed nur akceptigi ĝin al ili per persvado. Estos

bone, se dum kelkaj venontaj kvinjaraj planoj relative granda nombro da personoj el niaj intelektuloj akceptos Marksismon kaj ĝin komprenos sufiĉe multe tra la praktiko de la laboro kaj vivo, tra la praktiko de klasbatalo, de produktado kaj de scienca aktivado. Tio estas nia espero.

Trie: La problemo de la remuldo de la intelektuloj. Ĉinio estas kulture nedisvolvita lando. Ĉirkaŭ kvin milionoj da intelektuloj estas tro malmultaj por nia tiom vasta lando. Sen intelektuloj ni ne povas bone plenumi niajn aferojn, kaj tial ni devas bone unuiĝi kun ili. La socialisma socio konsistas ĉefe el tri sociaj grupoj: la laboristoj, la kamparanoj kaj la intelektuloj. Intelektuloj estas mensaj laborantoj. Ilia laboro estas servi al la popolo, t.e. al la laboristoj kaj kamparanoj. La intelektuloj, en sia plejmulto, povas servi al la malnova Ĉinio kaj ankaŭ al la nova Ĉinio, povas servi al la burĝaro kaj ankaŭ al la proletaro. Kiam ili servis al la

malnova Ĉinio, ilia maldekstra alo rezistis, la mezaj elementoj ŝanceliĝis, nur la dekstra alo estis firma. Nun kiam ili pasis al la servado al la nova socio, la stato de la aferoj inversiĝis. La maldekstra alo estas firma, la mezaj elementoj ŝanceliĝas (tio estas ŝanceliĝo en la nova socio, malsama ol en la pasinta tempo), kaj la dekstra alo rezistas. Intelektuloj estas krome edukantoj. Niaj ĵurnaloj ĉiutage edukas la popolon. Niaj literaturistoj kaj artistoj, niaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj, niaj profesoroj kaj instruistoj, ĉiuj instruas la popolon, instruas lernantojn. Ĉar ili estas edukantoj, instruantoj, ili havas la taskon esti unue edukataj, precipe en tiu ĉi periodo de grandaj ŝanĝoj en la socia sistemo. En la lastaj jaroj, ili ricevis kelkan marksisman edukadon, kaj iuj el ili diligente studis kaj multe progresis. Sed por la plimulto restas ankoraŭ tre malproksima la kompleta anstataŭigo de ilia burĝara mondkoncepto per la proletara. Iuj, leginte kelkajn marksismajn librojn,

opinias sin jam eruditoj. Sed efektive ili ne asimilis la legitaĵon, ne enradikis ĝin en sia kapo, ne scipovas ĝin apliki, kaj iliaj klassentoj restas malnovaj. Aliaj montriĝas tre malmodestaj. Leginte nur kelkajn frazojn, ili jam rigardas sin tre altaj kaj tenas la nazon supren ĝis la ĉielo. Tamen, kiam ajn okazas ŝtormo, ilia starpunkto fariĝas tute malsama ol tiu de la laboristoj kaj la plejmulto de la laborantaj kamparanoj: tiu de la unuaj estas ŝanceliĝa kaj ambigua, dum tiu de la lastaj estas firma kaj klara. Tial estas erare opinii, ke la edukantoj ne plu bezonas ricevi edukadon nek fari lernadon, kaj ke la socialisma remuldo celas nur aliajn, la bienulojn, la kapitalistojn kaj la individuajn produktantojn, sed ne la intelektulojn. Ankaŭ la intelektuloj devas esti remuldataj. Ne nur tiuj, kies fundamenta starpunkto ankoraŭ ne ŝanĝiĝis, devas esti remuldataj, sed ĉiuj devas lerni kaj remuldi sin. Mi diras "ĉiuj", inkluzive nin mem, kiuj estas ĉi

tie. La cirkonstancoj estas senĉese ŝanĝiĝantaj, kaj por adapti nian penson al la novaj cirkonstancoj, necesas lerni. Eĉ tiuj, kiuj relative bone komprenas Marksismon kaj havas relative firman proletaran starpunkton, devas plu lerni, devas akcepti novajn aferojn kaj studi novajn problemojn. Se la intelektuloj ne forigas el sia cerbo la malĝustaĵojn, ili ne kapablas preni sur sin la taskon eduki aliajn. Nature, ni povas nur instrui kaj lerni samtempe, esti instruantoj kaj lernantoj samtempe. Por esti bonaj instruantoj, ni devas antaŭ ĉio esti bonaj lernantoj. Multajn objektojn ni ne sukcesas lerni nur de libroj. Ni devas lerni de la produktantoj, de la laboristoj, de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj, en lernejoj, de la lernantoj, de tiuj al kiuj ni donas edukadon. Laŭ mia opinio, la plimulto de niaj intelektuloj volas lerni. Nia tasko estas, surbaze de ilia memvola lernado, helpi ilin bonintence, per taŭga metodo;

ni ne devas devige altrudi al ili la lernadon.

Kvare: La problemo pri la kombino de intelektuloj kun laboristaj kaj kamparanaj amasoj. Ĉar la intelektuloj devas servi al la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, antaŭ ĉio ili devas kompreni ilin, bone koni ilian vivon, laboron kaj penson. Ni stimulas, ke la intelektuloj iru inter la popolamasojn, al fabrikoj kaj kamparo. Estus tre malbone, se ili dum la tuta vivo ne renkontiĝus kun laboristoj kaj kamparanoj. Ĉiuj niaj laborantoj de ŝtataj institucioj, literaturistoj, artistoj, instruistoj kaj sciencaj laborantoj devas profiti ĉian eblan okazon por alproksimiĝi al laboristoj kaj kamparanoj. Iuj el ili povas iri al fabrikoj aŭ kamparo por fari rigardojn kaj vizitojn; tio nomiĝas "rigardi florojn rajdante" kaj estas pli bona ol nenion fari. Aliaj povas resti kelkajn monatojn en fabrikoj aŭ kamparo kaj fari tie esplorojn kaj akiri novajn amikojn; tio estas nomata "deĉevaliĝi por

rigardi florojn". Ankoraŭ aliaj povas longe resti, ekzemple du jarojn, tri jarojn, aŭ eĉ plilonge, por vivi tie; tio nomiĝas "fiksloĝiĝi". El la intelektuloj, iuj jam vivas inter laboristoj kaj kamparanoj. Ekzemple, la industriaj teknikistoj jam estas en fabrikoj, la agrikulturaj teknikistoj kaj instruistoj de vilaĝaj lernejoj jam estas en la kamparo. Ili devas bone plenumi siajn laborojn kaj kunfandiĝi kun la laboristoj kaj kamparanoj. Ni devas akceli, ke la alproksimiĝo al la laboristaj kaj kamparanaj amasoj fariĝu ĝenerala kutimo, t.e., ke multaj intelektuloj agu tiamaniere. Kompreneble ne povas iri al fabrikoj kaj kamparo ĉiuj intelektuloj centprocente. Iuj ne povas iri pro diversaj kaŭzoj. Sed ni esperas, ke iru kiel eble pli multe da personoj. Ne povas iri ĉiuj en unu fojo, sed ili povas iri laŭvice, grupo post grupo. En la pasinteco, en la jan'an-a periodo, ni igis la intelektulojn rekte kontakti kun laboristoj kaj kamparanoj. Tiam inter mul-

taj intelektuloj de Jan'an regis ĥaosaj ideoj kaj estis diversaj strangaj argumentoj. Ni kunvokis kunvenon kaj konsilis, ke ĉiuj iru inter la amasojn. Poste, multaj tion faris kaj gajnis bonan rezultaton. La scioj, akiritaj de intelektuloj el libroj, estas nekompletaj, aŭ ege nekompletaj, kiam ili ne kombiniĝas kun praktiko. Intelektuloj ricevas la spertojn de antaŭuloj ĉefe per legado de libroj. Librojn, kompreneble, oni ne povas ne legi, sed nura legado ne povas solvi problemojn. Estas necese studi la aktualan situacion, studi praktikajn spertojn kaj konkretajn materialojn kaj amikiĝi kun laboristoj kaj kamparanoj. Amikiĝi kun laboristoj kaj kamparanoj ne estas facila afero. Nun, el tiuj, kiuj iris al fabrikoj kaj kamparo, iuj rikoltis bonajn rezultojn, sed aliaj ne. Ekzistas en tio problemo de starpunkto, aŭ de sinteno, t.e. problemo de mondkoncepto. Ni stimulas, ke konkuru inter si cent skoloj, kaj ĉiu scienca branĉo povas havi multajn skolojn, sed rilate al

mondkoncepto, en la nuna epoko ekzistas fundamẽnte nur du skoloj: la proletara kaj la burĝara. Aŭ mondkoncepto de la proletaro aŭ mondkoncepto de la burĝaro. La komunisma mondkoncepto estas tiu de la proletaro kaj ne de iu ajn alia klaso. Nun la plimulto de niaj intelektuloj venis de la malnova socio kaj devenis el familioj nelaborulaj. Iuj, kvankam devenintaj el laboristaj aŭ kamparanaj familioj, ankaŭ estas burĝaraj intelektuloj, ĉar antaŭ la Liberiĝo ili ricevis burĝaran edukadon kaj ilia mondkoncepto restas fundamente burĝara. Se tiuj personoj ne forĵetas kion ili akiris en la pasinteco kaj ne substituas ĝin per la proletara mondkoncepto, ili do, kun vidpunkto, stargrundo kaj sentimento malsamaj ol tiuj de la laboristoj kaj kamparanoj, malkonkordos kun la lastaj, kaj la lastaj ne malfermos al ili sian koron. Se la intelektuloj sin kombinas kaj amikiĝas kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, ili povos havigi al si kiel proprajon la Marksismon, kiun ili lernis de libroj. Oni devas lerni Marksismon ne nur de libroj, sed ĉefe tra la klasbatalo, laborpraktiko kaj alproksimiĝo al la laboristaj kaj kamparanaj amasoj; nur tiamaniere oni povas vere ĝin asimili. Se niaj intelektuloj legas iujn librojn pri Marksismo kaj akiras ian komprenon pri ĝi en sia alproksimiĝo al la laboristaj kaj kamparanaj amasoj kaj en la praktiko de sia laboro, ni do ĉiuj havos komunan lingvon, ne nur rilate al patriotismo kaj socialisma sistemo, sed ankaŭ al komunisma mondkoncepto. Se estas tiel, ni ĉiuj plenumos multe pli bone niajn laborojn.

Kvine: Pri stilĝustigo. Stilĝustigo signifas korekti la stilon de pensado kaj stilon de laboro. Stilĝustigo interne de la Komunista Partio estis farita foje dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, poste refoje dum la periodo de la Liberiga Milito, kaj ankoraŭfoje en la komenca periodo post la fondiĝo de la Ĉina Popola

Respubliko.[2] Nun la Centra Komitato de la Komunista Partio decidis komenci ĉijare en la Partio stilĝustigon. Personoj ekster la Partio povas ĝin partopreni libere, aŭ ne partopreni, se ili ne volas. Tiu ĉi stilĝustigo ĉefe kritikos kelkajn specojn de malĝustaj stiloj en pensado kaj laboro: subjektivismo, burokratismo kaj sektismo. La metodo de ĉifoja stilĝustigo estas la sama kiel tiu en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, t.e., post la studo de la dokumentoj, ĉiu persono, surbaze de tiu ĉi studo, ekzamenos sian penson kaj laboron, faros kritikojn kaj memkritikojn, malkaŝos la difektojn kaj erarojn, disvolvos la bonajn kvalitojn kaj ĝustaĵojn. Dum la stilĝustigo, unuflanke estas necese agi serioze kaj strikte, kritiki kaj memkritiki la erarojn kaj difektojn serioze kaj ne supraĵe, kaj nepre ilin korekti; aliflanke estas necese agi laŭ la maniero de "milda vento kaj pluveto", "lerni el la pasintaj eraroj por eviti la estontajn", "kuraci la

malsanon por savi la pacienton", kaj kontraŭstari la metodon "bastonmortigi per sola frapo".

Nia Partio estas partio granda, glora kaj ĝusta. Tion ni devas aserti. Sed ni havas ankoraŭ difektojn, kaj ankaŭ tiu fakto devas esti asertata. Ni ne devas aprobi ĉion kion ni faris, sed nur tion, kio estas ĝusta. Aliflanke, ni ankaŭ ne devas malaprobi ĉion kion ni faris, sed nur tion, kio estas malĝusta. En nia laboro la atingoj estas ĉefaj, sed ankaŭ la difektoj kaj eraroj estas nemalmultaj. Pro tio ni devas entrepreni stilĝustigon. Se ni mem kritikas nian subjektivismon, burokratismon kaj sektismon, ĉu tio perdigos al nia Partio la prestiĝon? Laŭ mia opinio, ne. Kontraŭe, tio plialtigos la prestiĝon de la Partio. La stilĝustigo en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito ja estas pruvo. Ĝi plialtigis la prestiĝon de la Partio, de la kamaradoj kaj de la malnovaj kadroj, kaj ankaŭ la novaj kadroj akiris grandajn pro-

gresojn. El la du partioj: la Komunista Partio kaj Kuomintango, kiu timis kritikojn? Kuomintango. Ĝi malpermesis kritikojn, sed fine ĝi ne povis sin savi de la fiasko. La Komunista Partio ne timas kritikojn, ĉar ni estas marksistoj, la vero estas ĉe ni, la bazaj amasoj, laboristoj kaj kamparanoj, estas ĉe ni. Ni iam antaŭe diris, ke la stilĝustiga movado estas "ĝenerala movado de marksisma eduko".[3] Stilĝustigo signifas, ke la tuta Partio lernu Marksismon per kritiko kaj memkritiko. Dum la stilĝustiga movado ni certe sukcesos lerni pli da Marksismo.

La reformo kaj konstruado de Ĉinio dependas de nia gvido. Se ni ĝustigos nian stilon, ni akiros pli da iniciativo en nia laboro, fariĝos pli kapablaj kaj laboros pli bone. Nia lando bezonas multe da personoj sincere servantaj la popolon kaj la socialisman aferon kaj sin dediĉantaj al la reformo. Ni kompartianoj ĉiuj devas esti tiaj homoj. En la pasinteco, en malnova

Ĉinio, paroli pri reformo estis krimo, pro kiu oni riskis esti senkapigitaj aŭ enkarcerigitaj. Sed tiam nenion timis tiuj, kiuj sin dediĉis al la reformo. Spite diversajn malfacilojn, ili eldonis librojn kaj gazetojn, edukis kaj organizis la popolon kaj entreprenis persistan luktadon. La ŝtatpotenco de popol-demokratia diktaturo malfermis vojon por rapida disvolviĝo de la ekonomio kaj kulturo de nia lando. Pasis nur kelkaj jaroj post la fondiĝo de nia ŝtatpotenco, oni jam vidas senprecedence prosperajn bildojn tiel en la ekonomia kiel en la kultura, eduka kaj scienca sferoj. Por atingi la celon konstrui novan Ĉinion, ni komunistoj timas nenian malfacilon. Sed nur ni solaj ne sufiĉas. Necesas ankaŭ nombro da honestaj samaspirantoj ekster la Partio, kiuj povas sentime lukti kune kun ni, en direkto al socialismo kaj komunismo, por reformi kaj konstrui nian socion. Estas tre malfacila kaj giganta tasko bonigi la vivkondiĉojn de la centmilionoj da loĝan-

toj de Ĉinio kaj konstrui nian ekonomie kaj kulture postrestintan landon en landon riĉan, potencan, prosperan kaj kulture altedisvolvitan. Ni devas konduki stilĝustigon, konduki ne nur nun, sed ankaŭ estonte, kaj senĉese liberigi nin de ĉio erara ĝuste por tio, ke ni povu pli kompetente plenumi tiun taskon kaj pli bone kunlabori kun ĉiuj honestaj samaspirantoj ekster la Partio, kiuj sin dediĉas al la reformo. Ĝisfundaj materiistoj nenion timas. Ni esperas, ke ĉiuj, kiuj luktas kune kun ni, kuraĝe prenu sur sin la respondecon, superu la malfacilojn, ne timu malsukcesojn, ne timu klaĉojn kaj mokojn, kaj ankaŭ ne timu kritikojn kaj proponojn adresitajn al ni komunistoj. Diras proverbo: "Se mortpunon je dismembrigo oni spitas, imperiestron tiri de sur ĉevalo oni ne hezitas." Ni devas havi tian sentiman spiriton en la lukto por socialismo kaj komunismo. Ni komunistoj siavice devas krei favorajn kondiĉojn por tiuj kunlaborantoj, starigi bonajn

kamaradecajn rilatojn de kunlaborado kun ili kaj unuiĝi kun ili por kune batali.

Sese: Problemo pri unuflankeco. Unuflankeco estas absoluteco en pensado, estas metafizike rigardi problemojn. En la taksado de nia laboro, estas unuflankeco ĉion aprobi aŭ ĉion malaprobi. Nun ekzistas ne malmultaj personoj interne de la Partio, kaj ankaŭ multaj ekster ĝi, kiuj traktas problemojn tiamaniere. Ĉion aprobi signifas nur vidi la bonan kaj ne rimarki la malbonan, nur permesi laŭdon kaj ne toleri kritikon. Diri, ke en nia laboro kvazaŭ ĉio iras bone, ne kongruas kun la fakto. Ne ĉio iras bone; ekzistas ankoraŭ difektoj kaj eraroj. Sed ankaŭ ne estas, ke ĉio iras malbone; tio ankaŭ ne kongruas kun la fakto. Necesas fari analizojn. Ĉion malaprobi signifas senanalize konsideri, ke ĉio estas malbone farita, ke troviĝas kvazaŭ nenio bona, aŭ ĉio fuŝa, en tia granda entrepreno kia estas la socialisma konstruado, en tiu ĉi granda lukto kiun faras loĝantaro nombranta cen-

tojn da milionoj da personoj. Kvankam multaj personoj kun tia vidpunkto diferencas de tiuj kiuj gardas en si malamikecon kontraŭ la socialisma sistemo, tamen tia vidpunkto estas tre erara kaj tre malutila kaj kondukas nur al perdo de konfido. Estas erare rigardi nian laboron el vidpunkto ĉu ĉion aprobi ĉu ĉion malaprobi. Necesas kritiki tiujn, kiuj traktas problemojn unuflankece, kaj ilin kritiki, kompreneble, laŭ la principo "lerni el la pasintaj eraroj por eviti la estontajn" kaj "kuraci la malsanon por savi la pacienton", kaj estas necese ilin helpi.

Iuj diras, ke, se ni faras stilĝustigon kaj petas alies opiniojn, unuflankeco estas neevitebla, kaj ke elmeti la problemon likvidi unuflankecon ŝajne signifas ne permesi aliajn paroli. Ĉu tia diro pravas? Estas malfacile postuli, ke ĉiu estu tute libera de unuflankeco. Homoj observas kaj traktas problemojn kaj esprimas siajn opiniojn ĉiam laŭ siaj propraj spertoj, kaj kelkfoje

estas neeviteble por ili montri iom da unuflankeco. Tamen, ĉu ni ne povas postuli, ke oni ĝin forigu laŭgrade kaj rigardu problemojn relative ĉiuflanke? Mi opinias, ke ni devas tion postuli. Se ne, se ni ne postulas, ke tagon post tago, jaron post jaro pli kaj pli multe da personoj relative ĉiuflanke traktu problemojn, do ni stagnos, aprobos unuflankecon kaj iros en la direkto kontraŭa al la postuloj de la stilĝustigo. Unuflankeco estas malobservo al dialektiko. Ni postulas, ke la dialektiko estu laŭgrade disvastigata kaj ke ĉiuj ellernu iom post iom tiun ĉi sciencan metodon. Nun iuj el niaj artikoloj estas bombastaj, sed tute senenhavaj, senanalizaj, malforte argumentaj kaj nekonvinkaj. Estas necese malpliigi iom post iom tiajn artikolojn. Skribante artikolon, oni ne devas ĉiam pensi: "Mi estas tiom kompetenta", sed devas preni la sintenon de kompleta egaleco kun la legantoj. Malgraŭ ke vi partoprenas la revolucion jam delonge, oni same vin refutos, se

vi diros malĝustaĵojn. Ju pli alte vi vin tenas, des malpli oni aŭskultas viajn vortojn, des malpli oni ŝatas legi viajn artikolojn. Ni devas fari ĉion honeste, analizi la aferojn, skribi artikolojn kun konvinkeco, kaj ne devas afekti imponecon por timigi aliajn.

Iuj diras, ke longa artikolo povas eviti unuflankecon, dum mallonga eseo ne povas ĝin eviti. Ĉu eseo nepre estas akompanata de unuflankeco? Kiel mi jam diris, unuflankeco ofte estas malfacile evitebla, kaj krome la ekzisto de iom da unuflankeco ne estas afero ege grava. Postuli, ke ĉiuj traktu problemojn perfekte ĉiuflanke, malhelpus la disvolviĝon de kritiko. Malgraŭ tio, ni tamen postulas, ke oni penu trakti problemojn relative ĉiuflanke kaj eviti unuflankecon ĉu en artikoloj longaj, ĉu en artikoloj mallongaj, inkluzive eseojn. Iuj demandas: Kiel eblas fari analizojn en eseo, kiu konsistas el kelkaj centoj, aŭ unu aŭ du miloj da vortoj? Mi diras: Kial ne? Ĉu

Lusin ne faris tiamaniere? Analiza metodo estas dialektika metodo. Analizo signifas analizi la kontraŭdirojn de objektoj. Ne bone konante la vivon kaj ne vere komprenante la kontraŭdirojn pritraktatajn, oni ne povas fari trafan analizon. La eseoj de Lusin skribitaj en la lasta periodo de lia vivo estas plej profundaj kaj konvinkaj, kaj tamen liberaj de unuflankeco, ĉar tiam li ellernis dialektikon. Parto da artikoloj de Lenin ankaŭ povas esti nomataj eseoj. Ili ankaŭ estas satiraj kaj tre akraj, sed liberaj de unuflankeco. La eseoj de Lusin plejparte estis direktitaj kontraŭ malamikoj. Tiuj de Lenin sin direktis parte kontraŭ malamikoj kaj parte kontraŭ kamaradoj. Ĉu la eseoj de la tipo de Lusin povas esti uzataj kontraŭ la eraroj kaj difektoj interne de la popolo? Mi pensas, ke jes. Kompreneble, ni devas fari distingon inter la malamikoj kaj ni mem, kaj ne devas trakti niajn kamaradojn starante sur malamika starpunkto kaj kun sinteno per kiu ni trak-

tas la malamikojn. Ni devas paroli plenentuziasme kun sinteno defendi la aferon de la popolo kaj plialtigi ĝian politikan konscion, kaj ne kun mokoj kaj atakoj.

Kion fari, se mankas kuraĝo por verki? Iuj diras, ke temoj estas, sed oni ne kuraĝas skribi artikolojn, timante ofendi aliajn kaj ricevi kritikojn. Mi opinias, ke konvenas forigi tian zorgon. Nia ŝtatpotenco estas tiu de popola demokratio, kiu provizas favoran medion al verkado por la popolo. La orientilo "disvolviĝu cent floroj kaj konkuru cent skoloj" donas novan garantion al la disvolviĝo de scienco kaj arto. Se via verko estas ĝusta, vi ne bezonas timi kritikojn kaj povas plueksponi en diskutoj viajn ĝustajn opiniojn. Se via verko estas erara, do kritikoj povas helpi vin korekti la erarojn, kaj en tio estas nenio malbona. En nia socio, revolucia batalanta kritiko kaj kontraŭkritiko estas bona metodo por malkaŝi kaj solvi kon-

traŭdirojn, disvolvi sciencon kaj arton kaj bone plenumi ĉiujn laborojn.

Sepe: "Disvolvi" aŭ "volvi"? Tio estas problemo de orientilo. "Disvolviĝu cent floroj kaj konkuru cent skoloj" estas orientilo fundamenta kaj ankaŭ longdaŭra, kaj ne provizora. Vi, kamaradoj, ne konsentis "volvi" dum la diskutoj. Mi konsideras prava tiun opinion. La opinio de la Centra Komitato de la Partio estas ĝuste tio ke ni ne "volvu", sed nur "disvolvu".

Por gvidi nian ŝtaton, ni povas apliki unu el la du malsamaj metodoj, aŭ, alivorte, du malsamaj orientiloj, t.e. "disvolvi" aŭ "volvi". "Disvolvi" signifas: aŭdace lasi ĉiujn esprimi siajn opiniojn por ke oni kuraĝu paroli, kritiki kaj debati; ne timi erarajn dirojn kaj venenaĵojn; stimuli debatojn kaj reciprokajn kritikojn inter diversaj opinioj, permesante kaj la liberecon de kritiko kaj la liberecon de kritiko al kritikantoj; ne subpremi erarajn opiniojn, sed konvinki kaj persvadi homojn per argumentoj.

"Volvi" signifas: ne permesi al aliaj eldiri malsamajn opiniojn kaj esprimi erarajn opiniojn; kaj ilin "bastonmortigi per sola frapo", se ili tion faras. Tio ne estas metodo por solvi kontraŭdirojn, sed metodo por ilin pligrandigi. Devas esti elektita unu el la du orientiloj: "disvolvi" aŭ "volvi". Ni adoptas la unuan, ĉar ĝi utilas por solidigi nian ŝtaton kaj disvolvi nian kulturon.

Ni estas pretaj apliki la orientilon de "disvolvo" por unuigi la milionojn da intelektuloj kaj aliigi ilian nunan fizionomion. Kiel mi diris supre, la plejparto de la intelektuloj de nia lando volas progresi kaj remuldiĝi kaj estas remuldebla. Ĉi-rilate, la orientilo de ni prenita ludas grandan rolon. La problemo de intelektuloj estas antaŭ ĉio problemo ideologia. Trakti ideologiajn problemojn per krudaj aŭ subpremaj metodoj estas damaĝe, senutile. La remuldo de la intelektuloj, precipe la ŝanĝo de ilia mondkoncepto, bezonas longan procezon. Niaj kamaradoj nepre devas kompreni,

ke la laboro de ideologia remuldo estas longtempa, pacienca kaj delikata laboro, kaj ke ni ne devas provi per dono de kelkaj lecionoj aŭ okazigo de kelkaj kunvenoj ŝanĝi la ideologion de homoj formitan dum dekoj da jaroj en ilia vivo. Por ke oni konvinkiĝu, ni devas tion atingi nur per persvado, kaj ne per subpremo. Subpremo neniam rezultigas konvinkiĝon. Ne eblas konvinki aliajn per forto. Ni povas tiel trakti malamikojn, sed neniel devas uzi tiun ĉi metodon por trakti kamaradojn kaj amikojn. Kion fari, se ni ne scipovas konvinki? Necesas do lerni. Ni nepre devas ellerni korekti ĉiajn erarajn ideojn per debato kaj rezonado.

"Disvolviĝu cent floroj" estas metodo por disvolvi arton; "konkuru cent skoloj" estas metodo por disvolvi sciencon. Tiu orientilo ne nur estas bona metodo por la disvolvo de arto kaj scienco, sed, en ĝia vasta aplikado, ankaŭ estas bona metodo por fari ĉiujn niajn laborojn. Ĝi povas

helpi nin pli malmulte fari erarojn. Estas multaj aferoj, kiujn ni ne konas, kaj sekve ne scias solvi, sed en debato kaj luktado ni ekkomprenos tiujn aferojn kaj trovos metodojn por solvi problemojn. Rezulte de la debato inter diversaj opinioj, disvolviĝos la vero. Ankaŭ rilate al la antimarksismaj venenaĵoj, ni povas uzi tiun ĉi metodon, ĉar la lukto kontraŭ antimarksismaj aĵoj disvolvos Marksismon. Tio estas disvolviĝo en la batalado inter du kontraŭaĵoj, disvolviĝo konforma al dialektiko.

Ĉu oni ne ĉiam parolas pri vero, bono kaj belo? Iliaj maloj estas malvero, malbono kaj malbelo. Sen malvero, malbono kaj malbelo ne ekzistus vero, bono kaj belo. Vero staras kontraŭ malvero. En homa socio kaj en naturo, unuecaĵo ĉiam dividiĝas en diferencajn partojn, kvankam la enhavo kaj formo varias laŭ malsamaj konkretaj kondiĉoj. Ĉiam ekzistos eraroj, ĉiam ekzistos malbelaj kaj malbonaj fenomenoj. Ĉiam ekzistos kontraŭoj kiel virto kaj

malvirto, bono kaj malbono, belo kaj malbelo. La samo estas pri la aromaj floroj kaj venenaj herboj. Ilia interrilato estas unueco de kontraŭoj, estas lukto inter kontraŭoj. Nur en komparo eblas distingo. Nur kun distingo kaj lukto eblas disvolviĝo. Vero disvolviĝas en la lukto kontraŭ malvero. Tiel disvolviĝas Marksismo. Marksismo disvolviĝas en la lukto kontraŭ burĝara kaj etburĝara ideologio, kaj ĝi povas disvolviĝi nur en lukto.

Ni estas por la orientilo de "disvolvo". Nun estas ankoraŭ ne sufiĉe da "disvolvo", kaj tute ne tro. Ni ne devas timi "disvolvon", nek kritikojn, nek venenajn herbojn. Marksismo estas scienca vero, ĝi ne timas kritikojn, nek estas renversebla per kritikoj. Ankaŭ la Komunista Partio kaj la Popola Registaro estas tiaj; ankaŭ ili ne timas kritikojn, nek estas renverseblaj per kritikoj. Eraraĵoj ĉiam ekzistos kaj en tio estas nenio timinda. Lastatempe sur la scenejoj komencis aperi iuj demonoj kaj diabloj. Iuj

kamaradoj tre maltrankviliĝas vidante tian staton. Miaopinie, povas esti allasataj iomaj, ĉar, post dekoj da jaroj, malaperos ĉiuj demonoj kaj diabloj, kiaj troviĝas sur la nunaj scenejoj, kaj tiam ili ne plu estos videblaj, eĉ se oni volos ilin vidi. Ni devas disvastigi la ĝustaĵojn kaj opozicii la malĝustaĵojn, sed ne devas timi, ke oni kontaktas kun la lastaj. Se ni, apogante nin nur sur administraj ordonoj, malpermesas onin kontakti kun nenormalaj fenomenoj, kun malbelaj kaj malbonaj objektoj, kun eraraj ideoj, kaj malpermesas onin rigardi demonojn kaj diablojn, tio povas solvi nenian problemon. Kompreneble, mi ne stimulas disvastigi demonojn kaj diablojn. Mia opinio estas, ke "povas esti allasataj iomaj". La ekzisto de iuj erarаĵoj ne estas io stranga, nek timinda. Tio ebligas, ke oni pli bone ellernos batali kontraŭ ili. Ankaŭ ventegoj kaj ondegoj ne estas timindaj. Homa socio disvolviĝas ĝuste en ventegoj kaj ondegoj.

En nia lando ankoraŭ longe ekzistos burĝara kaj etburĝara ideologio, antimarksisma ideologio. La socialisma sistemo estas jam fundamente establita en nia lando. Ni jam akiris la fundamentan venkon en la transformado de la posedsistemo de produktaj rimedoj, sed ni ankoraŭ ne akiris kompletan venkon sur la politika kaj ideologia frontoj. Ankoraŭ ne vere solviĝis la problemo "kiu venkos kiun" ideologie inter la proletaro kaj la burĝaro. Ni ankoraŭ devos fari longdaŭran bataladon kontraŭ la burĝara kaj etburĝara ideologio. Estas erare ne kompreni tion kaj forlasi ideologian lukton. Ni devas kritiki ĉiajn ideojn erarajn, ĉiajn herbojn venenajn kaj ĉiajn demonojn kaj diablojn, kaj neniel permesi ilin inundi senbride. Tamen la kritiko devas esti argumentoplena, analiza, konvinka, kaj ne devas esti kruda, burokratisma aŭ metafizika, dogmisma.

Delonge oni faris multajn kritikojn al dogmismo. Tio estas necesa. Sed ofte

oni preteratentas kritiki reviziismon. Dogmismo kaj reviziismo ambaŭ estas antimarksismaj. Marksismo nepre antaŭen disvolviĝos, disvolviĝos kun la disvolviĝo de praktiko, kaj ĝi ne povas stagni. Se ĝi haltus kaj restus ĉiam la sama, ĝi do perdus la vivon. Tamen ĝiaj bazaj principoj ne devas esti malobservataj, alie eraroj estos faritaj. Trakti Marksismon per metafizika vidpunkto, ĝin konsideri io ŝtoniĝinta estas dogmismo. Nei la bazajn principojn de Marksismo, nei ĝian universalan veron estas reviziismo. Reviziismo estas speco de burĝara ideologio. La reviziistoj forviŝas la diferencojn inter socialismo kaj kapitalismo, inter la diktaturo de proletaro kaj tiu de burĝaro. Tio, kion ili porpledas, fakte ne estas socialisma linio, sed linio kapitalisma. En la nunaj cirkonstancoj, reviziismo estas pli malutila ol dogmismo. Nun unu el niaj gravaj taskoj sur la ideologia fronto estas disvolvi kritikojn al reviziismo.

Oke kaj fine: Ĉiuj partiaj komitatoj de provincoj, municipaloj kaj aŭtonomaj regionoj devas preni en la manon la ideologian problemon. Iuj ĉeestantaj kamaradoj deziras, ke mi traktu tiun ĉi punkton. Nun multaj el la lokaj partiaj komitatoj ankoraŭ ne prenis en la manon, aŭ prenis malmulte, tiun problemon. La ĉefa kaŭzo estas okupiteco. Sed oni devas nepre preni ĝin en la manon. "Preni en la manon" signifas meti tiun problemon en la tagordon kaj ĝin studi. La grandskalaj kaj uraganaj amasaj klasbataloj de la pasintaj revoluciaj periodoj en nia lando jam fundamente finiĝis, sed ankoraŭ estas klasbatalo, ĉefe sur la politika kaj ideologia frontoj, kaj ĝi estas eĉ tre akra. La ideologia problemo nun fariĝas jam problemo ege grava. La unuaj sekretarioj de ĉiuj lokaj partiaj komitatoj devas persone ĝin preni en la manon. Ĝi povas esti ĝuste solvita nur kiam oni ĝin atentas kaj studas. Ĉiuj lokoj devas okazigi kunvenojn similajn al ĉi tiu konfe-

renco pri propaganda laboro por pridiskuti lokan ideologian laboron kaj diversajn problemojn koncernajn al ideologia laboro. Tiaj kunvenoj devas esti partoprenataj ne nur de kamaradoj en la Partio, sed ankaŭ de personoj ekster la Partio, de personoj kun malsamaj opinioj. La sperto de nia nuna konferenco pruvas, ke tio nur utilas kaj ne malutilas al la irado de la kunveno.

KLARIGOJ

1. La Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro estis okazigita de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio de la 6-a ĝis la 13-a de marto de 1957 en Pekino. La konferencon ĉeestis pli ol 380 respondeculoj de partiaj propagandaj, kulturaj kaj edukaj organoj de la centra kaj provinca (aŭ municipala) niveloj. Partoprenis en la konferenco ankaŭ pli ol cent personoj ekster la Partio laborantaj en scienca, eduka, literatura, arta, ĵurnalisma kaj eldona departementoj kaj institucioj.

2. La ĉi tie menciita stilĝustigo dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito aludas al la grandskala stilĝustiga movado universale disfaldita en 1942, en la partiaj organizoj en Jan'an kaj aliaj kontraŭjapanaj bazlokoj, kontraŭ subjektivismo, sektismo kaj partia stereotipaĵo. La stilĝustigo dum la periodo de la Liberiga Milito aludas al partiordiga movado, kiu estis kombinita kun la movado de agrara reformo kaj ĝenerale entreprenita en la partiaj organizoj de la liberigitaj regionoj en 1948. La stilĝustigo en la komenca periodo post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko aludas al tiu farita en la tuta Partio en 1950, post la gajno de la venko en la tuta lando. Tiu ĉi stilĝustigo celis plifortigi la edukadon al la granda nombro da novaj partianoj, elimini ilian ideologian malpurecon kaj likvidi la fierecon, memkontenton kaj komenciĝintan devigan kaj ordonan laborstilon aperintajn inter la malnovaj partianoj pro la venko.

3. Vd. "Pri la Memprovizo de la Armeo per Produktado kaj pri la Graveco de la Du Grandaj Movadoj por Stilĝustigo kaj por Produktado", *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

DE KIE VENAS LA KOREKTAJ IDEOJ DE LA HOMO?*

(Majo 1963)

De kie venas la korektaj ideoj de la homo? Ĉu ili falas de la ĉielo? Ne. Ĉu ili estas denaske propraj al la cerbo? Ne. La korektaj ideoj de la homo povas veni nur de socia praktiko, de ĝiaj tri formoj — la produkta batalo, klasbatalo kaj scienca eksperimentado. La socia ekzisto de la homo determinas liajn ideojn. Kiam la korektaj ideoj reprezentantaj progresintan klason

*Tiu ĉi artikolo estas parto de la *Decido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio pri Certaj Problemoj Koncerne la Nunajn Laborojn en la Kamparo* (*Projekto*), kiu estas projektita sub la gvido de kamarado Maŭ Zedong. Ĉi tiu parto estas verkita de kamarado Maŭ Zedong.

estas ekposeditaj de la popolamasoj, ili tuj fariĝas materia forto por transformi la socion kaj la mondon. En socia praktiko homoj kondukas diversajn batalojn kaj akiras riĉajn spertojn, kaj sukcesajn kaj malsukcesajn. Sennombraj fenomenoj de la objektiva ekstera mondo respeguliĝas en la cerbo de la homo pere de liaj kvin organoj — okuloj, oreloj, nazo, lango kaj korpo, kaj komence la kono estas percepta. Kiam akumuliĝas multe da materialoj de tia percepta kono, okazas salto al kono racia, nome al ideoj. Tio estas unu procezo de konado. Tio estas la unua etapo de la tuta procezo de konado, la etapo transpasi de objektiva materio al subjektiva spirito, de ekzisto al ideoj. En tiu ĉi etapo, ankoraŭ ne pruviĝas ĉu la spirito aŭ ideoj (inkluzive de teorioj, politikoj, planoj kaj rimedoj) ĝuste spegulas la leĝojn de la objektiva ekstera mondo, kaj ankoraŭ ne estas eble determini ĉu ili estas korektaj. Poste sekvas la dua etapo de la procezo de kona-

do, la etapo transpasi de spirito al materio, de ideoj al ekzisto. Tio estas meti en socian praktikon la konon akiritan en la unua etapo, por vidi, ĉu la teorioj, politikoj, planoj, rimedoj k.a. povas sukcesi kiel oni atendis. Ĝeneraldire, kiuj sukcesas, estas korektaj, kiuj malsukcesas, estas eraraj, kaj tio estas vera precipe en la lukto de la homo kontraŭ la naturo. En socia lukto, la fortoj reprezentantaj progresintan klason kelkfoje suferas malvenkojn ne pro tio, ke iliaj ideoj estas nekorektaj, sed pro tio, ke en la ekvilibro de la fortoj interluktantaj la progresintaj fortoj dumtempe estas malpli grandaj ol la reakciaj; tial ili dumtempe malvenkas, sed certe triumfos iun tagon poste. Rezulte de la provo de praktiko, homa kono faras alian salton. Tiu ĉi salto havas pli grandan signifon ol la antaŭa. Ĉar nur ĉi-foja salto povas pruvi, ĉu estas korekta aŭ erara la unua salto de konado, nome la ideoj, teorioj, politikoj, planoj, rimedoj k.a. akiritaj en la procezo de spe-

gulado de la objektiva ekstera mondo. Ekster tio, ne ekzistas alia rimedo por kontroli la veron. Kaj la celo de la proletaro por koni la mondon estas nur ĝin reformi, kaj krom tio estas nenia alia celo. Por ricevi korektan konon, ofte necesas ripeti plurfoje la procezon de materio al spirito kaj de spirito al materio, t.e. de praktiko al kono kaj de kono al praktiko. Jen estas la marksisma teorio de konado, la dialektik-materiisma teorio de konado. Nun multaj el niaj kamaradoj ankoraŭ ne komprenas tiun ĉi teorion de konado. Kiam oni demandas, de kie venas iliaj ideoj, opinioj, politikoj, rimedoj, planoj, konkludoj, torente fluaj paroladoj kaj longaj artikoloj, ili ne scias kiel respondi, opiniante stranga la demandon. Ili ankaŭ opinias nekompreneblaj la fenomenojn de salto ofte videblajn en ĉiutaga vivo, ke materio povas transformiĝi en spiriton kaj spirito povas transformiĝi en materion. Tial estas necese eduki niajn kamaradojn en la dialektik-

materiisma teorio de konado, por ke ili ĝuste orientu sian pensadon, bone sciu esplori kaj studi kaj resumi spertojn, venku malfacilojn, kiel eble malplimulte faru erarojn, faru bone sian laboron kaj energie batalu por konstrui grandan potencan landon socialisman kaj helpi la vastajn amasojn de subpremataj kaj ekspluatataj popoloj en la mondo en plenumado de nia granda internaciisma devo.

毛主席的五篇哲学著作

*

外文出版社出版（北京）
1972年（64开）第一版
编号：（世）1050—2021
00065
1—Es—962Pc